

**La parolo
pri la militiro Igora
de Igoro,
filo de Svetoslavo,
nepo de Olgo**

La prarusa teksto
kun traduko kaj komentario
de Sergio Pokrovskij

Antaŭparolo

Komence de majo de la jaro 1185^a Igoro, unu el la limlandaj Rusujaj princoj, entreprenis rabocelan militan ekspedicion en la Kipĉakan Stepon, suferis malvenkon kaj iĝis militkaptito. Tiu banala kaj eĉ hontinda epizodo en la rilatoj inter la Orienta Eŭropo kaj la Okcidenta Stepo rezultigis estiĝon de la plej eminenta kaj la plej frua prarusa poemo — almenaŭ inter tiuj splitoj de la arbo de la prarusa literaturo, kiuj sukcesis nin atingi tra la brulegoj de sinsekvaj invadoj, ekde la mongola ĝis la Napoleona.

Pasos ok jarcentoj, kaj en novembro 1983 la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptos rezolucion, per kiu ĝi

- *agnoskante* la neestingiĝantan valoron de tiu verko en la evoluo de la rusa kaj de la slavaj literaturoj ...

- *konsiderante* la vastan internacian renom-
on de tiu literatura monumento kaj la
influan kiun ĝi, kun la aliaj grandaj verkoj
de la antikvaj literaturoj, plu havas sur la
mondan literaturan procezon,
- *alvokas* la sciencan kaj kulturan komun-
umon de la ŝtatoj membroj de Unesko
celebri tiun datrevenon notindan en la hi-
storio de la monda literaturo.

Tiu mallonga verko vive interesis multajn generaciojn de rusaj legantoj. Por iuj ĝi estis *Eposo*, prezentanta la heroaĵojn kaj la personan dramon de princo Igoro; tiu naiva vidpunkto inspiris la faman operon de A.P. Borodin *Princo Igoro* kaj la du unuajn tradukojn de la verko en Esperanton. Por aliaj ĝi estas mirinda profetaĵo: «la nekonata aŭtoro kvazaŭ viziis la katastrofon okazontan post 50 jaroj, li teruriĝis, ekkriis

— sed oni lin ne aŭdis». Fine, la esploremulojn la verko defias per sia abunda materialo por studoj filologiaj (la sola problemo pri la ĝusta disvortigo estas neelĉerpebla fonto de intelekta ĝuo); kulturologiaj (ekz-e, estas vere amuza vidi unu saman pasaĝon atribuita jen al influo varenge-skalde-ĝermana, jen al la Siberia-tjurka ŝamanismo); historiaj (kiuj eventoj estas aludataj); kaj eĉ per tute detektivaj enketoj pri la cirkonstancoj de la malkovro de la manuskripto kaj pri ĝia malapero en la Moskva brulego dum la Napoleona invado.

Bonvenon en la jaron 1185^{an}. La saracenoj ankoraŭ ne reprenis Jerusalemon. Ankoraŭ ne fondiĝis la Teŭtona Ordeno. La kruckavaliroj ankoraŭ ne mortvundis Bizancion. Tre malproksime, ie trans Bajkalo, Temuĝino jam tri jarojn portas la titolon *Ĉingisĥano*.

Слово о пълку Игоревѣ, Игоря, сына Святъславля, внука Ольгова

Часть первая. Поход

1. Зачин

- 01 Не лѣпо ли ны бѣшетъ, братіе,
02 начяти старыми словесы
03 трудныхъ повѣстій о пълку Игоревѣ,
04 Игоря Святъславлича?
05 Начати же ся тѣмъ пѣсни
06 по былинамъ сего времени,
07 а не по замышленію Бояню.
08 Боянъ бо вѣщій,
09 аще кому хотяше пѣснь творити,
10 то растѣкашется мыслию по древу,
11 сѣрым волкомъ по земли,
12 шизымъ орломъ подѣ облакы.

01

Parolo pri la militiro Igora,
de Igoro, filo de Svetoslavo,
nepo de Olgo

Parto unua. La militiro

1. Enkonduko

01

Ĉu ne konvenus, ke ni, fratoj,

02

komencu en malnova maniero

03

la amarajn rakontojn pri la militiro Igora,

04

de Igoro Svetoslavido?

05

Komenciĝu do la kanto

06

pri la faroj de la tempo nuna

07

sed ne laŭ la koncepto Bojana.

08

Ĉar Bojano la majstro,

09

se li volis prikanti iun,

10

disfluadis li pense sur la arbo,

11

kiel lupu brunagriza, sur la tero,

12

kiel aglo grizviola, sub la nuboj.

13 Помняшеть бо речь
първыхъ временъ усобицѣ.
14 Тогда пущашеть ї соколовъ на стадо лебедѣй:
15 которыи дотечяше, та преди пѣснь пояше —
16 старому Ярославу,
17 храброму Мстиславу,
иже зарѣза Редедю
18 предъ пълкы Касожьскими,
19 красному Романови Святъславличю.
20 Боянъ же, братіе, не ї соколовъ
21 на стадо лебедѣй пущаше,
22 нъ своя вѣщія прѣсты
23 на живая струны вѣскладаша
24 они же сами княземъ славу рокотаху.
25 Почнемъ же, братіе, повѣсть сію
26 отъ стараго Владимира до нынѣшняго Игоря
27 иже истягну умъ крѣпостію своею
28 и поостри «й» сердца своего мужествомъ,
29 наплънився ратного духа,
30 наведе своя храбрыя плѣкы

13 Ja memoris li l' aferon
de l' unua tempo de l' kverelo.
14 Tiam sendis li 10 falkojn sur roton da cigno;
15 kaj la atingita, antaŭe kantis gloron —
16 al la malnova Jaroslavo,
17 al la kuraĝa Mstislavo,
18 ponardinta Rededon
antaŭ la trupoj ĉerkesaj,
19 al la bela Romano Svetoslavido.
20 Bojano do, fratoj, ne dekon da falkoj
21 sur cignan roton sendis,
22 li siajn sorĉajn fingrojn
23 sur vivajn kordojn metis;
24 kaj ili meme gloron sonoris al la princoj.
25 Komencu do ni, fratoj, ĉi tiun rakonton,
26 ekde la malnova Vladimiro ĝis la nuna Igoro,
27 kiu bridinte la menson per sia forto,
28 kaj spronante «ĝin» per la kuraĝo de sia koro,
29 pleniĝis je batalspirito
30 kaj kondukis siajn bravajn trupojn

31 на землю Половѣцькую
32 за землю Руськую.

2. Затмение солнца

01 Тогда Игорь възрѣ на свѣтлое солнце и видѣ
02 отъ него тьмою вся своя воя прикрыты.
03 И рече Игорь къ дружинѣ своей:
04 «Братіе и дружино!
05 Луце жъ бы потяту быти,
06 неже полонену быти
07 а всядемъ, братіе, на свои бръзья комони,
08 да позримъ синего Дону».
09 Спала Князю умъ похоти,
10 и жалость ему знаменіе заступи,
11 искусити Дону великаго.
12 «Хощу бо, — рече, — копіе приломити
13 конецъ поля Половецкаго
14 съ вами, русици, хощу главу свою приложить
15 а любо испити шеломомъ Дону».
16 О Бояне, соловію стараго времени!

31 en la landon Kipĉakan
32 pro la lando Rusa.

2. *La suneklipso*

01 Tiam rigardis Igoro la helan sunon kaj vidis
02 siajn homojn ĉiujn de ĝi kovritaj per mallumo.
03 Kaj diris li al sia kompanio:
04 «Fratoj kaj kamaradoj!
05 Ja pli bona estus morto per glavo
06 ol la mallibero de kaptito.
07 Ekrajdu ni, fratoj, niajn ĉevalojn rapidajn,
08 iru ni rigardi la bluan Don-riveron!»
09 La racion de l' princo ardigis la volo,
10 kaj la ĉielan signon superfortis la dezirego
11 gustumi la grandan Donon.
12 «Ĉar mi volas, — li diris, — lancon rompi
13 ĉe la limo de l' stepo Kipĉaka;
14 kun vi, rusoj, forlasos mi la vivon —
15 aŭ per la kasko trinkos mi el Dono».
16 Ho Bojano, najtingalo malnovtempa!

17 Абы ты сіа плъкы ущекоталь,
18 скача, славію, по мыслену древу,
19 летая умомъ подъ облакы,
20 свивая славы обаполы сего времени,
21 рища въ тропу Трояню
22 чресъ поля на горы.
23 Пѣти было пѣснь Игореві, того (Олга) внуку:
24 «Не буря соколы занесе чрезъ поля широкая
25 — галици стады бѣжать къ Дону великому».

3. Приход Всеволода из Курска

01 Чи ли въспѣти было, вѣщей Бояне,
Велесовъ внуче:
02 «Комони ржутъ за Сулою —
03 звенить слава в Києвѣ
04 трубы трубятъ въ Новѣградѣ —
05 стоятъ стязи въ Путивлѣ!».
06 Игорь ждетъ мила брата Всеволода.
07 И рече ему буй туръ Всеволодъ:
08 «Один братъ, один свѣтъ свѣтлый —
ты, Игорю!

17 Kiel vi tiujn trupojn prikantus
18 saltante, najtingalo, sur la pensa arbo,
19 flugante en la menso sub la nubojn,
20 plektante glorojn ĉirkaŭ ĉi-tempo,
21 impetante laŭ la vojo Trojana
22 tra la kampojn sur la montojn!
23 Kantata estus kanto al Igoro, ties nepo:
24 «Ne ŝtormo falkojn portis tra la larĝa stepo;
25 monedaj rotoj al la granda Don' impetas».

3. Vsevolodo alvenas el Kursko

01 Aŭ tiel kantendus, saĝa Bojano,
Velesa nepo:
02 «Ĉevaloj blekas trans Sula-rivero —
03 sonoras la gloro en Kievo;
04 trumpetoj tondras en Novgorodo —
05 staras la standardoj en Putivlo».
06 Igoro atendas la karan fraton Vsevolodon.
07 Kaj diris al li la batalema uro Vsevolodo:
08 «Sola frato mia, sola lumo hela —
vi, Igoro!

09 оба есѣ Святъславличя!
10 Сѣдлай, брате, свои бръзыи комони,
11 а мои ти готови, осѣдлани у Курска напреди.
12 А мои ти куряни свѣдоми къмети:
13 подъ трубами повити,
14 подъ шеломы взлѣлѣяни,
15 конецъ копія въскрѣмлени,
16 пути имъ вѣдоми,
17 яругы имъ знаеми,
18 луци у нихъ напряжени,
19 тули отворени,
20 сабли изъострени
21 сами скачють, акы сѣрыи влѣци
22 въ полѣ ищучи
23 себе чти,
24 а князю славѣ».

4. Грозная ночь

01 Тогда вѣступи Игорь князь
 въ златъ стремя

09 Ambaŭ ni estas Svetoslavidoj!
10 Seligu, frato, viajn ĉevalojn rapidajn —
11 la miaj jam pretas, selitaj ĉe Kursko anticipe.
12 Kaj miaj kurskanoj estas spertaj batalistoj:
13 ĉe trumpetsonoj naskitaj,
14 sub kasko vartitaj
15 per la lancpinto nutritaj;
16 la vojojn ili scias,
17 la ravinojn ili konas,
18 la pafarkon ili tenas streĉita,
19 la sagujuo pretas malfermita,
20 la sabro estas akrigita;
21 ili ĉesas, kiel grizaj lupoj,
22 en la stepo serĉantaj
23 por si, honoron,
24 por sia princo, gloron».

4. Minacplena nokto

01 Tiam sin levis Igor-princo
en la oran piedingon

02 и поѣха по чисту полю.
03 Солнце ему тьмою путь заступаше
04 ночь стонущи ему грозою
птичь убуди
05 свисть звѣринь вѣста,
06 зби^кся» дивѣ,
07 кличеть врѣху древа, велить послушати —
08 земли незнаемѣ Влѣзѣ,
09 Поморію,
10 Посулію,
11 Сурожу,
12 и Корсуню,
13 и тебѣ, Тьмутороканьскый бльвань!
14 А половци неготовами дорогами
15 побѣгоша къ Дону великому
16 крычатъ тѣлѣгы полунощы,
17 рци, лебеди розпущени:
18 Игорь къ Дону вои ведетъ!
19 Уже бо бѣды его пасетъ птицъ
по добію

02 kaj rajdis sur la libera stepo.
03 La suno lian vojon per mallumo baras;
04 la nokt' al li ĝemante per teruro
la birdaron vekis;
05 siblo besta estiĝis,
06 Divo ekscitiĝis,
07 vokas sur arbopinto, ordonas ke aŭdu —
08 la lando nekonata Volgo,
09 kaj la marlando,
10 kaj la Sula-bordo,
11 kaj Sudako,
12 kaj Ĥersono,
13 kaj vi, Tamatarkana idolo!
14 Kaj la kipĉakoj per nepretaj vojoj
15 rapidas al la granda Dono;
16 la ĉaroj kriĉas noktomeze
17 kvazaŭ la cignoj ekscititaj:
18 Igoro batalistojn kondukas al Dono!
19 Jam pri malfeliĉo lin avertas la birdar'
sur kverkoj;

20 влъци грозу въсрожать по яругамъ
21 орли клетомъ на кости звѣри зовуть
22 лисици брешуть на чръленыя щиты.
23 О Руская земле! уже за шеломянемъ еси!
24 Длъго ночь мръкнеть.
25 Заря свѣтъ запала,
26 мъгла поля покрыла.
27 Щекоть славій успе
28 говоръ галичь убуди«ся».
29 Русичи великая поля
чрълеными щиты прегородиша
30 ищучи себе чти,
31 а князю славы.

5. Победа над половцами

01 Съ заранія въ пятькъ
02 потопташа поганыя плъкы половецкыя,
03 и рассушясь стрѣлами по полю,
04 помчаша красныя дѣвки половецкыя,
05 а съ ними злато,

20 la lupoj timindaĵon aŭguras en la ravinoj;
21 la agloj bleke bestojn vokas al ostregalo;
22 la vulpoj boas kontraŭ la ruĝaj ŝildoj.
23 Ho Rusa lando! jam foras vi trans la monteto!
24 Longe la nokto estingiĝas.
25 La krepusko lumon ekbruligis,
26 la stepon nebulo kovris,
27 la trilado najtingala endormiĝis,
28 la babilo moneda vekiĝis.
29 La rusoj per la ruĝaj ŝildoj la grandan
stepon baris,
30 serĉante por si, honoron,
31 por sia princo, gloron.

5. Venko super la kipĉakoj

01 Frumatene je la vendredo
02 surtretis ili trupojn paganajn stepanajn,
03 kaj dispafiĝinte kiel sagoj sur la stepo,
04 forkaptis ili la belajn junulinojn kipĉakajn,
05 kaj kune oron,

06 и паволокы,
07 и драгыя оксамиты.
08 Орьтьмами, и япончицами, и кожухы
09 начаша мосты мостити по болотомъ
10 и грязивымъ мѣстомъ,
11 и всякими узорочьи половѣцкими.
12 Чрьлень стягъ — бѣла хорюговъ,
13 чрьлена чолка — сребрено стружіе
14 — храброму Святъславличю!
15 Дремлетъ въ полѣ Ольгово хороброе
гнѣздо.
16 Далече залетѣло!
17 Не было нѣ обидѣ порождено,
18 ни соколу,
19 ни кречету,
20 ни тебѣ, чрьный воронъ,
поганый половчине!
21 Гзакъ бѣжитъ сѣрымъ влъкомъ,
22 Кончакъ ему слѣдъ править къ Дону
великому.

06 kaj brokaĵon,
07 kaj luksan veluron.
08 El burkoj, kaj kovrotukoj, kaj peltaĵoj
09 faris ili irejojn tra marĉoj
10 kaj tra kotlokoj,
11 kaj ankaŭ el ĉiaj ornamaĵoj kipĉakaj.
12 La ruĝan stangon — la blankan standardon,
13 la ruĝan kvaston — la arĝentan pintingon
14 — al la brava Svetoslavido!
15 Dormetas en la stepo la brava idaro
de la Olga nesto.
16 Malproksimen ĝi estas fluginta!
17 Ne naskiĝis ĝi por suferi ofendon
18 de la falko,
19 nek de la aglo,
20 nek de vi, nigra korvo,
kipĉako pagana!
21 Gza kuras grizalupe,
22 Konĉako spuron por li faras al la
granda Dono.

6. Битва субботняя

- 01 Другаго дни велми рано
02 кровавыя зори свѣтъ повѣдають
03 чръныя тучя съ моря идуть,
04 хотятъ прикрыти дѣ солнца,
05 а въ нихъ трепещуть синіи мльніи.
06 Быти грому великому,
07 итти дождю стрѣлами съ Дону великаго!
08 Ту ся копіемъ приламати,
09 ту ся саблямъ потручяти
10 о шеломахъ половецкыя
11 на рѣцѣ на Каялѣ,
12 у Дону великаго!
13 О Руская землѣ! уже не шеломянемъ еси!
14 Се вѣтри, Стрибожи внуци,
15 вѣють съ моря стрѣлами
16 на храбрыя плѣкы Игоревы.
17 Земля тутнетъ,
18 рѣкы мутно текутъ,

6. *La sabata batalo*

01 Je la sekva tago ege frue
02 sanga matenruĝo lumon anoncas;
03 nigraj nubegoj venas de la maro,
04 kvar sunojn kovri ili volas,
05 kaj en ili tremas bluaj fulmoj.
06 Granda tondro estas tondronta,
07 saga pluvo estas pluvonta de la granda Dono!
08 ĉi tie lancoj rompiĝos,
09 ĉi tie sabroj frapfrapos
10 kontraŭ la kaskoj kipĉakaj
11 ĉe la rivero Kajalo,
12 ĉe la granda Dono.
13 Ho Rusa lando! jam foras vi tran la monteto!
14 Kaj jen ventoj, la Stribogidoj,
15 sagojn blovas de la maro
16 sur la bravajn rotojn Igorajn.
17 La tero tremetas,
18 la riveroj malklariĝis,

19 пороси поля прикрываютъ
20 стязи глаголють: половци идутъ
21 отъ Дона и отъ моря, и отъ всѣхъ странъ
22 Рускыя плѣкы отступиша.
23 Дѣти бѣсови кликомъ поля прегородиша,
24 а храбрїи русици преградиша
чрълеными щиты.
25 Ярѣ туре Всеволодѣ!
26 Стоиши на борони,
27 прыщещи на вои стрѣлами,
28 гремлеши о шеломы мечи
харалужными!
29 Камо турѣ поскочяше,
30 своимъ златымъ шеломомъ посвѣчивая,
31 тамо лежать поганыя головы половецкыя
32 поскепаны саблями калеными
33 шеломы оварьскыя —
34 отъ тебе, Ярѣ туре Всеволоде,
35 кая раны, дорога братіе,
36 забывъ чти и живота,

19 la stepon polvo kovras,
20 la standardoj heroldas: la kipĉakoj venas
21 de Dono kaj de la maro, kaj de ĉiuj flankoj.
22 Rusaj rotoj retiriĝis.
23 Per batalkrio la diablaj filoj la stepon baris,
24 kaj la bravaj rusoj, per la ruĝaj ŝildoj.
25 Ho Arda Uro Vsevolodo!
26 Persistas vi en la batalo,
27 disŝprucigas sagojn sur la militistojn,
28 frapegas sur la kaskojn per la glavoj
Karolidaj!
29 Kien ajn la Uro ekrajdus,
30 per sia ora kasko lumante,
31 tie kuŝas paganaj kapoj kipĉakaj,
32 per harditaj sabroj en splitojn dishakitaj
33 kaskoj Kaŭkaziaj —
34 de vi, Arda Uro Vsevolodo,
35 de kiu bato, ho karaj fratoj,
36 forgesinta la honoron kaj la vivon

37 и града Чрънигова
отня злата стола,
38 и свои милыя хоти,
красныя Глѣбовны
39 свычая и обычая?

7. Дума о войнах Олеговых

01 Были вѣчи Трояни, минула лѣта Ярославля
02 были плъци Олговы, Ольга Святъславличя.
03 Тѣмъ бо Олегъ мечемъ крамолу коваше
04 и стрѣлы по земли сѣяше.
05 Ступаетъ въ златъ стремя
06 въ градъ Тьмутороканъ,
07 тоже звонъ слыша давный великий
08 Ярославъ сынъ Всеволождь,
09 а Владимиръ
10 по вся утра уши закладаше въ Черниговъ.
11 Бориса же Вячеславлича слава на
судъ приведе
12 и на Канину зелену паполому постла
13 за обиду Олгову,

37 kaj de la urbo Ĉernigovo
la patran oran tronon
38 kaj de via aminda princino,
de la bela Glebidino
39 la manieron kaj moron?

7. Ekskurso pri la militoj de Olgo

01 Estis epokoj Trojanaj, pasis la jaroj Jaroslavaj:
02 estis militoj Olgaj, de Olgo Svetoslavido.
03 Ja tiu Olgo perglave kverelojn forĝis
04 kaj sur la landon sagojn semis.
05 Apenaŭ li piedon en la oran piedingon ŝovis
06 en la urbo Tamatarkano —
07 ties sonoron tuj aŭdis la malnova ĉefprinco,
08 Jaroslava filo Vsevolodo,
09 kaj Vladimiro
10 ĉiumatene la orelojn ŝlosis en Ĉernigovo.
11 Ankaŭ Borison Veĉeslavidon la gloro al
juĝo kondukis
12 kaj sur Kanino verdan mantelon «por li» sternis
13 pro ofendo de Olgo —

14 la bravan kaj junan princon.
15 De tiu sama Kajalo Svetopolko forlulis
sian patron
16 per hungaraj ambloĉevaloj
17 al la sankta Sofio, al Kievo.
18 Tiam, en la tempo de Olgo Suferaslavido,
19 prisemate kaj prikreskate je militoj,
20 pereadis la vivo de l' Daĵboga nepo,
21 en la princaj kvereloj
22 la homa vivo mallongiĝis.
23 Tiam en la Rusa lando maloftis la
plugista pelkrio,
24 sed oftis la grakado de korvoj
25 kadavrojn inter si dividantaj,
26 kaj la interparolo de monedoj,
27 flugontaj al regalo abunda.
28 Tio estis en tiuj bataloj kaj en tiuj militoj,
29 sed pri tiela batalo oni ne aŭdis.

8. *La sanga vino*

01 De la frua mateno ĝis la vespero,

02 съ вечера до свѣта
03 летять стрѣлы каленыя,
04 гримлють сабли о шеломы,
05 трещать копіа харалужныя
06 въ полѣ незнаемѣ,
07 среди земли Половецкыи.
08 Чръна земля подѣ копыты
09 костьюми была посяяна,
10 а кровію поляна
11 тугою въздоша по Руской земли.
12 Что ми шумить, что ми звенить —
13 давеча рано предѣ зорями?
14 Игорь плѣкы заворочаетъ:
15 жаль бо ему мила брата Всеволода.
16 Бишася день, бишася другой
17 третьяго дни къ полуднію
18 падоша стязи Игоревы.
19 Ту ся брата разлучиста
20 на брезѣ быстрой Каялы
21 ту кроваваго вина не доста

02 de la vespero ĝis la tagiĝo,
03 flugas la sagoj harditaj,
04 frapegas la sabroj sur la kaskojn,
05 krakas la lancoj Karolidaj
06 en la stepo nekonata,
07 meze de la lando Kipĉaka.
08 La nigra tero sub la hufoj
09 je ostoj estis prisemita
10 kaj je sango sorbigita;
11 elĝermis afliktego en la Rusa lando.
12 Kion aŭdas mi brui, kion aŭdas mi tinti —
13 en la foro frue antaŭaŭrore?
14 Igoro siajn rotojn reen turnas,
15 ĉar la karan fraton Vsevolodon li domaĝas.
16 Ili batalis tagon, kaj ankoraŭ tagon,
17 je la tria tago ĉe l' tagmezo
18 sinkis la standardoj de Igoro.
19 Tie la du fratoj disiĝis
20 ĉe la bordo de la rapidflua Kajalo;
21 tie ne sufiĉis la sanga vino;

22 ту пиръ докончаша храбрїи русичи:
23 сваты попоиша,
24 а сами полегоша за землю Рускую.
25 Ничить трава жалощами,
26 а древо съ тугою къ земли преклонилось.

*Часть вторая. Игорь в плену
половецком*

9. Плач певца о Руси

01 Уже бо, братіе, не веселая година вьстала,
02 уже пустыни силу прикрыла.
03 Вьстала обида
 въ силахъ Дажьбожа внука
04 вступила дѣвою на землю Трояню,
05 всплескала лебедиными крылы
06 на синѣмъ море у Дону
07 плещучи, убуди жирня времена.
08 Усобица княземъ на поганя погыбе,
09 рекоста бо братъ брату:

22 tie finis la festenon la kuraĝaj rusoj:
23 al la boparencoj drinkiginte,
24 ili mem falis pro la lando Rusa.
25 La herbo pro kompato velkas,
26 kaj la arbo afliktite al la tero kliniĝas.

Parto dua. La mallibero de Igoro

9. Lamento pri la Rusa lando

01 Ĉar tiam, fratoj, negaja tempo leviĝis,
02 la dezerto jam la militistaron englutis.
03 Ofendo leviĝis
a, 03 en la militistaro de l' Daĵboga nepo,
04 junuline paŝis sur la landon Trojanan,
05 ekplaŭdis per la cigna flugilaro
06 sur la blua maro apud Don-rivero,
07 plaŭdante, forpelis la grasajn tempojn.
08 La princa milito kontraŭ la paganoj pereis,
09 ĉar diris unu frato al la alia:

10 «Се мое, а то мое же».

11 И начяша князи
12 про малое «се великое» мльвити,
13 а сами на себѣ крамолу ковати.

13 А поганіи съ всѣхъ странъ
прихождаху с побѣдамъ
14 на землю Рускую.

15 О, далече зайде соколъ, птицъ бя,

16 — къ морю!

17 А Игорева храбраго плъку не крѣсити!

18 За нимъ кликну Карна, и Жьля

19 поскочи по Руской земли,

20 смагу людемъ мычючи въ пламянѣ розѣ.

21 Жены рускія въсплакашась, а ркучи:

22 «Уже намъ своихъ милыхъ ладъ

23 ни мыслию смыслити,

24 ни думою сдумати,

25 ни очима съглядати,

26 а злата и сребра ни мало того потрепати».

10 «Ĉi tio estas mia, kaj tio estas mia».

11 Kaj komencis princoj
malgrandaĵon nomi granda

12 kaj unuj kontraŭ aliaj kverelojn forĝi;

13 kaj la paganoj de ĉiuj flankoj
venadis venke

14 kontraŭ la lando Rusa.

15 Ho, malproksimen la falko flugis
debatante birdojn

16 — al la maro!

17 Sed la bravan trupon de Igoro ne revivigi!

18 Post ĝin kriis Karna, kaj Ĵela

19 ekrajdis tra la Rusa lando

20 fajron al la homoj ĵetante en la flama korno.

21 La virinoj rusaj ekploris dirante:

22 «Nun jam ni niajn karajn eĉjojn

23 nek per la penso elpensos,

24 nek per la rememoro revenigos,

25 nek per la okuloj elvokos,

26 kaj nek oron nek arĝenton iam ni tuŝos!»

27 А вѣстона бо, братіе, Кіевъ туюю,
28 а Черниговъ напастыми.
29 Тоска разліяся по Руской земли
30 печаль жирна тече средь земли Рускыи.
31 А князи сами на себѣ крамолу коваху,
32 а поганіи сами,
33 побѣдами нарищуще на Рускую землю,
34 емляху дань по бѣлѣ отъ двора.

10. Песнь Святославу Киевскому

01 Ти бо два храбрая Святъславлича,
02 Игорь и Всеволодъ,
03 уже лжу убудикста» которую то
04 бѣше успиль отецъ ихъ Святъславъ,
05 грозный Великий Кіевскый.
06 Грозою бѣшетъ притрепеталь,
07 своими сильными плѣкы
08 и харалужными мечи
09 наступи на землю Половецкую,

27 Kaj ekĝemis do, fratoj, Kievo pro la malĝojo,
28 kaj Ĉernigovo, pro la aflikto.
29 Angoro disverŝiĝis tra la Rusa lando;
30 malgajo grasa fluis en la lando Rusa.
31 Kaj la princoj mem inter si kverelojn forĝis,
32 kaj la paganoj mem,
33 venke invadinte la Rusan landon,
34 tributigis po arĝentmoneron de ĉiu korto.

10. La kanto pri Svetoslavo de Kievo

01 Ja tiuj du aŭdacaj Svetoslavidoj,
02 Igoro kaj Vsevolodo,
03 nun mison vekis, kiun ĵuse
04 dormigis ilia patro Svetoslavo,
05 la timinda ĉefprinco Kieva.
06 Per timindo li tremigis,
07 per siaj bravaj trupoj
08 kaj glavoj Karolidaj;
09 surpaŝis la landon Kipĉakan,

10 притопта хльми и яругы,
11 в'змути рѣки и озеры,
12 иссуши потоки и болота.
13 А поганого Кобяка изъ луку моря,
14 отъ желѣзныхъ великихъ плъковъ
половецкихъ,
15 яко вихрь, выторже
16 и падесе Кобякъ въ градъ Кіевъ,
17 въ гридницѣ Святъславли.
18 Ту нѣмци и венедици,
19 ту греци и морава
20 поють славу Святъславлю,
21 кають князя Игоря,
22 иже погрузи жиръ во днѣ Каялы,
23 рѣкы половецкія
24 Рускаго злата насыпаша ту
25 Игорьъ князь высѣде изъ сѣдла злата
26 а въ сѣдло кощіево.

10 surtretis ravinojn kaj montetojn,
11 malklarigis riverojn kaj lagojn,
12 sekigis torentojn kaj marĉojn.
13 Kaj la paganan Kobakon de la Margolfo
14 el la grandaj feraj trupoj kipĉakaj
15 li kirle elŝiris;
16 kaj falis Kobako en la urbo Kievo,
17 en la festena salonego de
Svetoslavo.
18 Ĉi tiam germanoj kaj venecianoj,
19 ĉi tiam grekoj kaj moravoj
20 kantas gloron al Svetoslavo,
21 riproĉas princon Igoron,
22 kiu mergis la grason en la fundo de
Kajalo,
23 rivero kipĉaka
24 Rusa oro estis tie verŝata
25 Igor-princo elseliĝis el la ora selo
26 en la selon de stepano.

27 Уныша бо градомъ забралы, а веселіе
понице.

11. Сон Святослава

01 А Святъславъ мутенъ сонъ видѣ:

02 «Въ Кіевѣ на горахъ

03 си ночь съ вечера

04 одѣвахъте мя, — рече, — чръною паполомою

05 на кровати тисовѣ

06 чръпахуть ми синее вино,

07 съ трудомъ смѣшено,

08 сыпахуть ми тѣщими тулы

поганыхъ тльковин

09 великій женчюгъ на лоно

10 и нѣгують мя.

11 Уже дѣски безъ кнѣса

12 в моемъ теремѣ златовръстѣмъ.

13 Всю ночь съ вечера

14 босуви врани възгряху у Плѣсньска

15 на болони бѣша дебрь Кисаню

16 и не сошлю къ синему морю».

27 Malgajiĝis la urbmuraj rundvojoj, kaj la
ĝojo estingiĝis.

11. La sonĝo de Svetoslavo

01 Kaj Svetoslavo malklaran sonĝon havis:

02 «En Kievo sur la montetoj

03 ĉi nokte ekde la vespero

04 vi kovris min, — li diris, — per mantelo nigra

05 sur lito taksusligna;

06 oni ĉerpis al mi bluan vinon

07 kun ĉagreno miksitan,

08 ŝutis al mi per malplenaj saguoj
de paganaj helpantoj

09 grandajn perlojn sur la bruston

10 kaj min karesas.

11 La tabuloj estas jam sen firsto

12 en palaco mia ortegmenta.

13 La tutan nokton ekde la vespero

14 boatkorvoj ekgrakadis ĉe Plesensko,

15 sur la maldensejo estis serpentoj densejaj

16 kaj impetis ili al la blua maro».

17 И ркоша бояре князю:
18 «Уже, княже, туга умь полонила
19 се бо два сокола слѣтъста
20 съ отня стола злата
21 поискати града Тьматороканя,
22 а любо испити шеломомь Дону.
23 Уже соколома крильца припѣшали
24 поганыхъ саблями,
25 а самую опустоша
26 въ путины желѣзны.
27 Темно бо бѣ въ ѓ день:
28 два солнца помѣркаста,
29 оба багряная стѣпа погасоста
30 и съ нимъ молодая мѣсяца,
31 Олегъ и Святѣславъ,
32 тьмою ся поволокоста.
33 На рѣцѣ на Каялѣ тьма свѣтъ покрыла,
34 по Руской земли построшася половци,
35 аки пардуже гнѣздо
36 и въ морѣ погрузиста

17 Kaj diris la bojaroj al la princo:
18 «Princo, la aflikto vian menson kaptis,
19 tio estis ja du falkoj forflugintaj
20 de la patra trono ora
21 por konkeri la urbon Tamatarkano
22 aŭ per la kasko trinki el Dono.
23 Jam al la falkoj la flugilojn oni senflugigis
24 per la sabroj de paganoj
25 jam la falkojn oni ligis
26 per ligiloj feraj.
27 Ja mallumo estis en la 3-a tago:
28 du sunoj malheliĝis,
29 ambaŭ purpuraj kolonoj estingiĝis
30 kaj kun ili la du junaj lunoj,
31 Olgo kaj Svetoslavo,
32 per mallumo vualiĝis.
33 ĉe Kajalo-rivero la mallumo kovris la lumon,
34 tra la Rusa lando storniĝis la kipĉakoj,
35 kiel geparda aro,
36 kaj en la maron sinkis

37 и великое буйство подасть хинови.
38 Уже снесся хула на хвалу,
39 уже тресну нужда на волю,
40 уже връжеся дивъ на землю.
41 Се бо готскія красныя дѣвы
42 въспѣша на брежѣ синему морю
43 звоня рускымъ златомъ
44 поють время бусово
45 лелѣють месть Шароканю.
46 А мы уже, дружина, жадни веселия».

12. Золотое слово Святослава

01 Тогда великій Святъславъ
02 изрони злато слово слъзами смѣшено
03 и рече:
04 «О моя сыновчя, Игорю и Всеволоде!
05 Рано еста начала
06 Половецкую землю мечи цвѣлити
07 а себѣ славы искати.
08 Нъ не честно одолѣсте

37 kaj grandan furiozon estigis en la ĥinoj.
38 Jam la mallaŭdo leviĝis sur la gloron,
39 jam la perforto frapis la liberon,
40 jam Divo falis sur la teron.
41 Jen la belaj junulinoj gotaj
42 ekkantis sur la bordo de la blua maro
43 tintante per la rusa oro
44 ili prikantas la boat-epokon
45 ili vartas venĝon Ŝarokanan.
46 Kaj ni, la kompanio, malhavas jam gajon».

12. La ora parolo de Svetoslavo

01 Tiam la ĉefprinco Svetoslavo
02 eligis oran parolon kun larmoj miksitan
03 kaj li diris:
04 «Ho miaj nevoj, Igoro kaj Vsevolodo!
05 Frue vi komencis
06 la Kipĉakan landon per la glavo inciti
07 kaj por vi gloron serĉi.
08 Sed ne venkis vi laŭhonore

09 не честно бо кровь поганую проліясте.
10 Ваю храбрая сердца
11 въ жестоцемъ харалузѣ скована
12 а въ буести закалена,
13 се ли створисте моей сребреней сѣдинѣ?
14 А уже не вижду власти
15 сильного, и богатаго, и многовоя
16 брата моего Ярослава,
17 съ черниговскими былями,
18 съ могуты,
19 и съ татраны,
20 и съ шельбиры,
21 и съ топчакы,
22 и съ ревугы,
23 и съ ольберы.
24 Тѣи бо бес щитовъ съ засапожники
25 кликомъ плѣкы побѣждають,
26 звонячи въ прадѣдную славу.
27 Нѣ рекосте: „Мужаимѣся сами
28 предную славу сами похытимъ,

09 ĉar ne honore la sangon paganan vi verŝis.
10 Viaj kuraĝaj koroj
11 en firma karolidaĵo forĝitaj
12 kaj en furiozo harditaj,
13 kion faris vi al mia kapo arĝentogriza?
14 Kaj ne plu mi vidas la potencon
15 de l' forta kaj riĉa kaj multetrupa
16 frato mia Jaroslavo,
17 kun la ĉernigovaj bojaroj
18 kun la moŝtuloj
19 kaj kun *tatranoj*
20 kaj kun *ŝelbiroj*
21 kaj kun *topĉakoj*
22 kaj kun *revugoj*
23 kaj kun *olberoj*.
24 Ja tiuj sen ŝildoj, kun botponardoj
25 per bataalkrio trupojn venkas
26 sonorigante la praavan gloron.
27 Sed vi du diris: „Ni meme produ;
28 la antaŭan gloron meme ni subtenu,

29 а заднюю си сами подѣлимъ!”
30 А чи диво ся, братіе, стару помолодити
31 Коли соколь въ мытехъ бываетъ,
32 высоко птицъ възбиваетъ:
33 не дасть гнѣзда своего въ обиду.
34 Нъ се зло — княже ми непособіе:
35 наниче ся години обратиша».

13. Призыв к князьям

01 Се у Римъ кричатъ
подъ саблями половецкими
02 а Володимиръ подъ ранами
03 Туга и тоска сыну Глебову!
04 Великий княже Всеволоде!
05 Не мыслію ти прелетѣти издалеча
06 отня злата стола поблюсти!
07 Ты бо можеша Волгу веслы раскропити,
08 а Донъ шелома выльяти!
09 Аже бы ты былъ,
10 то была бы чага по ногатъ,

29 kaj la postan ni mem dividu!"
? 30 Kaj ĉu mirinda estus, fratoj, ke
maljunulo rejuniĝu?
31 Ja eĉ la plumaron ŝanĝanta,
32 alten la falko forbatas la birdojn
33 kaj sian neston ĝi ne lasas malrespekti.
34 Sed jen malbeno: de l' princoj al mi nehelpemo;
35 la jaroj sin reversen turnis».

13. Voko al la princoj

1, 01 Jen rimovanoj ĝemegas
sub la sabroj kipĉakaj
02 kaj Vladimiro vunditas;
03 dolore kaj vee al la Glebido!
04 Ho ĉefprinco Vsevolodo!
05 Ne pense vi devus alflugos el via malproksimo
06 la patran oran tronon defendi!
07 Ja Volgon vi povas per viaj remiloj displaŭdi,
08 kaj la tutan Donon per la kaskoj elĉerpi!
09 Se estus vi «ĉi tie»
10 sklavinojn oni vendus po groŝo

11 а кощей по резанѣ.
12 Ты бо можеши посуху
13 живыми шерешеры стрѣляти
14 удалыми сыны Глѣбовы.
15 Ты, буй Рюриче, и Давыде!
16 Не ваю ли «вои»
17 злаченными шеломы по крови плаваша?
18 Не ваю ли храбрая дружина
19 рыкають акы тури,
20 ранены саблями калеными
21 на полѣ незнаемѣ?
22 Вступита, господина, въ злата стремя
23 за обиду сего времени,
24 за землю Рускую,
25 за раны Игоревы,
26 буюго Святъславича!
27 Галичкы Осмомыслѣ Ярославе!
28 Высоко сѣдиши
29 на своемъ златокованнѣмъ столѣ,
30 подперъ горы Угорскыи

11 kaj sklavojn, po duongroŝo.
12 ĉar sur la seka grundo vi povas
13 per vivaj ŝereŝiroj pafi
14 fare de la bravaj Glebidoj.
15 Vi, ho batalema Ruriko, kaj Davido!
16 Ĉu ne la viaj
17 per la orumitaj kaskoj en la sango sin banis?
18 Ĉu ne viaj du bravaj kompanioj
19 blekegas kiel uroj
20 vunditaj per sabroj harditaj
21 en kampo nekonata?
22 Vin levu, sinjoroj, en la oran piedingon,
23 pro la ofendo ĉi tempa
24 pro la lando Rusa,
25 pro la vundoj de Igoro,
26 de la batalema Svetoslavido!
27 Jaroslavo la Okpensa de Galiĉo!
28 Alte vi sidas
29 sur via orforĝita trono
30 la montaron hungaran vi fermis

31 своими желѣзными плѣкы,
32 заступивъ Королеви путь,
33 затворивъ Дунаю ворота,
34 меча времени чрезъ облаки,
35 суды ряда до Дуная.
36 Грозы твоя по землямъ текутъ,
37 отворяеши Кіеву врата,
38 стрѣляеши съ отня злата стола
39 салтъани за землями
40 стрѣляй, господине, Кончака,
41 поганого кощея,
42 за землю Рускую,
43 за раны Игоревы,
44 буюго Святъславича!
45 А ты, буй Романе, и Мстиславе!
46 Храбрая мысль носить васъ умъ на дѣло.
47 Высоко плаваеши на дѣло въ буести,
48 яко соколъ на вѣтрехъ ширяся
49 хотя птицю въ буйствѣ одолѣти.
50 Суть бо у ваю желѣзныи папорзи

31 per viaj feraj rotoj,
32 barinte la vojon al la reĝo,
33 ŝlosinte al Danubo la pordegon,
34 ĵetante pezaĵojn tra la nubojn,
35 administrante juĝon ĝis Danubo.
36 Viaj timindaĵoj fluas tra la landoj
37 vi malfermas la pordegojn de Kievo,
38 vi turnas la armilojn de via patra ora trono
39 kontraŭ sultanoj translandaj;
40 turnu viajn armilojn, sinjoro, kontraŭ Konĉako,
41 la pagana hundo,
42 pro la lando Rusa,
43 pro la vundoj de Igoro,
44 de la batalema Svetoslavido!
45 Kaj vi, ho batalema Romano, kaj Mstislavo!
46 Aŭdaca penso puŝas animon vian al la faro;
47 vi alte flugas al la faro en la furiozo,
48 kiel falko sur la ventoj sterniĝanta
49 por birdon en freneza lukto venki.
50 ĉar ferajn brustkirasojn vi havas

51 sub la kasko latina.
52 De ili ektremis la tero, kaj multaj popoloj —
53 la ĥinoj, la litovoj, la jatvingoj, la deremeloj
54 kaj la kipĉakoj siajn lancojn forlasis
55 kaj sian kapon klinis
56 sub tiujn glavojn Karolidajn.

57 Sed nun, princo, al Igoro
la suna lumo malheliĝis,
58 kaj ne pro bono falis de la arbo ĝia foliaro:

59 ĉe Rosjo kaj Sulao la urboj estas dividitaj,
60 sed la bravan trupon de Igoro ne revivigi!

61 Dono vin, princo, vokas,
62 kaj la princojn instigas al venko.

63 La Olgidoj, la bravaj princoj,
al la batalo ne malfruis ...

64 Ho Ingvaro kaj Vsevolodo,
65 kaj ĉiuj tri Mstislavidoj,
66 el neaĉa nesto falkoj sesflugilaj!

67 Ne al militŝanco
vi ŝuldas viajn posedaĵojn!

68 Кое ваши златыи шеломы
69 и сулицы ляцкіи
70 и щиты?
71 Загородите полю ворота
своими острыми стрѣлам
72 за землю Рускую,
73 за раны Игоревы,
74 буюго Святъславича!

14. Дума об Изяславе Полоцком

01 Уже бо Сула не течеть серебряными струями
02 къ граду Переяславлю
03 и Двина болотомъ течеть
04 онымъ грознымъ полочаномъ
05 подъ кликомъ поганныхъ.
06 Единъ же Изяславъ, сынъ Васильковъ,
07 позвони своими острыми мечи
08 о шеломы литовскія,
09 притрепа славу дѣду своему Всеславу,

68 Kie do estas viaj oraj kaskoj
69 kaj la ĵetlancoj pollandaj,
70 kaj la ŝildoj?
71 Baru la pordegon antaŭ la stepo
n per viaj akraj sagoj
72 pro la lando Rusa,
73 pro la vundoj de Igoro,
74 de la batalema Svetoslavido!

14. Ekskurso pri Izeslavo de Polocko

01 Ĉar Sulao siajn silkajn striojn jam ne fluigas
02 al la urbo Perejaslavlo
03 kaj Daŭgavo fluas putre
04 al tiuj timindaj polockanoj
05 sub la batalkrioj de l' paganoj.
06 Do, sola Izeslavo filo de Bazilo
07 tintigis siajn akrajn glavojn
08 kontraŭ la kaskoj litovaj,
09 forfrapis li la gloron de sia avo Vseslavo,

10 а самъ подъ чрълеными щиты
11 на кровавѣ травѣ
12 притрепанъ литовскими мечи.
13 И схоти ю на кровать, и рекъ:
14 «Дружину твою, княже,
15 птиць крилы приодѣ,
16 а звѣри кровь полизаша».
17 Не бысть ту брата Брячеслава
18 ни другаго — Всеволода.
19 Единъ же изрони жемчюжну душу
20 изъ храбра тѣла
21 чресь злато ожереліе.
22 Унылы голоси, пониче веселіе,
23 трубы трубятъ Городеньскіи ...
24 Ярославѣ и вси внуци Всеслави!
25 Уже понизите стязи свои,
26 вонзите свои мечи вережени.
27 Уже бо выскочисте изъ дѣдней славы,
28 вы бо своими крамолами
29 начясте наводити поганя

10 kaj mem, sub la ruĝaj ŝildoj,
11 sur la sanga herbo,
12 frapita«s» de litovaj glavoj.

13 Eliras lia juna sango kaj li diras:
14 «Vian kompanion, princo,
15 birdaro je siaj flugiloj vestis
16 kaj bestoj lekis ĝian sangon».

17 De tie foris la frato Breĉislavo,
18 forestis la alia, Vsevolodo;
19 sola li ellasis la perlan animon
20 el la kuraĝa korpo
21 tra la ora kolumo.

22 Malgajiĝis la voĉoj, la ĝojo estingiĝis,
23 trumpetas en Gorodno la trumpetoj ...

24 Ho vi, praidoj de Jaroslavo kaj de Vseslavo!
25 Mallevu do viajn standardojn,
26 plantu viajn glavojn agacitajn.
27 Ĉar la prapatran gloron vi jam perdis,
28 ĉar per viaj malakordoj
29 komencis vi venigi la paganojn

30 на землю Рускую,
31 на жизнь Всеславлю
32 которое бо бѣше насиліе
33 отъ земли Половецкыи!

15. Дума о Всеславе Полоцком

01 На седьмомъ вѣцѣ Трояни
02 връже Всеславъ жребій
03 о дѣвицю себѣ любу.
04 Тѣй клюками подпрѣся о кони
05 и скочи къ граду Києву
06 и дотчеся стружіемъ
07 злата стола Кіевскаго.
08 Скочи отъ нихъ лютымъ звѣремъ
09 въ плъночи изъ Бѣла-града,
10 обѣсися синѣ мѣглѣ
11 утрѣ же воззни стрикусы
12 оттвори врата Нову-граду,
13 разшибе славу Ярославу,

30 en la landon Rusan,
31 en la posedaĵon Vseslavan;
32 ĉar per malakordo estiĝis la perforto
33 fare de la lando Kipĉaka!

15. Ekskurso pri Vseslavo de Polocko

01 En la sepa periodo de Trojano
02 lotis Vseslavo
03 pri junulino de li dezirata;
04 per artifikoj li sin apogis je ĉevaloj
05 kaj saltis al la urbo Kievo
06 kaj tuŝis per la lancpintingo
07 la oran tronon Kievan.
08 De ili kiel linko saltis li
09 el Belgorodo en profunda nokto
10 sin envolvinte en nebulon bluan;
11 elŝiris da bonŝanco li tri pecojn:
12 malfermis la pordegon de Novgorodo,
13 disbatis la gloron de Jaroslavo,

14 скочи влъкомъ до Немиги съ Дудутокъ.
15 На Немизѣ снопы стелють головами,
16 молотятъ че́пи харалужными,
17 на тоцѣ животъ кладуть,
18 вѣють душу отъ тѣла.
19 Немизѣ кровави брезѣ
20 не бологомъ бяхуть посѣяни —
21 посѣяни костыми русскихъ сыновъ.
22 Всеславъ князь людемъ судяше,
23 княземъ грады рядяше,
24 а самъ въ ночь влъкомъ рыскаше:
25 изъ Кыева дорискаше
 до Куръ Тмутороканя
26 великому Хрьсови влъкомъ путь прерыскаше.
27 Тому въ Полотскѣ позвониша
 заутренюю рано
28 у Святыя Софеи въ колоколы,
29 а онъ въ Киевѣ звонъ слыша.
30 Аще и вѣща душа въ друзѣ тѣлѣ,

14 lupe saltis al Nemigo de Dudutkoj.
15 Ĉe Nemigo homkapajn garbojn oni sternas,
16 per draŝiloj Karolidaj oni draŝas,
17 sur la draŝejon la vivon oni metas,
18 la animon oni ventumas disde l' korpo.
19 De Nemigo la sangaj bordoj
20 ne bonorde estas prisemitaj,
21 prisemitaj je la ostoj de la rusaj filoj.
22 Vseslavo-princo la homojn juĝis,
23 al la princoj urbojn distribuis,
24 kaj mem dumnokte li vagadis lupe:
25 Tamatarkanon el Kievo li altrotis
а, antaŭ la kokkrio
26 de l' granda Ĥors' la vojon lupe transkurante;
27 en lia Polocko la matenlaŭdon sonoris
frumatene
28 la sonoriloj de l' Sankta Sofio,
29 kaj en Kievo li la sonoradon aŭdis.
30 Kvankam superscian animon
en alia korpo li havis,

31 нь часто бѣды страдаше.
32 Тому вѣщій Боянь
33 и прѣвое припѣвку, смысленый, рече:
34 «Ни хытру, ни горазду,
35 ни птицю горазду
36 суда Божіа не минути».
37 О, стонати Руской земли,
38 помянувши прѣвую годину
39 и прѣвыхъ князей!
40 Того старого Владиміра
41 не льзѣ бѣ пригвоздити къ горамъ Кіевскимъ
42 сего бо нынѣ сташа стязи Рюриковы,
43 а друзіи — Давидовы,
44 нь розно
45 ся имъ хоботы пашуть,
46 копіа поють!

16. Плач Ярославны

01 На Дунаи Ярославнинѣ гласъ слышитъ,

31 sed ofte li misŝancon spertis.
32 Tial la superscia Bojano
33 jam dekomence, la sagaca, sentencis:
34 «Nek ruzan, nek lertan,
35 nek sorĉulon spertan
36 la juĝo Dia preterpasos».
37 Ho, veiga estas por la Rusa lando
38 la rememoro pri l' unua tempo,
39 kaj pri la unuaj princoj!
40 Ja tiun malnovan Vladimiron
41 neniu povis al la montetoj Kievaj alforĝi;
42 do, nun la liaj iĝis parte la standardoj de Ruriko,
43 kaj parte, de Davido.
44 Sed malakorde
45 iliaj flagovostoj flirtas,
46 la lancoj kantas!

16. Lamento de Jaroslavidino

01 La voĉo Jaroslavidina ĉe Danubo
aŭdiĝas,

02 зегзицею, незнаемъ, рано кычетъ:
03 «Полечю, — рече, — зегзицею по Дунаеви,
04 омочю бебрянъ рукавъ въ Каялѣ рѣцѣ,
05 утру князю кровавыя его раны
06 на жестоцѣмъ его тѣлѣ».

07 Ярославна рано плачетъ
08 въ Путивлѣ на забралѣ, а ркучи:
09 «О вѣтрѣ, вѣтрило!
10 Чему, господине, насильно вѣши?
11 Чему мычеша хиновскыя стрѣлки
12 на своею нетрудную крилцю
13 на моя лады вои?

14 Мало ли ти бѣшетъ горѣ подѣ облакы
вѣяти
15 лелѣючи корабли на синѣ морѣ?
16 Чему, господине, мое веселіе
17 по ковылію развѣя?»

18 Ярославна рано плачетъ
19 Путивлю городу на заборолѣ, а ркучи:
20 «О Днепре Словутицю!

02 meve, nekonata, ĝi ĝemas frumatene:
03 «Laŭ Danubo», ĝi diras, «miflugos kiel mevo,
04 la batistan trempos mi manikon en Kajal-rivero,
05 liajn sangajn vundojn mi viŝos al la princo
06 sur lia korpo fortika».

07 Jaroslavidino frumatene ploras
08 en Putivlo sur la urbmuŝego, kaj ŝi diras:
09 «Ho vi vent' ventulo!
10 Kial, sinjoro, kontraŭen vi blovas?
11 Kial portas vi la ĥinajn sagetojn
12 sur viaj facilaj flugiloj
13 kontraŭ la batalistoj de mia eĉjo?
14 Ĉu ne sufiĉas al vi supre sub la nuboj
blovi,
15 ŝipojn lulante sur la blua maro?
16 Kial, sinjoro, mian ĝojon
17 sur la stepa stipo vi dispelis?»

18 Jaroslavidino frumatene ploras
19 en Putivlo sur la mur' de l' urbo, kaj ŝi diras:
20 «Ho vi Dnepro la Slavido!

21 Ты пробилъ еси каменные горы
22 сквозъ землю Половецкую
23 ты лелѣялъ еси на себѣ Святослави носады
24 до плъку Кобякова
25 възлелѣй, господине, мою ладу къ мнѣ,
26 а быхъ не слала къ нему слезъ
27 на море рано».
28 Ярославна рано плачетъ
29 къ Путивлѣ на забралѣ, а ркучи:
30 «Свѣтлое и тресвѣтлое слънце!
31 Всѣмъ тепло и красно еси.
32 Чему, господине, простре горячую свою лучю
33 на ладѣ вои?
34 Въ полѣ безводнѣ жажду
имъ лучи съпряж
35 тугою имъ тули затче?»

21 Vi trabatis la rokojn ŝtonajn
22 tra la lando Kipĉaka;
23 milde vi sur vi forlulis la boatojn Svetoslavajn
24 ĝis la trupo de Kobako;
25 alportu, sinjoro, al mi milde mian eĉjon,
26 por ke mi ne sendu al li larmojn
27 al la maro frumatene».
28 Jaroslavidino frumatene ploras
29 en Putivlo sur la urbmurego, kaj ŝi diras:
30 «Ho vi hela kaj trioble hela suno!
31 Bela kaj varma vi estas por ĉiuj.
32 Kial, sinjoro, vian brulan radion vi etendis
33 sur la batalistojn de mia eĉjo,
34 en la step' senakva, per soif'
e, iliajn arkojn malstreĉis,
35 per ĉagreno iliajn saguojn fermis?»

*Часть третья. Возвращение
Игоря*

17. Побег

- 01 Прысну море полунощи,
02 идуть сморци мглами.
03 Игореви князю Богъ путь кажетъ
04 изъ земли Половецкой
05 на землю Рускую,
06 къ отню злату столу.
07 Погасоша вечеру зари.
08 Игорь спить,
09 Игорь бдитъ,
10 Игорь мыслию поля мѣритъ
11 отъ великаго Дона
до малаго Донца
12 Комонь^{нъ} въ полуночи Овлуръ
свисну за рѣкон
13 велить князю разумѣти:
14 князю Игорю не быть!

Parto tria. La reveno de Igoro

17. La fuĝo

- 01 Ekŝaŭmis la maro noktomeze,
02 la kirloj kuras nebule.
03 Dio al Igoro-princo la vojon montras
04 el la lando Kipĉaka
05 en la landon Rusan
06 al la patra ora trono.
07 Estingiĝis la vesperruĝo,
08 Igoro dormas,
09 Igoro maldormas,
10 Igoro per la penso la stepon mezuras
11 de la granda Dono
a. 11 ĝis la malgranda Doneto.
12 Surĉevala, noktomeze Ovluro
o, 12 fajfis trans la rivero,
13 al la princo li komprenigas:
14 princo Igoro ne estu!

15 Кликну,
16 стукну земля,
17 въшумѣ трава,
18 вежи ся половецкіи подвизашася.
19 А Игорь князь поскочи
20 горностаемъ къ тростію
21 и бѣлымъ гоголемъ на воду.
22 Въврѣжесе на брѣзъ комонь
23 и скочи съ него бусымъ волкомъ.
24 И потече къ лугу Донца,
25 и полетѣ соколомъ подъ мъглами,
26 избивая гуси и лебеди
27 завтраку,
28 и обѣду,
29 и ужинѣ.
30 Коли Игорь соколомъ полетѣ,
31 тогда Влуръ влъкомъ потече,
32 труся собою студеную росу:
33 претръгоста бо своя брѣзая комоня.

15 Vokis,
16 ekpuŝis la tero,
17 susuris la herbo,
18 la tendoj kipĉakaj ekmoviĝis;
19 kaj princo Igoro impetis
20 kiel ermeno al la kandensejo,
21 kiel klangulo blanka, sur la akvon.
22 Saltis li sur la rapidan ĉevalon
23 kaj de ĝi desaltis kiel griza lupoj;
24 kaj kuris li al la herbeja bordo de Doneto,
25 kaj flugis kiel falko sub la nuboj
26 debatante anserojn kaj cigojn
27 por la matena
28 kaj por la taga
29 kaj por la vespera manĝoj.
30 Kiam Igoro falke ekflugis,
31 tiam Ovluro lupe ekkuris,
32 deskuante la malvarman roson;
33 ĉar siajn rapidajn ĉevalojn ili pelkonsumis.

18. Донец-река

- 01 Донецъ рече:
02 «Княже Игорю!
03 Не мало ти величія,
04 а Кончаку нелюбія,
05 а Руской земли веселіа!»
06 Игорь рече:
07 «О Донче!
08 не мало ти величія,
09 лелѣявшу князя на вльнахъ,
10 стлавшу ему зелѣну траву
11 на своихъ сребреныхъ брезѣхъ,
12 одѣвавшу его теплыми мъглами
13 подъ сѣнію зелену древу
14 стрешаше е҃го гоголемъ на водѣ,
15 чайцами на струяхъ,
16 чрънядьми на ветрѣхъ.

17 Не тако ли, — рече, — рѣка Стugna:

18. *La rivero Doneto*

01 Doneto diris:
02 «Princo Igoro!
03 Nemalmulte al vi da grandeco,
04 kaj al Konĉako, da malamo,
05 kaj al la Rusa lando, da ĝojo!»
06 Igoro diris:
07 «Ho Doneto!
08 Nemalmulte al vi da grandeco,
09 al vi kiu portis princon sur viaj ondoj;
10 sternis por li la verdan herbon
11 sur viaj arĝentaj bordo;
12 vestis lin per varma nebulo
13 sub la ŝirmo de arbo verda;
14 gvatgardis lin per la klangulo sur la akvo,
15 per la vaneloj, sur la strioj,
16 per la anasoj, sur la ventoj.
17 Ja ne tiel, — li diris, — estis
pri la rivero Stugno,

18 ху́ду струю́ имѣя,
19 пожръши чужи ручьи и стру́гы
20 ро́стре на кусту́
21 уно́шу кня́зю Ростисла́ву затвори́
22 Днѣ́пръ темнѣ́ березѣ́.
23 Пла́чется ма́ти Ростисла́вля
24 по уно́ши кня́зи Ростисла́вѣ́.
25 Уны́ша цвѣ́ты жало́бою,
26 и дре́во стуго́ю къ землѣ́ прѣ́клонило́ся»».

19. Погоня

01 А не соро́кы втроско́таша —
02 на слѣ́ду Игоре́вѣ́ ѣзди́тъ Гза́къ съ
Конча́комъ.
03 Тогда́ врани́ не граа́хуть,
04 гали́ци помлѣ́коша,
05 соро́кы не троско́таша,
06 по лозі́ю ползо́ша то́лько.
07 Дятло́ве текто́мъ
08 пу́ть къ рѣ́цѣ́ кажу́тъ,

18 kiu magran fluon havante,
19 fremdajn torentojn kaj rojojn englutinte
20 larĝas ĉe la elfluejo;
21 la junulon princon Rastislavon ĝi enfermis
22 sur la fundo ĉe l' malhela bordo.
23 Plorkrias la patrin' de Rastislavo
24 pri l' junulo princo Rastislavo.
25 Pro kompato la floroj velkiĝis,
26 kaj la arbo afliktite al la tero kliniĝis».

19. La postkuro

01 Jen, ne pigoj ekkakis —
02 laŭ la spuro de Igoro Gza rajdas kun
Konĉako.
03 Tiam la korvoj ne grakis,
04 la monedoj eksilentis,
05 la pigoj ne krakis,
06 nur la kolubroj rampis.
07 La pegoj per sia frapado
08 la vojon al la rivero montras,

09 соловіи веселыми пѣснѣми
10 свѣтъ повѣдаютъ.
11 Млѣвить Гзакъ Кончакови:
12 «Аже соколъ къ гнѣзду летить,
13 соколича роstrѣляевѣ
14 своими злачеными стрѣлами».
15 Рече Кончакъ ко Гзѣ:
16 «Аже соколъ къ гнѣзду летить,
17 а вѣ соколца опутаевѣ
18 красною дивицею».
19 И рече Гзакъ къ Кончакови:
20 «Аже его опутаевѣ красною дѣвицею,
21 ни нама будетъ сокольца,
22 ни нама красны дѣвице,
23 то почнуть наю птици бити
24 въ полѣ Половецкомъ».

20. Игорь на Руси

01 Рекъ Боянъ и Ходына,
02 Святъславля пѣснотворца

09 la najtingaloj per gajaj kantoj
10 la helon anoncas.
11 Diras Gza al Konĉako:
12 «Se la falko al la nesto flugas,
13 la falkidon ni pafmortigos
14 per niaj sagoj orumitaj».
15 Diris Konĉako al Gza:
16 «Se la falko al la nesto flugas,
17 la falkidon ni ligos
18 per junulino bela».
19 Kaj diris Gza al Konĉako:
20 «Se la falketon ni ligos per bela junulino,
21 restos al ni nek la falketo,
22 nek la bela junulino;
23 tiam rekomencos la birdoj nin-du bati
24 en la stepo Kipĉaka».

20. Igoro en la Rusa lando

01 Diris Bojano kaj Ĥodino,
02 de Svetoslavo kantofaristoj

03 старого времени Ярославля,
04 Ольгова коганя хоти:
05 «Тяжко ти головы кромѣ плечю,
06 зло ти тѣлу кромѣ головы» —
07 Руской земли безъ Игоря.
08 Солнце свѣтитъ на небесѣ —
09 Игорь князь въ Руской земли.
10 Дѣвици поють на Дунаи —
11 выются голоси чрезъ море до Кіева.
12 Игорь ѣдетъ по Боричеву
13 къ святѣй Богородици Пирогощей.
14 Страны ради, гради весели.
15 Пѣвше пѣснь старымъ княземъ
16 а потомъ молодымъ пѣти:
17 Слава Игорю Святъславлича,
18 буй туру Всеволодѣ,
19 Владиміру Игоревичу!
20 Здрави князи и дружина,
21 побарая за христьяны
22 на поганья плѣки!

03 el la malnova tempo Jaroslava,
04 al la edzino de Olgo-hano:
05 «Aĉas al vi, kapo, sen la ŝultroj,
06 misas al vi, korpo, sen la kapo» —
07 tiel estas al la Rusa lando sen Igoro.
08 La sun' sur la ĉielo helas —
09 Igor-princo en la Rusa lando estas.
10 Junulinoj kantas ĉe Danubo —
11 la voĉoj trans la maro flirtas ĝis Kievo.
12 Igoro rajdas laŭ Boriĉevo
13 al la Sankta Dipatrino Pirogosĉa —
14 La vilaĝoj ĝojas, la urboj gajas.
15 Kantinte gloron al la grandaj princoj,
16 nun al la junaj oni kantu:
17 Gloron al Igoro Svetoslavido,
18 al la batalema uro Vsevolodo,
19 al Vladimiro Igorido.
20 Vivu la princoj kaj la kompanio,
21 batalanta por la kristanoj
22 kontraŭ la trupoj paganaj!

23 Княземъ слава а дружинѣ!

24 Аминь.

23 Al la princoj gloron kaj al la kompanio!

24 Amen.

Komentaro

Enhavtabelo

[1. La historia fono](#)

[2. Filologiaj aferoj](#)

[3. La notoj](#)

[Glosaro esperanta](#)

[Glosaro Malnovrusa-Esperanta](#)

[La mallongigoj uzitaj en la](#)

[Komentaro](#)

[Bibliografio](#)

1. La historia fono

Enhavtabelo

[1.1. Venigo de la varengo](#)

[1.2. Jaroslavo la Saĝa](#)

[1.3. La Jaroslavidoj kaj Vseslavo](#)

[1.4. La militoj de Olgo](#)

[PMI](#) referencas multajn eventojn el la historio de la avoj de la protagonistoj; por ilin kompreni, necesas scii pri tiuj eventoj kaj pri realaĵoj de la Kieva Regno. Tial ni donas skizon de ties historio antaŭ la jaro 1185^a.

1.1. Venigo de la varengo

Laŭ la [Komenca Kroniko](#), unu el la ĉefaj malnovrusaj kronikoj, la Rurikida dinastio estiĝis tiel:

En la jaro 6370^a (862 p.K.). Ili (la novgorodanoj) forpelis la varengojn trans la maron, sen doni al ili tributon, kaj komencis meme sin regi, kaj ne estis

inter ili justo, kaj leviĝis gento kontraŭ gento, kaj estis ĉe ili tumulto, kaj komencis ili inter si militi. Kaj ili diris inter si:

— Ni serĉu por ni princon, kiu nin regu kaj juĝu laŭ justo.

Kaj ili iris trans la maron al la varengoj, al la rusoj; ĉar tiuj varengoj nomiĝis rusoj, kiel aliaj nomiĝas svedoj, norvegoj, angloj, gotoj — tiel do ĉi tiuj.

Diris al la rusoj la ĉudoj «suom-estona tribo» kaj la slovenoj «orientslava tribo» kaj la kriviĉoj «orientslava tribo» kaj la vepsoj «suom-estona tribo, nun vepsoj»:

— Nia lando estas granda kaj abunda, sed en ĝi mankas ordo; do venu nin regi kaj estri.

Kaj troviĝis 3 fratoj kun siaj parencoj, ili kunprenis ĉiujn rusojn kaj venis: Ruriko, la plej aĝa, sin instalas en Novgorodo, la dua, Sineuso, en Beloozero «malnovrusa urbo en 9–14 jc», la tria, Truvoro, en Izborsko.

Post la morto de Ruriko (869 p.K.) regis lia parenco Olgo. Olgo konkeris Sjeverion kaj Kievon (882 p.K.), kiun li faris ĉefurbo de la regno. Tabelo I (pĝ 1) listigas la ĉefregantojn de La Kieva Regno ĝis 1185, kiam okazis la militiro de Igoro. PMI mencias nenion

eventon, okazintan antaŭ s-ta Vladimiro; sub tiu princo la kristanismo iĝis ŝtata religio (la baptado de s-ta Olga restis ŝia privata afero). Unu epizodo el la regado de s-ta Vladimiro estas menciita en III.7.70.

Listo de la ĉefregantoj de la Kieva Regno

1	Ruriko 1 ^a	862
2	Olgo, parenco (?) de Ruriko	879
3	Igoro 1 ^a Rurikido	913
4	S-ta Olga, vidvino de 1 ^a Igoro	945
5	Svętoslavo 1 ^a Igorido	964
6	Jaropolko 1 ^a Svętoslavido	973
7	S-ta Vladimiro Svętoslavido	980
8	Svętopolko 1 ^a la Malbenita	1015
9	Jaroslavo 1 ^a la Saĝa	1019

10	Izęslavo 1 ^a (dufoje forpelita)	1054–78
11	Vseslavo la Mago	1068 (7 monatoj)
12	Svętoslavo 2 ^a Jaroslavido	1073–76
13	Vsevolodo 1 ^a Jaroslavido	1078
14	Svętopolko 2 ^a Izęslavido	1093
15	Vladimiro 2 ^a Monomaĥo	1113
16	Mstislavo 1 ^a la Granda	1125
17	Jaropolko 2 ^a	1132
18	Vęęeslavo, nominala kunreganto	1137–54
19	Vsevolodo 2 ^a Olgido	1139
20	Igoro 2 ^a Olgido	1146


21	Izēslavo 2 ^a	1146–54
22	Georgo la Longbraka	1149–57

en Kievo:

en Vladimiro-Suzdalo:

23	Izēslavo 3 ^a	1157		
24	Rastislavo	1159		
25	Mstislavo 2 ^a	1167	23	Andreo de Bogolubovo 1157
26	Glebo	1169		
27	Jaroslavo 2 ^a	1172		
28	Romano	1174	24	Miĥaelo 1174
29	Svētoslavo 3 ^a	1176–94	25	Vsevolodo 3 ^a la Grand-nesta 1176–1212

Tiu tabelo estas iom simpligita. En la epoko de malordoj dum 30 jaroj (1146–76) sur la Kieva trono 28 fojojn okazis ŝanĝo de ĉefprinco.



Object 1

Îi-supra Figuro donas la genealogian arbon

de la ĉefregantoj kaj de la aliaj princoj, menciitaj en PMI. Kursive estas indikitaj la personoj menciitaj en PMI. La nomon de ĉefprincoj antaŭas numero, sube estas indikitaj la jaroj de ilia [seniorado](#); pri la ceteraj laŭeble estas indikita la mortojaro. Enkrampigita jaro indikas la jaron de la lasta mencio en la kronikoj (se la mortojaro ne estas konata).

1.2. Jaroslavo la Saĝa

Ĉi tiu filo de s-ta Vladimiro estis la lasta princo reginta la tutan Malnovrusan regnon; cetere ankaŭ li dum kelka tempo devis batali kontraŭ siaj fratoj, i.a. kontraŭ Mstislavo, menciita en PMI (1.18–19; kaj ĉi-sube, sekcio 2.7). Sola escepto estis Polockio (la nuna Bjelarusio), kiu iĝis domajno de la posteuloj de Izęslavo (frato de Jaroslavo), perdintaj la rajton je [seniorado](#).

1.3. La Jaroslavidoj kaj Vseslavo

Laŭ la *Komenca Kroniko*,

En la jaro 6552 (1044 p.K.)

... Samjare mortis Bręĉislavo, filo de Izęslavo, nepo de Vladimiro, la patro de Vseslavo, kaj Vseslavo lia filo sidiĝis sur lia trono, li kiun lia patrino naskis de sorĉo. Ĉar kiam la patrino lin naskis, li havis kufon sur la kapo, kaj diris magoj al lia patrino: «Tiun kufon ligu sur lin, li ĝin portu ĝis sia morto»; ĝin Vseslavo ĝis nun surhavas, tial senkompata li estas pri sangoverŝo.

En la jaro 1054 en Kievo mortis ĉefprinco Jaroslavo Vladimirido la Saĝa, lasinte 5 filojn:

1. *Izęslavo*, la plej aĝa, ricevis Kievon;
2. *Svętoslavo*, Ĉernogovon;
3. *Vsevolodo*, Perejaslavlon.

Du aliaj filoj, Igoro kaj Veĉęslavo, ricevis Vladimiron la Galiĉian kaj Smolenskon; Veĉęslavo baldaŭ mortis, kaj Igoro transiris al Smolensko, kie ankaŭ li mortis (1060). Ĉar tiuj du filoj neniam iĝis ĉefprincoj, ilia

postularo neniam povis pretendi je la Kieva trono.

La unua granda evento estis kuna ekspedicio en 1060 de la 3 Jaroslavidoj kontraŭ la torkoj, kiujn al la limoj de La Kieva Regno ĉe Sulaon pelis alia tjurka hordo, la kipĉakoj, ĵus aperintaj en la Stepo. La kronikisto konstatis venkon: «tiel Dio malbarbaris la kristanojn je la paganoj». Sed jam sekvajare la novaj mastroj de la Stepo provis sian forton, kaj la ĥano Sakal' venkis Vsevolodon Jaroslavidon. En 1064–66 du nepoj de Jaroslavo, orfo Rastislavo Vladimirido kaj Glebo Svętoslavido, konflikta pri Tamatarkano. Princo Glebo trifoje estis surtronigata en Tamatarkano kaj dufoje forpelata de tie; eble tial li volis iel fiksi sian nomon sur la fama Tamatarkana ŝtono en 1068, dum la lasta periodo de sia regado.

En 1065 Vseslavo de Polocko «komencis trupojn arigi». En 1066 «venis Vseslavo kaj prirabis Novgorodon» (la Grandan). En la frua printempo 1067 la Jaroslavidoj, venĝante Novgorodon, prirabis la sudan parton de Polockio kaj venkoprenis Minskon. Vseslavo atingis la Jaroslavidojn apud la urbo, ĉe la rivero Nemigo, kaj malvenkis je la 3 marto 1067. Julie la Jaroslavidoj perfide venigis al si Vseslavon, ĵurinte sur krucifikso ne fari al li malbonon. Arestinte Vseslavon ĉe Orŝo, ili lin sendis en Kievon kaj tie tenis kun liaj 2 filoj en senporda turo (MR по-рыбъ) dum 14 monatoj.

En 1068 okazis la unua grava invado de la kipĉakoj, kies kromefiko estis ŝanĝo sur la Kieva trono. En nokta batalo ĉe Perejaslavlo (sept. 1068) la kipĉakoj disbatis la trupojn de la Jaroslavidoj. La kievanoj postulis de la ĉefprinco Izęslavo ĉevalojn kaj armil-

ojn, tiu rifuzis, kaj la kievanoj, ekribelinte kontraŭ la ĉefprinco, igis lin fuĝi el Kievo. La popolo liberigis Izęslavon kaj proklamis lin princo de Kievo (15 sept. 1068).

1 nov. 1068 Svętoslavo Jaroslavido venkis la kipĉakojn apud Snovsko kaj kaptis ilian ĥanon Ŝarukanon. Tiu venko lin tre alitigis en la publika opinio. Sian filon Glebon li sukcesis instali en Novgorodo la Granda; la Tamatarkanan tronon ricevis lia filo Romano.

En 1069 Vseslavo forlasis la kievanojn ĉe Belgorodo sen batali kontraŭ la trupoj de Izęslavo kaj Boleslavo de Pollando:

Matene liaj homoj, vidante ke la princo fuĝis, revenis Kievon, faris popolkunvenon (вѣче) kaj sendis al Svętoslavo kaj Vsevolodo diri:

— Ni malbonaĵon faris, ke nian princon ni forpelis, kaj jen li venigas kontraŭ ni la polojn; venu en la urbon de via patro; se vi malvolos, nenio al ni restos krom forbruli nian urbon kaj iri en la Grekan

landon.

Kaj diris Svętoslavo:

— Ni sendos al nia frato; se li venos kun la poloj vin pereigi, ni iros kontraŭ lin milite, ĉar ni ne lasosperei la urbon de nia patro; se li volas veni pace, li venu kun malgranda [kompanio](#).

Kaj ili trankviligis la kievanojn. Svętoslavo kaj Vsevolodo sendis al Izęslavo diri:

— Vseslavo fuęis, ne venigu la polojn en Kievon, ĉar tie vi ne havas kontraŭulon; se tamen vi plu koleros kaj pereigos la urbon, tiam sciu, ke ni domaęos la patran tronon.

Izęslavo venis kun malmultaj poloj (inter ili Boleslavo), li ree ięis ĉefprinco kaj eĉ forpelis Vseslavon el lia Polocko. Tamen li, kaj precipe lia filo Mstislavo, venęis sian ekzilon al la kievanoj; multaj rufuęis ĉe Svętoslavo. Sub 1071 la kroniko raportas pri novaj bataloj de Vseslavo.

En 1073 Svętoslavo kun Vsevolodo forpelas Izęslavon, kiu volis aliancięi kun Vseslavo (?). Svętoslavo ięas ĉefprinco, «la timinda, la Kieva». La Kronika raporto pri la forpelo de

Izġslavo kaj la 4-jara regado de Svġtoslavo estas tre fragmenta, ege partia kaj certe retrospektiva, ĝi klare evidentigas postan redaktadon favore al Vsevolodo kaj liaj filoj. Laŭ la ordo, transirinte Kievon Svġtoslavo devus transdoni Ĉernigovon al Vsevolodo, tamen el la *Instruo de Monomaĥo* oni konkludas, ke Vsevolodo restis en Perejaslavlo. En 1076 la junaj princoj Vladimiro Monomaĥo Vsevolodido kaj Olgo Svġtoslavido ekspedicias kontraŭ la poloj.

27 dec. 1076, sekve de operacio por fortranĉi tumoron ((рѣзанье желве), mortas Svġtoslavo Jaroslavido, kaj dum duonjaro la ĉefprincan tronon okupas Vsevolodo (de 1 jan. 1077). Ni ne scias, kiu havis Ĉernigovon, sed je la 4^a de majo ĝin subite okupas iu Boriso. Vsevolodo kun siaj filoj post 8 tagoj forpelas Borison el Ĉernigovo, kaj tiu fuĝas

en Tamatarkanon.

Baldaŭ sciiĝis, ke la ekzilito Izęslavo revenas kun la polaj trupoj (same kiel en 1069) por rekonkeri Kievon. Vsevolodo agnoskis la rajton de la pli aĝa frato, cedis al li Kievon kaj ricevis Ĉernigovon. Tie ni retrovas Olgon Svętoslavidon, tamen lia statuso estas neklara. Tiel finiĝas la jaro 1077.

1.4. La militoj de Olgo

10 apr. 1078, post festeno kiun Vsevolodo kaj Monomaĥo aranĝis por sia duongastuonarestito, Olgo fuĝas en Tamatarkanon, al la frato Romano, kie jam estas Boriso; la 30^{an} de majo 1078 en la Novgoroda lando pereas mortigite Glebo (entombigita 23 jul. en Ĉernigov). La situacio en Ĉernigovo estas malklara. Olgo kaj Boriso jam tenis la urbon, sed ien foriris. La urbo ne malfermis la pordegon al la ĉefprinco, kaj Monomaĥo

komencis ĝin sieĝi, dum Izęslavo kaj Vsevolodo iris kontraŭ la revenantaj Boriso kaj Olgo.

3 okt. 1078 apud Ĉernigovo, sur «la Neĵatina Kampo» (на Нѣжатинѣ нивѣ; Neĵatino probable estas la nuna Neĵin), apud rivereto Kanino okazis batalo de Izęslavo kaj Vsevolodo kontraŭ Boriso kaj Olgo. En tiu batalo sub strangaj cirkonstancoj pereis ĉefprinco Izęslavo kaj Boriso:

Kaj diris Olgo al Boriso:

— Ne batalu ni kontraŭ ili, ne povas ni alfronti 4 princojn, sed sendu ni pacpeton al niaj onkloj.

Kaj diris al li Boriso:

— Vidu min preta, mi sola frontos kontraŭ ĉiuj.

Li multe sin gloris, ne sciante ke Dio malfavoras la fierulon, al la humila li donas gracon, por ke ne fanfaronu la forta pri sia forto.

Kaj ili du iris kontraŭe, kaj kiam ili estis ĉe la vilaĝo de Neĵatina Kampo, renkontiĝis la kontraŭuloj, kaj estis kruela batalo. Unua iĝis mortigita Boriso, filo de Veĉeslavo, multe sin glorinta; nu, Izęslavo staris inter infanterianoj, kaj subite alrajdis iu,

frapis lin de malantaŭe per lanco en la ŝultron. Tiel mortis Izęslavo, filo de Jaroslavo. La batalo pluis, kaj fuęis Olgo kun negranda kompanio, kaj apenaŭ eskapis, fuęis Tamatarkanon.

Princo Izęslavo ięis mortigita en la tria tago de oktobro. Kaj oni prenis lian korpon, ĝin transportis per boato ... kaj metinte lian korpon sur sledon, oni ĝin veturigis ... veis pri li la tuta urbo Kievo, kaj Jaropolko, irante post li, ploris kun sia kompanio:

— Patro, patro mia! Kiom vi vivis sen ĉagreno en tiu mondo, multe da batoj vi suferis, ankaŭ de la fratoj viaj. Kaj jen pereinta ne de frato, sed por frato vi forlasis vian vivon.

Do, Olgo fuęis reen al Tamatarkano; Vsevolodo ięis ĉefprinco, kaj Monomaĥo ricevis Ĉernigovon.

Venęante la malvenkon de sia frato, Romano sekvajare levis la kipĉakojn kontraŭ Vsevolodo, sed tiu faris pacon kun la kipĉakoj apud Perejaslavlo, ili turnis sin reen kaj 2 aŭg. 1079 mortigis Romanon (vd noton [1.19](#)); iuj *kozaroj* kaptis Olgon kaj deportis lin en Bizancion (tradicie oni opini-

as, ke temas pri ĥazaroj, kaj miras, kian rajton ili havis ekzili iun en Konstantinopolon; tamen Nikitin indikas [Nik84], ke tiel nomiĝis Bizanciaj sekretaj agentoj, kies servon povus profiti Vsevolodo, bofilo de la imperiestro).

Post 4 jaroj (1083) la situacio en Bizancio ŝanĝiĝis, Olgo fuĝis el Bizancio, revenis Tamatarkanon kaj dum 10 jaroj estis ties princo. Post la morto de Vsevolodo, en 1094, Olgo kun la kipĉakoj denove iris al Ĉernigovo, kaj Monomaĥo cedis al li la urbon. Ĉernigovio definitive iĝis la domajno de la Olgidoj.

2. Filologiaj aferoj

En la verko interplektiĝas la tradicioj orient-slava (folkloro, temaro), slavonbizancia (literaturo), skalda (sagaoj) kaj tjurka (folkloro).

2.1. La fontoj

La unua mencio pri PMI en la novrusa literaturo aperis en 1797, en la poemo «Vladimiro» de Ĥeraskov:

О древних лет певец, полночный Осиян!
В развалинах веков погребшийся Баян!
Тебя нам возвестил незнаемый Писатель,
Когда он был твоих напевов подражатель,
Так Игорева песнь изображает нам,
Что душу подавал Гомер твоим стихам;
В них слышны, кажется мне, песни соловьины,
Отважный львиный ход, парения орлины.
Ты, может быть, Баян, тому свидетель был,
Когда Владимир в Тавр закон принять ходил;
Твой дух ещё когда витает в здешнем мире,
Води моим пером, учи играть на лире ...

Tio estas,

Ho prakantisto, norda Osiano!
En la ruin' de l' temp' kaŝinta sin Bojano!
Al ni anoncas vin Aŭtoro nekonata
Per sia kant', laŭ l' via fasonata;
La kanto pri Igor' al ni prezentas tion,
Kiel Homer' al vi inspiris poezion .
En ĝi aŭdiĝas, ŝajne, kanto najtingala,

Aŭdaca kur' leona, agla ŝveb' egala.

Kaj eble estis vi en la Taŭrida iro,

Kie akceptis bapton Vladimiro;

Dum ne forlasis via ombro nian mondon,

Direktu mian plumon, streĉu liran kordon ...

Unue PMI eldoniĝis aŭtune de la jaro 1800^a, en novembro estis vendataj la unuaj ekzempleroj. La antaŭparolo indikis, ke

la originala manuskripto, laŭ ĝia skribmaniero, tre antikva, apartenas al la editoro, plenranga sekreta konsilisto kaj kavaliro, grafo Aleksio Musin-Puŝkin.

Do, Musin-Puŝkin.

2.2. La mistera historio de la manuskripto

(Eble iam mi rakontos pri tio...)

(...) Poste, travivinte la skuegojn de 1812–13, perdinte sian tutan kolekton da antikvaĵoj kaj la amatan filon, la 70-jara grafo, responde al insistaj demandoj de juna historiisto K. Kalajdoviĉ skribis en sia letero de 1813-12-31:

Antaŭ la transformo de la Jaroslavla monaĥejo de la S-ta Savanto en episkopan domon «1788», ĝin estris arkimandrito Joelo, viro klera kaj ŝatanta filologion; post la reformo li restis en tiu monaĥejo ĝis sia morto. En siaj lastaj jaroj li vivis malriĉe, tial mia komisiito aĉetis ĉiujn liajn librojn rusajn, inter kiuj en unu, registrita sub n-ro 323 kiel *Ĥronografo*, ĉe la fino troviĝis *La Parolo pri la militiro Igora* ...

«La manuskripto» estis skribita sur glacea papero, fine de kroniko, per sufiĉe klara skribo. Laŭ la skribmaniero kaj la papero la kopiadon endas dati per la fino de la 14^a aŭ per la komenco de la 15^a jc ... Dum mia servo en Peterburgo mi kelkajn jarojn okupiĝis pri analizo kaj traduko de tiu kanto en la nunan lingvon, tial ke kvankam ĝi estis skribita en sufiĉe klaraj literoj, tamen estis malfacile legebla, ĉar mankis ortografio, superliniaj signoj, disdivido de la vortoj, inter kiuj multaj estis nekonataj aŭ ne plu uzataj; antaŭ ĉio necesis dividi la tekston en periodojn kaj poste serĉi la sencon ...

La tekston verkis inter 1185 kaj 1187 nekonanta aŭtoro. Ĝia sola kopio (de la 16^a jc), publikigita en 1800, pereis en la Moskva brulego dum la Napoleona invado en 1812.

2.3. La prezento de la malnovrusa teksto

Estas pluraj restituoj de la teksto, el kiuj la plej uzataj estas tiuj de D.S. Liĥaĉov (multie, ekz-e [Liĥ84, Lied]) kaj R.O. Jakobson [Geste]; tamen en nia prezento de la malnovrusa teksto ni strebis kiel eble plej proksime sekvi la fonton, la Unuan Eldonon. Tial ni konscie lasis en la teksto la formojn erarajn, kiujn la unuaj editoroj honeste konservis en sia eldono (ekz-e *времены* anstataŭ la kontekste evidentan *бремены*). Nur tri eraroj, sendube ŝuldataj al la preseja koboldo, estas ĝustigitaj:

<i>Verso</i>	<i>Presite</i>	<i>Korektite</i>
02.11	Дону ввликаго	Дону великаго
12.01	Великій Святслаеъ	Великій Святславъ
15.22	Князвмъ грады	княземъ грады.

La tekstoaranĝo laŭas tiun de D.S. Liĥaĉov; ĝi reliefigas la sintaksan kaj intonacian

strukturen de PMI. La disdivido en partojn kaj epizodojn, same kiel ties titoloj, en la originalo malestas. Ĉiuj aldonoj en la teksto de PMI (la sekcititoloj, la konjektoj pri preterlasitaj vortoj) estas en kursivo.

2.3. La miksitaj paĝoj

Pri multaj malnovrusaj tekstoj okazis afero bone konata en paleografio: la manuskriptoj kadukiĝadis, iliaj folioj elfaladis kaj ne ĉiam estis remetataj en la ĝustan lokon aŭ eĉ tute perdiĝis; la Evangelio laŭ Johano prezentas plurajn ekzemplojn pri tia konfuzita ordo.

Ankaŭ pri PMI oni suspektas tian konfuzon. Tre multaj fakuloj akceptas la permuton indikitan ĉe III.2; preskaŭ ĉiuj konsentas pri la neceso permuti 11.30–31. La plej radikal-an rearanĝon proponis B. Ribakov [Rib71], kiu jene restituas la tekston:

(1. Enkonduko:) 1.1–25;

(2. La militiro Igora:) 1.26–33; 2.17–25; 2.1–16; 4.1–6.39; 8.1–26; 11.27–46; 13.57–63??.

(3. La ora parolo:) 12.1–14; 12.28–13.3; 12.15–27; 13.4–56; 13.64–75.

(4. La bataloj de la komenca tempo:) 14.1–32; 9.8–14; 15.1–36; 7.1–30; 15.37–39; «la perdita folio» kaj 15.40–46.

(Lamento de Jaroslavido ktp — senŝanĝe) 16.1–20.24.

2.4. Kiam PMI estis verkita

La historiaj eventoj ebligas tre precize dati la Parolon [Rib72, pĝ 405]: tia voko al kuna ago de ĉiuj princoj estis urĝe bezonata somere kaj aŭtune de 1185, en la situacio de ekstera danĝero kaj interna malakordo; ĝi estus senutila en 1186, kiam oni ne plu parolis pri la kipĉakoj, kaj kiam la tutan jaron la kronikisto resumis per unu sola frazo pri la Anunciacia kirko, konstruita de Svętoslavo en Ĉernigovo. Ankaŭ la sekva jaro 1187, la lasta el la eblaj, estas malprobabla, ĉar en PMI malestas voko al Vladimiro Gleb-

ido de Perejaslavlo, vundita en majo–junio 1185 (13.1–3): en 1187 Vladimiro jam juĝis sin kapabla partopreni ekspedicion, tamen survoje, la 18^{an} de aprilo, li mortis; nu, PMI lin mencias viva, ĝemanta sub la vundoj.

«Ni devas prezenti al ni la aferon tiel. Svętoslavo Vsevolodido kaj Ruriko Rastislavido, akceptinte Igoron en Kievo, kunvenigis princojn aŭ iliajn reprezentantojn por decidi en tiu konferenco tutregnajn problemojn pri la defendo kontraŭ Konĉaĥo kaj helpo al la mafeliĉa Sjeverio. Post la diplomatia traktado fare de la princoj, dum adiaŭa festeno, probable estis prezentita la granda poemo, kiu devis mildigi la korojn de la malamikoj de Igoro kaj decidigi la princojn bari la pordegon antaŭ la Stepo <13.72>. — Fine de la poemo la aŭtoro akompanas Igoron sur lia vojo el Kievo <vd III.20.13>, lin adiaŭas. La misio de Svęto-

slavo kaj Ruriko, kiom ni povas juĝi, sukcesis: la petita helpo, evidente, realiĝis, ĉar dum la tuta 1186 Konĉako ne aŭdacis invadi la Kievan Regnon, kaj en 1187 la rusaj princoj mem ekspediciis en la Stepon» [Rib72].

2.5. La nomsistemo

2.5.1. La personaj nomoj

Ofte princo havis plurajn nomojn, el kiuj speciale menciindas baptonomo (el la kristana, t.e. hebrea-greka-latina nomaro), princa nomo (княже имя, slava aŭ varenga); iam en la familio estis uzataj ankaŭ aliaj kromnomoj. Ekz-e, la protagonisto de PMI havis la princan nomon Igoro, la baptonomon Georgo; la princo Vladimiro el 7.11 estis baptita Bazilo, lia greka patrino nomis lin Monomaĥo (tiun unikan nomon preferas la historiistoj).

La patronomoj estis komuna trajto de la

kutimoj slavaj, varengaj, grekaj, hebreaj kaj islamaj; por ĉi tiu verko ni opinias konvena traduki ilin per la esperanta sufikso *-id*. La responda malnovrusa sufikso -ич en la koncerna epoko estis multe pli viva kaj aktiva ol nune; sentraduke la versoj kia ekz-e «Амбаў ni estas Svętoslavidoj!» bezonus apartan klarigon.

La virinoj certe havis sian propran baptonomon, tamen nemalsimile al la tradicio latina oni ofte uzis ilian patronomon: Glebidino (Глѣбовна, 6.38), Jaroslavidino (Ярославна, 16.1).

2.5.2. La loknomoj

(Novgorodoj; Perejaslavloj; Vladimiroj; Doneco; Blanka Rusujo)

2.6. Transskribaj problemoj

La malnovrusa lingvo ankoraŭ havis la

kadukajn vokalojn ъ kaj ь; sekve, fine de la malnovrusaj Боянь, Донь, Киевь, Игорь estis prononcata malklara vokalo, kio estas kroma argumento por la asimilitaj formoj *Bojano, Dono, Kievo, Igoro* (definitive tiuj vokaloj perdiĝis poste, en la 13^a–14^a jc, doninte malsamajn formojn en la novrusa: Дон, Киев kaj en la ukraina nominativo: Дін, Київ; sed en la finaĵhavaj kazoj ankaŭ ukraine estas з Дону, у Києві, [Києве мій!](#)).

La nazajn vokalojn Ѧ [ɛ] kaj ѧ [ɔ] la malnovrusa lingvo en la 12^a jc jam perdis, kvankam ili ankoraŭ longe restis en la skribo; ĉar la koncernaj literoj aperas en pluraj nomoj (SvѦtoslavъ, VѦĉeslavъ, IzѦslavъ, BrѦĉislavъ), necesis decidi, kiel ilin transskribi. Mi volas doni al ĉiuj asimilitaj nomoj formon laŭeble universalan, taŭgan por prezenti diversajn variojn de unu sama nomo en diversaj epokoj kaj landoj, kaj ne tro mal-

kongruan al la esperanta sonsistemo. Tial mi konsideris la evoluon de tiuj vokaloj.

La vokalo Ŭ pli-malpli unuece ŝanĝiĝis en [u], kaj pri ĝi ne estas malfacilaĵoj; male, A en la orient-slavaj lingvoj iĝis я, kio rezultigas formojn kutime transskribatajn *Svjatoslav*, *Vjaĉeslav* ktp, kiuj en Esperanto aspektas malbele. La transskriboj mezgrekaj kaj mezlatinaj uzis *en*: Σφενδοσλάβος, **V**enceslaus, kio aspektas pli konvene (kp ankaŭ *varengo* ← варѠгъ); tamen ankoraŭ pli taŭga ni juĝis la transskribon per la nura *e*.

Oni povas rigardi ĝin lego malatentanta la diakritilon (tamen en la komentario ni lasas la vosteton: Svętoslavo ktp); puran E donis A en la Bulgara, serba-kroata (*Svetislav*, *knez* ktp) sporade en la ĉeĥa (Břetislav); malgraŭ la ortografio, multaj — eble eĉ la pliopo — de la modernaj rusoj prononcas,

kiel la bulgaroj, Veĉeslav, kaj sporade tiun formon la kronikoj atestas jam ĉ. 1150: «Хочешь ли Вечеславу честь учинить...» ktp [Rib72, pĝ 352]. Simile «по Резанской земле» en *Transdoneado* ktp.

Fakte la transskriboj «Vjaĉeslav» ktp estas pure skriba kodo: Esperanto ne havas molan [v']; kaj ĉe la laŭregula prononco de j en «svja», ĝi sonas pli malproksime de свя ol la laŭregula prononco de «sve». Simile sian akustikan percepton de la senakcenta А esprimis la polaj skribistoj: Р *Prypeć* (Р Припять, У Прип'ять), Р *wareg* ktp.

Apartan problemon prezentas la malnovrusa Г. En la novrusa ĝi identas kun la esperanta g, en la ukraina ĝi estas prononcata kiel voĉigita h, do samkiel en la ĉeĥa. Iuj fakuloj opinias, ke tia ukrainaĵo estas fenomeno posta; ĉiel ajn, oni kutimas latinigi tiun sonon per g (ekz-e, *Galicio, Prago*),

kaj ni sekvis tiun tradicion; do, ni transskribas *Olga, Sergio, Galiço* (kaj ne *Olha, Serhij, Haliĉ*).

2.7. La ritma prozo

En la moderna prozo oni evitas rimadon kaj striktan poezian metron; por la mezepokaj tekstoj validas iom alia estetiko, tie oni favoris ritmon kaj aliteraciojn, eĉ pure adasismajn. Nia traduko obeas tiun malnovan guston. Kurioze, nemalofte tiaj aliteracioj formiĝis en la traduko iel meme, sen konscia zorgo de la tradukinto, ekz-e,

(4.5) свистъ звѣринъ вѣста — siblo besta estiĝis;
sed por kelkaj aliteracioj la traduko bedaŭrinde ne estas adekvata:

(5.2) потопташа поганяя плъкы половецкыя —
surtretis ili trupojn paganajn stepanajn
(12.14) се ли створисте моей сребреней
сѣдинѣ? — kion faris vi al mia kapo argëntogriza?
(13.30) подперъ горы Угорскыи — la montaron
Hungaran vi fermis.

2.8. La ĝenro

La aŭtoro mem difinis la ĝenron de sia verko Parolo (MR Слово), kio estas tre loza karakterizaĵo la verkoj tiel difinitaj variis de diskurso (La parolo pri la leĝo kaj la graco) ĝis lamento (La parolo pri la pereco de la Rusa lando).

Konsiderante la Parolon sur la fono de la situacio de 1185–87, oni rajtas rigardi ĝin aktuala voko de kievano al tiuj princoj, kiuj povis kaj devis somere de 1185 defendi la sudan Rusujon kontraŭ la kipĉaka invado. La aŭtoro certe malaprobis la aventuron de Igoro, sed volas mildigi tiun juĝon, atribuant al li kavalirajn revojn, dirojn kaj farojn. Tial la aŭtoro prezentas lian ekspedicion kiel grandan entreprenon kontraŭ la Stepo, emfazas la personan kuraĝon de Igoro, lin komparas al falko tro malproksimen fluginta, ktp. Kaj fine de la poe-

mo aperas du kortuŝaj figuroj ĉe la kontraŭaj ekstretoj de la Stepo: norde, sur la murego de la ĉelima Putivlo ploras kaj sopiras princino, kaj sude kaptito princo preparas danĝeran fuĝon ... La aŭskultantoj sciis, ke la princo vidos forbruliĝintaj la urbmuregajn pasejojn, de kiuj la princino linestis vokanta. «Ĉiuj poeziaj rimedoj estas uzitaj, por simpatiigi Igoron al la rusaj princoj, por forgesigi ilin pri lia kulpo kaj igi ilin helpi lin, lian sendefendan landon, kaj per tio, la tutan Kievan Regnon» [Rib72, pĝ 406].

La skeptikuloj indikis multajn malkoheraĵojn en la verko (ni traktos ilin studante [La vivon kaj verkon de Bojano](#)), kiuj tamen neniel pruvas, ke ĝi estas falsaĵo de la 18^a jc: ja ankaŭ en la 12^a jc oni multe kompiladis kaj adaptadis pli fruajn verkojn al aktuala okazo; do, PMI ŝajnas esti adaptaĵo de ver-

ko de Bojano (malimplice referencita en PMI), same kiel Transdoneado estas plua adaptaĵo de PMI. Kvankam tio ŝajnas nekredebla, tamen oni [Nik78, Nik84] sukcesis restitui la temon kaj kelkajn fragmentojn de la Bojana praverko.

2.9. La vivo kaj verko de Bojano

La periodo de la poezia kreado de Bojano estas indikita en la versoj 1.17–20 kaj 20.1–4 de PMI. Kronologie la plej frua estas la epizodo pri la proda duelo inter Mstislavo de Tamatarkano kaj Rededo (vd III.1.19), registrita sub la jaro 1022. Oni [Rib72, pĝ 411] supozas reeĥon de skalda (kaj eble Bojana) kanto en la kronika raporto pri la batalo ĉe Listveno inter Mstislavo kaj Jaroslavo (la jaro 6532^a = 1024 p.K.):

И бывъши нощи, бысть
тма, мълния и громъ
дъждь.

Kaj noktiĝis, estis
mallumo, fulmo kaj
tondropluvo.

И рече Мъстиславъ дру-
жинѣ своей: «Поидемъ
на ня». И поиде Мъсти-
славъ и Ярославъ про-
тиву собѣ, и сступиша
чело сѣверъ с варягы, и
трудишася варязи сѣку-
ще сѣверъ, и посемъ
наступи Мъстиславъ со
дружиною своею и
нача сѣчи варягы.

И бысть сѣча силна.

Яко посвѣтѣше мълнія
блещатеться оружие

и бѣ гроза велика

и сѣча силна и страшна.

Kaj diris Mstislavo al sia
[kompanio](#): «Ni iru
kontraŭ ili». Kaj iris
Mstislavo kaj Jaroslavo
unu kontraŭ la alia, kaj
laciĝis la varengoj
hakante la sjeverojn,
post kio atakis
Mstislavo kun sia
kompanio, kaj ekhakis
ili la varengojn.

Kaj estis forta batalo.

Ĉe ĉiu ekfulmo rebrilis
la armiloj

kaj estis granda la
fulmotondro,

kaj la batalo, forta kaj
timinda!

B. Ribakov konkludas: «En la kroniko de la
11^a jc tiaj ornamoj maloftas. Ambaŭ jarar-
tikoloj (1022 kaj 1024) prezentas klaran
postesignon de kompania eposo».

Ankoraŭ pli probablan eĥon de la verko
Bojana prezentas la kronika pasaĝo pri la

bela Romano Svętoslavido (vd III.1.20), kiu regis Tamatarkanon, kiam Boriso, Olgo kaj Romano mem levis la kipĉakajn hordojn kontraŭ Vsevolodo. Estas do probabla lia aliĝo al tiu klano, plej ofte reginta Tamatarkanon, al la klano de Svętoslavo Jaroslavido, en la historiografio nomata Olgidoj (Ольговичи). La plej malfrua evento menciita en la citaĵoj (20.1–4) okazis en 1083, kiam Olgo revenis el sia Bizancia ekzilo, kie li edziĝis al Teofana Muzalon:

В лѣто 6591. Приде Ольгъ изъ Грекъ Тьмуроканю и исѣче Козары, иже бѣша съвѣтници на убиение брата его «Романа» и на самага.

(En la jaro 1083. Venis Olgo el Grekujo Tamatarkanon kaj ekzekutigis la kozarojn kiuj estis konsilantoj pri la mortigo de lia frato «Romano» kaj de li mem.)

Ne pli frue ol tiam Olgo por 11 jaroj iĝis reganto de Matraĥo, Ziĥio kaj la tuta Ĥazario, kaj rajtiĝis je la titolo *ĥano*. Aŭtune de la jaro 1185^a, kiam en Kievon venis la fuĝinto

princo Igoro, konvenis rememori la vortojn de la malnova poeto, adresitajn al lia pravaŭino okaze de la reveno de lia pravaŭo.

Serĉante spurojn de la verko Bojana oni antaŭ ĉio devas atenti malkoheraĵojn de PMI, el kiuj la plej okulfrapa estas La sonĝo de Svętoslavo.

La sola afero klara pri tiu konfuza fragmento estas, ke Svętoslavo sonĝas pri sia morto. Nu, tio tute malkonvenas al Svętoslavo Vsevolodido, kiu post la epizodo de 1185 plu regis ankoraŭ 9 jarojn. Nefrofeta sonĝo estas io malkongrua al la poetiko Mezepoka.

Tute male, la sonĝo tre konvenas al la cirkonstancoj de la morto, post operacio, de Svętoslavo Jaroslavido, kiun sekvis fuĝo de liaj filoj al «la urbo Tamatarkano», morto de la unuj, transmara mallibero de la alia,

internaj militoj kun partopreno de la kipĉa-
koj, «venĝo Ŝarokana» pro la venko fare de
Svętoslavo ktp.

Efeka cirkonstanco, kiu probable deter-
minis la elekton de la Bojana praverko est-
kiel modelon de PMI estis la suneklipso
okazinta je 1079-07-01, 16h08 laŭ la Kieva
tempo, do, unu monaton antaŭ la mortigo
de Romano (2 aŭg. 1079), komence de lia
militiro por venĝi siajn fratojn. Tial oni rajt-
as konjekti, ke en la nova verko, en PMI,
Igoro anstataŭas Romanon.

2.8. La tradukprincipoj

La eldono de 1800 forte influis la rusan li-
teraturan tradicion. Ne ĉiuj konjektoj de la
unuaj editoroj estas senriproĉaj, tamen eĉ
iliaj eraroj iĝis fakto de la rusa kulturo. Tial
la tradukinto sekvis la tradician interpreton
de la verko ĉiam, kiam ĝi estas iel defend-

ebla.

3. La notoj

La titolo sendube venas el la manuskripto.

Al **Parolo** en diversaj nacilingvoj respondas

- A Tale, The Lay of Igor's Host [Song];
- F Dit, Geste
- G Lied
- P Powieść.

Kiel *Saga* en la islanda literaturo, en la malnovrusa tradicio Слово estis rilatigebla al diversĝenraj verkoj: diskurso (la *Parolo pri la leĝo kaj pri la graco* de metropolito Ilario-no; la multaj *Paroloj* de Cirilo de Turovo); poemo; aŭ oratoraĵo. — La vorto **полкъ** egale bone povis signifi militiro, batalo, trupo, kaj ĉi tie malfacilas disigi tiujn signifojn.

1. La enkonduko

1. Ĉu ne konvenas: Puŝkin kaj iuj modernaj aŭtoritatuloj opinias, ke ли (=ĉu) en la unua frazo ne esprimas demandon; sekve ili proponas: Ne konvenas, ke ni, fratoj, komencu en malnova maniero... Tia interpreto sekvas el la romantikismaj ideoj: «La poetoj ĉiam malŝatis riproĉon pri imitemo, kaj la nekonata aŭtoro de la Parolo ne preterlasis la okazon deklari en la komenco de sia poemo, ke li kantas en maniero nova» [Puŝkin]. Кр 1.7. — Malfacilas klarigi la daŭran preteriton (imperfekton) de быше́ть (en la traduko -us, sed pli laŭvorte: ĉu ne estadis bone al ni, fratoj, komenci...); tamen кр v. 16.14, kie tiu formo ankaŭ ŝajnas havi sencon de la us-modo.

4. Igoro Sŭetoslavidio (1151–1202, baptita Georgo): princo de Novgorodo la Sjevera (1151–98), poste de Ĉernigovo (1198–

1202). Naskite je 3 apr., je la tempo de la ekspedicio li aĝis 34 jarojn.

7. sed [ne] laŭ: ĝuste per tiu verso Puŝkin argumentis, ke ie estas malkoheraĵo: komencu en malnova maniero (2) ... kaj ne laŭ la koncepto Bojana. Same kiel A. Nikitin [Nik84] mi opinias, ke la eraro estas en v. 7, ke la tiea «ne» estas aldonita de kopiisto. En la malnovrusa lingvo la konjunkcio a enkondukis aldonon, proksimume kiel «kaj krome» aŭ «dum», speciale kiam tian aldonon ne implicis la antaŭa frazparto, sed temas pri afero nova, ofte neatendita kaj sekve kontrastigata. Tian ĝeneralan sencon la konjunkcio a plu havas en la pola kaj en la ĉeĥa, dum en la rusaj uzoj pli malfruaj ĝia kontrastiga nuanco plifortiĝis kaj forpuŝis ĉiujn ceterajn. Tial la kopiisto estis kvazaŭ devigita enŝovi negadon; simile, esperanta redaktoro nepre korektus la frazon: «tiel

sed ĉi tiel» al «ne tiel sed ĉi tiel» aŭ al «tiel sed ne ĉi tiel». Simila miskompreno okazis pri la lasta frazo de PMI (vd [kom. 20.23–24](#)). Resume, tia korekto en v. 7 rezultigas:

pri la faroj de la nuna tempo, sed laŭ la koncepto Bojana,
— tre konforme al la mezepoka pensmaniero: verki pri aferoj modernaj laŭ aŭtoritataj modeloj. — **Bojano:** vd [ĉi-supre \(II.7\)](#).

8. majstro: originale вѣщій, etimologie *sperta, scianta*; ĝi povis signifi ne nur *profeta, scianta la destinon, sorĉa* — kiuj signifoj konserviĝis en la novrusa (kaj kiujn donas Poemo: «Bojano la profeta»), sed ankaŭ *ler- ta, majstra* (L peritus).

10–12. disfluadis li pense sur la arbo: ĉi tiu esprimaĵo proverbiĝis en la novrusa kun iom ironia senco. Oni provis rilatigi tiun arbon kun la skandinava *Yggdrasil*, [igdrasil] —

fraksenego, prezentanta la kosmon. Ĝiaj branĉoj penetras la supran mondon, kie nestas aglo posedanta la saĝon; ĝia trunko estas nia, meza mondo, kaj la malsupran, subteran mondon okupas la drako Nidhöggr. Tiun malsupran mondon simbolas lupo. Sur la trunko de la frakseno, diskonigante la novaĵojn, senĉese kuradas la sciuro Ratatoskr. Nu, se el la vorto *мыслию* (t.e. *pense*) forigi unu literon (л), ĝi ŝanĝiĝos en *мысию*, kiu en kelkaj rusaj dialektoj povus signifi *sciure*. — Similan arbon oni trovas ankaŭ en la mitologio tjurka (en la Siberia ŝamanismo), kie tamen anstataŭ la frakseno figuras betulo. Kp 2.19.

11. lupo brunagriza: en la folkloro oni havas jen *griza lupo* (серый волк), jen *brunagriza lupo* (бурый волк, босый волк — kp 17.23). Ĉi tie la originalo donas la unuan, tamen ni preferis la duan por ekvilibrigi

la kolorepitetojn (kp la rusajn «сѣрымъ» — «шизымъ»).

13. li diris: la originalan *речь* eblas ĝustigi dumaniere:

речь → рѣчь

(propre, «parolo»; sed ankaŭ kaŭzo, *afero* ktp); la korekto kiun ni preferis

речь → рече

(t.e. li diris); tio donus la tradukon:

«Ĉar memoris li, li diris, la batalojn de l' unua tempo»

La eraro povis estiĝi el mallonga skribo «реч», miskomprenita de la unuaj editoroj.

de l' unua tempo de l' kverelo: t.e. de la epoko de Vladimiro I kaj de la avoj de la protagonistoj. Kp v. 2.21.

14. la falkoj simbolas la fingrojn de Bojano, **la cigno** estas la kordoj de lia mizikilo. La alegorion tuj eksplikos vv. 21–25.

15. kiu estis atingita: La frazo estas ne

tute klara. Plej ofte oni interpretas ĝin en la senco de

la unua atingito unue kantis gloron —
ĉu al la malnova Jaroslavo,
ĉu al la kuraĝa Mstislavo ...

16. la malnova Jaroslavo: la Kieva ĉefprinco Jaroslavo la Saĝa († 1054), filo de s-ta Vladimiro (vd 1.27) kaj prapraavo de Igoro; ĉi tie li estas nomita malnova kontraste al pluraj postaj princoj samnomaj (ekz-e, 13.28).

17. la brava Mstislavo: la fama princo de Ĉernigovo kaj Tamatarkano († 1036), frato de Jaroslavo la Saĝa.

18. Rededo: laŭ la *Komenca Kroniko*, sub la jaro 6530^a (t.e. 1022 p.K.),

Tiutempe Mstislavo, estinta en Tamatarkano, iris kontraŭ kasogoj. Aŭdinte pri tio, la kasoga princo Rededo eliris renkonten, kaj kiam la du trupoj staris unu kontraŭ la alia, Rededo diris al Mstislavo: «Kial ni pereigu niajn homojn? Ni du duelu, kaj se vi venkos, vi prenos mian havon, kaj

mian edzinon, kaj miajn infanojn, kaj mian teron; se mi venkos, mi prenos ĉion vian». Kaj diris Mstislavo: «Estu tiel». Kaj diris Rededo al Mstislavo: «Ne per armiloj ni duelu sed ni luktu». Kaj ili ekluktis, kaj longe luktis, kaj laciĝis Mstislavo; ĉar granda kaj forta estis Rededo. Kaj diris Mstislavo: «Ho s-ta Dipatrino, helpu min. Ĉar se mi venkos, mi konstruigos kirkon je via nomo». Kaj dirinte tion li ĵetis Rededon kontraŭ la tero kaj elingiginte sian ponardon, pikmortigis Rededon. Kaj li iris en lian landon kaj prenis lian tutan havon, kaj lian edzinon, kaj liajn infanojn, kaj submetis la kasogojn al tributo. Kaj reveninte Tamatarkanon li fondis la kirkon de S-ta Dipatrino, kaj konstruigis ĝin, kiu ĝis nun staras en Tamatarkano.

Kasogoj estas Nord-Kaŭkaza tribo, probable la ĉerkesoj. Por la nomo *Rededo* (ruse Редёдя), oni proponis etimologiojn är (viro) + dädä (patro); aliaj fakuloj rilatigas ĝin al la hungara familinomo *Erdődi*.

19. la bela Romano Svedoslavido: princo Tamatarkana († 1097). En lian domajnon fuĝis, unu post alia, ĉiuj ribelantoj de la jar-oj 1070-aj, menciataj en PMI: en 1077, post

la 7-taga regado en Ĉernigovo, Boris; sekvajare tie trovis azilon Olgo Svętoslavid, frato de Romano kaj avo de Igoro (vd [kom. 7.20](#)), ankaŭ fuĝinta el Ĉernigovo. En 1087 en Tamatarkano estis preparata ekspedicio kontraŭ Vsevolodo Jaroslavido, finiginta per la batalo ĉe la Neĵatina Kampo, dum kiu pereis ĉefprinco Izęslavo kaj Boris. Venĝante la malvenkon de sia frato, Romano je la sekva jaro alianciĝis kun la kipĉakoj, iris ĝis Sulao, sed la nova ĉefprinco Vsevolodo, la rusan oron verŝinte (11.23) aĉetis pacon, la kipĉakoj iris reen kaj mortigis Romanon. La kroniko finas tiun epizodon per la vortoj:

И суть кости его и доселѣ тамо лежаче,
сына Свѣтославля, вѣнука Ярославля

(Kaj ostoj liaj ĝis nun tie estas kuŝantaj,
de l' filo de Svętoslavo, de la nepo de Jaroslavo)

la tono de tiu konkludo, tute nekutima por la kronikoj de la 11^a jc, igis onin [Rib72]

supozi tie citaĵon el kanto de kompania skaldo, eble de Bojano, kiu ja dediĉis sian verkon al Romano.

24. tiuj meme gloron sonoris ... verdeire, en la originalo estas virgenra *ili*, kiu do devus referenci ne kordojn sed fingrojn (ĉu kopiista eraro?). — Tiu verso prezentas evidentan licencon (kaj originale, kaj tradukite): oni sendube rajtas diri, ke la kordoj sonoris, sed sonori gloron (t.e. kanti gloron) estas ne tute gramatika. Propre pokor estas densa kaj profunda bruoj, tiu de torento, bolanta akvo, mara ondo, lavango, maproksima tondro aŭ kanonado.

26. de la malnova Vladimiro: de Vladimiro I la Sankta († 1015), kristaniginto de la Kieva Regno (*Valdamar konung de la Sagao pri Olavo Trüggviido* [Kringla]). La promeson komenci la rakonton ekde Vladimiro la aŭtoro ne plenumas, tial iuj [Rib71] opinias,

ke temas pri Vladimiro Monomaĥo ([kom. 7.11](#)).

27. bridinte la menson: la preciza signifo de la originala *истягну* ne estas klara. Eble tiu vorto estas samradika kun *сътягнути* t.e. *zoni, kunligi, brid*.

2. La suneklipso

1-2. Temas pri reala suneklipso okazinta je 1185-05-01, je 3h25 (laŭ la Kieva tempo), dum la oka tago de la ekspedicio. Suneklipson oni rigardis malfeliĉa aŭguro.

Multaj fakuloj akceptas la hipotezon ke la fragmento 2.17–3.25 (kies amplekso proksimume egalas du manskribitajn paĝojn) devas antaŭi la epizodon pri la suneklipso (do, la fragmento estas movenda antaŭ 2.1). Kroman argumenton favore al tiu pli logika prezento liveras la Transdoneado, en kiu post la teksto de 1.29–30 sekvas al-

parolo al alaŭdo (en PMI, al la najtingalo Bojano) kaj priskribo de preparadoj al la militiro.

5–6. morto ... mallibero: dilemo neniel aktualis antaŭ la komenco de la militiro. Tute male, la malprudenta atako kontraŭ la kipĉakoj, en kiu pereis la Sjeveriaj trupoj, grave endanĝerigis la Rusujajn urbojn. Probable tiu parolado estas enkompilita el alia verko — se ne konsideri la konjekton, ke la sorto punos Igoron ĝuste per tio, kion li pleje volis eviti: «la mallibero de kaptito».

12. rompi lancon: kliŝo por *batali*.

14. forlasos la vivon: la verbo хочу uzeblis por formi futuron, ekz-e

се уже хотимъ померети ѿ глада, а ѿ князя помочи нѣту» [Laŭr. Kron.].

Tamen la koncernan pecon oni ial kutimas traduki laŭvorte: «kun vi, Rusoj, mi volas aŭ restigi la kapon...» [Poemo].

15. per la kasko trinki el rivero: poezia kliŝo por «venkopreni la riverbordojn» (ofte en la kronikoj, same kiel «trinkigi la ĉevalojn el...»).

18. la pensa arbo sendube estas tiu de **1.10.** Ne maleblas traduko per la pensa ligno, kio estus aludo pri la muzikilo de Bojano (kp la praanglajn gleo-beam, gamen-wudu, t.e. «gajligno»). Tamen ĉe la skaldoj oni trovas «kantoarbon, kovritan je glorfoliaro».

20. ĉirkaŭ: ĉi tiu traduko baziĝas sur la lego обáполы → *ĉirkaŭ* — la vorto registrita en rusaj dialektoj (V. Dahl) kaj en kronika raporto pri la eventoj de 1181:

«НЕ СМЕЯСТА ДАТИ ПОЛКУ ДАВИДОВИ ... И СТОЯША МЕЖИ СОБОЮ НЕДЕЛЮ ОБАПОЛ (ambaŭ-borde) ДРЬЮТИ» [Rib71, pĝ 154; стб. 620–621];

sekve, ni vidas tie daŭrigon de **1.6:** la nuna tempo = ĉi-tempo [Kar89]. Pli tradicia

traduko estus «kunplektante ambaŭ duonojn de la ĉi-tempa gloro», surbaze de оба полы = ambaŭ duonojn (t.e. la estinton kaj la estonton [Poemo]). — Cetere, en la malnovrusa lingvo tia **gloro** povis signifi *panegiro*, kaj krome, ĝi estas samradika kaj similsuna kun la *parolo* (слава — слово; кр la titolon de la verko).

21. la vojo Trojana: estas diversaj interpretoj de ĉi tiuj vortoj:

(a) Trojano = praslava dio, parenca al la prairana Traetaono (kp III.15.1); tian Trojanon mencias apokrifio de 12 jc *La iro de la Dipatrino en la Inferon*:

Kaj diris la ĉefanĝelo:

— Ĉi tiuj estas kiuj ne kredis en la Patron kaj la Filon kaj la S-tan Spiriton, sed forgesis Dion kaj kultis la kreitaĵon kiun Dio kreis por nia servo, tial ili ĉion nomis dioj: la sunon kaj la lunon, la teron kaj la akvon, kaj la bestojn, kaj la moviĝantaĵojn ... Trojanon, Ĥorson, Veleson, Perunon ili faris dioj «трояна хръса велеса перуна на б~ы ѡбратиша».

(b) Trojano = la Romia imperiestro Trajano, kaj temas pri la monumento Tropaeum Traiani; la «lando Trojana» estus Besarabio, kies loknomoj konservas la memoron pri la imperiestro.

(c) povus temi pri la lando Troja, reminiscenco pri la Troja milito.

(ĉ) en Ukrainio estas kolosa Trojana remparo (Троянов вал) el la prahistoria epoko.

23. ties nepo: el la originalo ne estas klare, pri kies nepo temas. En la Unua Eldono post torgo (ties) staras enkrampigite: «(Олга)», t.e. de Olgo (en la malnovrusa formo); simile en la carina kopio: «(Ольга)»; laŭ tiu gloso temas pri Igoro, nepo de Olgo (laŭ la originala titolo). Laŭ atesto de N.M. Karamzin tia klarigo en la manuskripto ne estis; sed estas strange, ke la editoroj uzis formon malnovrusan anstataŭ la novrusan (Олега), kaj ne uzis sian ordinaran manier-

on fari notojn. — Aliaj konjektoj: la aŭtoro de PMI estas nepo de Bojano; aŭ Bojano estas nepo de Veleso (kp [3.1](#)). En la du lastaj interpretoj la dativo iĝas agantnomo, tial ili implicas alian tradukon:

Kantata estus kanto al Igoro de ties nepo ...

3. Vsevolodo alvenas el Kursko

1. Velesa nepo: la praslava Veleso (Белѣсъ, Волосъ; vd [kom. 2.23](#)) estis dio de riĉo, bonstato, protektanto de la brutaro. La vorto *nepo* povas ĝeneralsence signifi posteulo, praido.

2. Sula-rivero: Сулѧ, maldekstra alfluanto de Dnepro, limrivero disiganta la Rusan landon disde la Kipĉaka stepo.

3. sonoras la gloro en Kievo: Kievo neniel partoprenis la aranĝojn pri la Igora militiro, do, vv. 28–29 estas citaĵo el verko Bojana aŭ aludo pri la triumfa reveno de la milites-

troj de Svętoslavo ([kom. 10.4](#)) el ilia ekspedicio kontraŭ la kipĉakoj (ili revenis je la Pasko, 1185-04-21; Igoro eliris je la tago de sia patrono s-ta Georgo, 1185-04-23).

4. Novgorodo: ĉi tie temas pri Novgorodo la Sjevora, ĉe Desno-rivero; ĉefurbo de la samnoma prinĉujo. La adjektivo ŝuldiĝas al tio, ke ĝi situis en la lando de la sjevoroj (unu el la orient-slavaj triboj).

5. Putivlo: urbo en kiu rezidis Vladimiro (1170–1208), la plej aĝa filo de Igoro.

6. Vsevolodo: frato de Igoro, princo Kurska kaj Trubĉevska († 1196; en 1185 li aĝis proksimume 25 jarojn).

7. batalema uro: Vsevolodo havas du epitetojn: буй туръ (la furioza, batalema uro) kaj яръ туръ (la arda uro). La sovaĝaj prabovoj, uroj, malaperis en Bjelarusio komence de la 17^a jc.

23–24. honoro (честь) implicas materialan honorarion, signon de iaj feŭdaj rilatoj; **gloro** (слава) estas pure spirita kaj tial, en la feŭda valorhierarkio, pli nobla. — La finaĵo **ѣ** en la vorto **славѣ** estas trajto de la Novdoroda dialekto de kopiisto.

4. Minacplena nokto

1. Igor-princo: Ni riskas konservi la nun nekutiman vortordon de la originalo, kiu cetere estas analogia al Sula-rivero, Carolus rex, Ĉingis-ĥano ktp. — **sin levi en la oran piedingon**: Ĉi tiu parolmaniero estis rezervita por la princoj; la kompananoj simple «ekrajdis» aŭ «enseliĝis» (ekz-e 2.7).

2. libera stepo: Ruse чисто поле (la pura, glata stepo), esprimajaĵo esence simila al «libera maro».

3. baras: En la originalo, meze de verboj aoristaj (levis, rajdis; vekis, estigis) tiu verbo

estas imperfekta. La tensoŝanĝo unue, emfazas la verbon, kaj due, forigas ĝin el la sinsekvo de la eventoj: unu el la plej mallongaj epizodoj de la ekspedicio, la sun-eklipso, estas prezentita kiel fono de la tuta entrepreno.

4. la nokto: Oni rajtas heziti, ĉu temas pri diurnoparto, ĉu pri metaforo por mallumo. — per teruro: ni sekvas la slavonan signifon de гроза (= Gr φρίκη), kiun konservis, ekz-e, la pola groza; aliaj tradukistoj komprenas ĝin laŭ la moderna senco meteologia:

kaj la nokto, per fulmotondro ĝemante, ekvekis la birdaron [Poemo];

nokto ĝemis
en pluveg' kaj fulmotondro,
birdojn en la step' vekante [Eposo].

Se oni akceptas la teorion pri konfuzitaj folioj (pĝ 3), tiam la tuta epizodo 4-a temas ne pri misvetera nokto, sed pri la suneklipso (2.1–16, poste 4.1–6.39):

Tiam rigardis Igoro la helan sunon kaj vidis
siajn homojn ĉiujn de ĝi kovritaj per mallumo.
Kaj diris li al sia kompanio: ...

Tiam sin levis Igor-princo en la oran piedingon
kaj rajdis sur la libera stepo.

La suno lian vojon per mallumo baras;
la nokto al li ĝemante per teruro la birdaron vekis;
siblo besta estiĝis,
Divo ekscitiĝis, ...

6. Divo: Ĉi tiun enigman vorton ni lasas ne-
tradukita. Pri ĝi ekzistas abunda literaturo
kaj multe da hipotezoj.

(a) Plej ofte oni supozas, ke temas pri mita
demono, ia drako [Eposo] aŭ grifo (gryp-
hus) kaj rilatigas Divon al la mezpersa *div*,
dev (el avesta *daeva*, sanskr. *deva*, dio), do,
al la arja vorto, kiu en la islama epoko iĝis
nomo de malicaj demonoj. En la malnovru-
sa literaturo la vorto дивъ ankoraŭfoje
aperas (kun la signifo *demono*) en la
apokrifa «Libro de misteroj de Еноћо»:
«Азь ислѣдовахъ и написахъ тутень
громный и дивъ молнииинъ».

(b) Ĉe la kontraŭa poluso estas la hipotezo [Ŝer90] ke temas pri banala upupo (sud-slave dib, deb, dijeb), kiu en la orienta folkloro ofte havas la rolon de heroldo, de post ĝia apero kun tiu funkcio en Korano, ĉap. 27 (An-Naml, «La formikoj»):

18. De Salomono estis tie kunigitaj la armeoj de la Ĝinnoj kaj de la homoj kaj de la birdoj kaj ili estis ordigitaj en trupojn (...)

kaj tiam upupo, Hud-Hud, alportas sciigon pri Ŝeba; Salomono skribas repondon kaj resendas ĝin per tiu sama upupo); el tio sekvis islamlandaj legendoj pri la «Militiro de la birdoj».

— **ekscitiĝis**: En la originalo estas neklara зби, kiun iuj korektas, aldonante mediale-refleksivan -ся (ni sekvis tiun malnovan tradicion), dum aliaj opinias ĝin marginoto зпи (t.e. *vidu*; en la skribmaniero de 16^a jc б kaj п estis tre similaj), kaj tute ĝin forigas. — Resume, eblas pli simpla traduko

de vv. 6–7, kiu cetere bone harmonias kun la ĉirkaŭa teksto:

upupo krias sur arbopinto, ordonas ke aŭdu ...
Vidu ankaŭ la malklaran lokon ĉe 11.40.

(c) Sendepende je filologiaj konsideroj, el la situacia kunteksto oni [Kar89] konjektis, ke divo estas militista emblemo, fiksita sur древо, kiu lasta sekve el arbo iĝas stangopinto:

insigno leviĝis, vokas (de) sur la stangopinto ...
(kp 6.20: «la standardoj heroldas»; 15.46: «la lancoj kantas!»).

11. **Sudak-o**: MR Сурожь (Suroj), Gr Σουγδαία; la araboj nomis tiun urbon Sudaq, nun la urbeto Sudak en Krimeo, je 57 km de Teodozio.

12. **Ĥerson-o, MR Кърсунь (Korsun)**: Ĥersono la Taŭrida, nun ene de Sebastopolo. En 989 ĝin venkoprenis s-ta Vladimiro kaj dum kelka tempo la urbo dependis je la

Kieva Regno.

13. Tamatarkan-o: En la 12-a jc, fortranĉite disde la Kieva Regno per la kipĉakaj hordoj, tiu urbo perdis ĉian rilaton al la Kieva Regno kaj estis forgesita de la kronikistoj. Ĝia mencio en PMI estas la lasta en la malnov-rusa literaturo. — **idolo**: ...

14. nepretaj vojoj: Ĉu temas pri nebatitaj vojoj? Ĉu reminiscenco pri «en la dezerto pretigu la vojon...»? En Poemo kaj Eposo estas tradukite per «netrairitaj vojoj».

16–17. kriĉas ... la ĉaroj: Supozeble la kipĉakoj ne ŝmiris siajn veturilojn, do ties grinĉado estis aŭdebla malproksime en la stepo, iom simile al la bleko de la norda cigno [Liĥaĉov].

— **ekscititaj**: ĝenerale akceptita estas la korekto *ропущени* → *ропужени*.

19. La verbo пасти (la prononco: [pasti'], la

nuna ĉefsignifo: paŝti) povis havi la krom-sencojn zorgi, gardi, observi, gvati; la genitivo бѣды (t.e. de malfeliĉo) okaze povus havi la signifon partitive-objektan; tial la verso allasas du malajn interpretojn:

Ja lian malfeliĉon jam paŝtas (= gvatas) la birdaro t.e. la birdoj gvatas lian malfeliĉon, atendante la batalkampan predon; aŭ male, konforme al nia traduko,

Ja disde malfeliĉo lin jam paŝtas (= avertas) la birdaro.

la kverkoj: la originalan подобію oni ĝenerale korektas al по дубію (praguse estus «по доубію», дубіє = kverkaro). Konjektante iom pli seriozan difekton en la teksto oni povus korekti laŭ *Transdoneado*: подъ облакы (sub la nuboj).

20. timindaĵon: ne maleblas, ke temas pri banala fulmotondro. — **aŭguras:** la originala въсржати аŭ въсржити ne estas registrita en la malnovrusaj tekstoj. En iu

Brjanska dialekto oni trovis всражить = taŭzi. Ni akceptis la konjekton, ke la unuaj editoroj (aŭ kopiisto) mislegis omegan kiel съ (la malnovrusaj skribistoj ofte enŝovadis ѡ anstataŭ о, proksimume kiel la okcidentaj skribistoj Mezepokaj laŭplaĉe interŝanĝis і kaj у); do, въсрожать → вѡрожать = во-рожать (t.e. aŭguras, sorĉas). — Cetere atentindas, ke la ravinoj kaj la lupoj estas menciitaj en 3.17 kaj 3.21.

23. Ho Rusa lando! jam foras vi malantaŭ la monteto: Tia limmonteto, de trans kiu oni ne plu vidas la Rusan landon estas ofte menciata en la Kieva Kroniko; probable, ĝi situis ĉe la kutima vojo en la stepon. — La vorto шеломянь, ĉi tie tradukita per monteto, propre signifis oblonga altaĵo, akvodislimo; montetĉeno [Rib71, pĝ 54].

5. Venko super la kipĉakoj

12-13. Estas nomitaj partoj de flago, kio en la poezia lingvaĵo ekivalentas al la tuto (t.e. al flago): skarlata stango (flagstango, стяг); blanka standardo (la flagtuko, хоругвь; poste tiu vorto ŝanĝis sian signifon al tiu de preĝeja standardo); kvasto (eble ĉevalvosto) estis fiksita ĉe la supra ekstremo de la flagstango, sub la pintingo; arĝenta pintingo (originale стрыжие, en la posta lingvo острожие; ĝi ofte havis la formon de lanca pintingo).

15. idaro de la Olga nesto: Ĉiuj princoj, partoprenintaj la militiron, estis nepoj (Igoro, Vsevolodo), aŭ pranepoj (Vladimiro Igorido; Svętoslavo Olgido) de la princo Ĉernigova kaj Tamatarkana Olgo Svętoslavid († 1115; vd [kom. 7.20](#)).

17. Ne naskiĝis ĝi: la originalo donas

virgengan *li* (небылонъ) anstataŭ la neŭtr-an *ĝi*. Ĉu la aŭtoro ne sufiĉe atente adaptis Bojanan version, temintan pri unu prodo?

19. aglo: en la originalo ĉasfalko (science *Falko rusticolus*); ruse ĝia nomo estas simpla vorto, senrilata al la radiko de falko. La tri birdoj pensigas pri tri specoj de rilatoj: de la egalranga princo (alia «falko»); de la ĉefprinco (pli forta «falko», ĉasfalko — en la traduko ŝanĝita je «aglo»); de fremdulo ĥano («korvo» — tio estas indikite malimplice).

21. Gza: Kipĉaka ĥano; en la fontoj lia nomo havas ankaŭ la formojn Коза, Къза, Гза, Гзя, Гзакъ. — **grizalupe:** la lupo estis populara tjurka totemo.

22. Konĉako: Kipĉaka ĥano, filo de Otrako Ŝarukanido (Ŝarukanidze, laŭ la kartvela kroniko, kp 11.45), unu el la plej eminentaj

ŝtatistoj en la Kipĉaka lando. Li arigis ĉirkaŭ si plurajn hordojn, estris Donecan Union, kondukis tre prudentan politikon rilate al la Kieva Regno, strebante plifirmigi la bonajn rilatojn kun Ĉernigovio, la domajno de Olgidoj, la tradiciaj aliancanoj de lia klano. Eĉ post la kompleta venko super Igoro, Konĉako ne profitis la okazon priabi lian sen-defendan domajnon, sed atakis la Perejaslavlajn principojn (13.1–2); Gza sola iris en la terojn ĉe Sejmo. Konĉako edzigis Vladimiron Igoridon al sia filino. Ebla etimo de la nomo estas *qon-ĉak* aŭ *kön-ĉak* (leda pantalono). — **spuron faras:** Konĉako indikas al Gza la vojon (lia kavalerio lasas spuron en la stepo). La du ĥanoj «kuras» renkonte al Igoro.

6. La sabata batalo

4. kvar sunoj: Temas pri la 4 princoj: La fratoj Igoro kaj Vsevolodo; la filo de Igoro,

princo Vladimiro; kaj la nevo de la fratoj, princo Svętoslavo.

11. la rivero Kajalo: Estas diversaj opinioj pri tiu nomo. Iuj vidas tie tjurkan vorton qajaly (rokoza), kaj konjektas, ke temas pri la rivero Makatiĥa, alfuanto de la rivero Golaja Dolina, alfulanto de Suĥoj Torec [Get76]; aliaj opinias, ke Kajalo estas ne reala rivero, sed ia folklora Bedaŭrorivero (de MR каяти — ĝiproĉi; venĝi; bedaŭri, funebri).

14. Stribogo estis malnovrusa pagana dio, kies funkcioj probable koncernis la veteron; oni rilatigas lin al la irana Sribaga.

20. La standardoj heroldas: Eblas malpli tradicia sed pli simpla traduko: La standardoj flirtas, aŭ, pli precize, staras orte, en formo de gamo, Г; do, gamas. La slavona nomo de Г, глаголь, estas rutine uzata por indiki

la ortan formon (kp la PIVajn L-fero, L-anteno); tamen la ĉefa signifo de la verba formo глаголють sendube estas parolas (slavona vorto noblastila). Cetere, *Transdoneado* subtenas nian interpreton: tie la standardoj blekegas (стязи ревуть).

22. Rusaj rotoj retiriĝis: Kutime oni korektas отступишя (probable skribita ѿступишя) al ѡступишя, kio donas *Rusajn rotojn encirklis*. Ni tiun korekton ne akceptis, ĉar laŭ la kroniko kaj el 8.14–15 ŝajnas, ke almenaŭ parto de la rusaj trupoj efektive retiriĝis.

28. glavoj Karolidaj: Estas pli ol 10 teorioj pri la signifo kaj deveno de харалугъ, харалужънъ, kiuj estas registritaj nur en PMI kaj en verkoj je ĝi dependaj. Ni akceptis tiun, kiu devenigas la vorton el la malnovgermanaj Karling, Charling kaj (konjektata) Charolung. Tiutempe «francia» estis sinoni-

ma kun «ŝtala» (kiel post ducent jaroj «damaska» iĝis nomo de klinga ŝtalo); kaj el la glavoj, trovitaj dum esplorfosado de la malnovrusaj sepultoj, ĉiuj glavoj de 9–10 jc estas Karolidaj (kun koncerna markaĵo), unu glavo de 12 aŭ 13 jc estas Kapetida [Menges]. Kp 6.33. — Inter aliaj etimologioj oni indikis sanskr. khāra (malmola, akra) kaj langh (frapi, brili), el kio sekvas kharalanghyana (akre-brila) [MB84].

33. kaskoj Kaŭkazaj: faritaj de аваре, latine avaras — restaĵoj de tiu popolo plu ekzistas en Dagestano, kiu en la Mezepoko estis fama centro de armilproduktado. Oni rimarkigas kontrastigon de la glavoj Karolidaj kontraŭ la kaskoj Kaŭkazaj. La dishakado en splitojn klariĝas per tio, ke la kaskoj de la nomadoj estis faritaj el lignaj pecoj, kunigitaj per ledο kaj fera tegaĵo.

35–36. Ĉi tiuj versoj probable estas difektit-

aj. En nia traduko *кая* kaj *раны* estas traktataj kiel genitivo ununombra de resp. *къй* (kiu) kaj *рана* (normale vundo, sed en la ĉeĥa ankaŭ bato); tia genitivo povus esprimi kaŭzon, kiel en Esperanto. Alian oftan interpreton de vv. 35–39 donas Poemo:

«Ĉu timigos vundo, fratoj, tiun, kiu forgesis ĉiun honoron kaj vivon, sian urbon Ĉernigov, kaj la oran patran tronon, kaj la kutimajn ĉarmojn de sia kara amatino, la bela Glebovna!».

38. Glebidino: Probable Olga, filino de princo Glebo Georgido, fratino de Vladimiro de Perejaslavlo, la edzino de Vsevolodo la Arda Uro.

7. Ekskurso pri la militoj de Olgo

1. epokoj Trojanaj: Pri Trojano [vd 2.22](#). La vorto *вѣкъ* (novruse, jarcento) estis ne tute preciza; en tradukoj el la mezgrika ĝi respondis al αἰών.

2. Olgo Sveltoslavido († 1115): Nepo de

Jaroslavo la Saĝa, avo de Igoro kaj Vsevolodo, prapatro de la Olgidoj (vd la Historian Skizon).

8. Jaroslava filo Vsevolodo: En la originalo estas sensenca kombino de du posedaj adjektivoj Jaroslava filo Vsevoloda; ni akceptas la korekton de la dua al Vsevolodo (Всєволодъ); do, temas pri onklo de Olgo (vd [kom. 7.2](#) ĉi-supre), la patro de Vladimiro Monomaĥo.

9. Vladimiro Vsevolodido (1053–1125): konata sub la alnomo Monomaĥo (laŭ lia avo, Bizancia imperiestro Konstanteno Monomaĥo), li estis princo Ĉernigova kaj ekde 1113, la ĉefprinco Kieva.

10. ĉiumatene la orelojn ŝtopis: En ĉiu komentario oni povas legi, ke tie estas kalemburo: Vladimiro ŝtopis siajn orelojn (ja ĵus estis dirite pri la sonoro de lia forraj-

do) kaj rigligis la urbopordegojn, kies ŝloskrampoj estis nomataj oreloj; bedaŭrinde, mankas konvinka klarigo, kial li faris tion ĉiumatene.

11. Boriso Veĉeslavido: Nepo de Jaroslavo la Saĝa, aliancano de Olgo Suferaslavid; pereis aŭtune de 1078 ĉe la Neĵatina Kampo (vd la Historian Skizon), aĝante 24 jarojn. — **juĝo**: eblaj interpretoj estas «la Dia juĝo» aŭ «konvikto». Ĉiel ajn, la probabla senco estas, ke lin «glor[am]o kondukis al malgloro».

12. Kanino: Probable temas pri rivero, kiu fluis apud Ĉernigovo, kie pereis princo Boriso. Tiu rivernomo estas menciita en la kroniko.

— **verda mantelo**: la batalkampa herbo, kiu iĝis morta vestaĵo.

13. Pro ofendo de Olgo: Probabla senco povus esti, ke Boriso batalis pro la afero de

aliulo (de sia kuzo). [Kp 9.3.](#)

14. bravan kaj junan princon: T.e. Borison. Verdire, gramatike la originalaj vortoj egale akordas kun ajna el la du nomoj (Olgo, Boriso).

15. de tiu sama Kajalo: Fakte devus esti *Kanino* ([kom 7.12](#)). Eble tie estas eraro de kopiisto, eble en la tekston enŝteliĝis noto de leganto, kiu ne komprenis, pri kiu batalo temas.

— **Svētopolko:** Laŭ la kronikoj, tiu Izeŝlavido en la koncerna tempo estis en Novgorodo; Izeŝlavon akompanis alia filo, Jaropolko, kaj la kroniko speciale mencias ties afliktegon

— Per *forlulis* ni akceptas la korekton повелѣя → полелѣя; alia konjekto: «повелѣяти», t.e. *ordonis preni*.

18. Olgo Suferslavid: Tiu alnomo estas konata nur el PMI, sed ĝi iĝis ĝenerale ak-

ceptita en la rusa historiografio (oni ja vere bezonas iel distingi inter la multnombraj princoj samnomaj; eble ĝi aperis kiel gloso de iu antikva leganto). Oni povus konsideri aliajn tradukojn de tiu alnomo, ekz-e *Ĉagrenslavido*. Eblas du interpretoj:

- temas pri la suferoj de Olgo mem — ja similan alnomon kun tiu senco en la kronikoj ricevas Rogneda, post ke la juna s-ta Vladimiro ŝin seksperfortis kaj mortigis ŝian patron: «oni nomis ŝin Suferslava» (t.e. fama pro siaj malfeliĉoj, originale нарекоша ей имя Горислава) — Laŭr. Kron., pĝ 285. Menciindas, ke tiu rakonto pri la pramalnovaj eventoj estis registrita retrospektive, en 1128; Olgo estis pranepo de Rogneda (cetere, kiel ĉiuj Jaroslavidoj), kio povus klarigi la sufikson [Rob78];
- aŭ, laŭ la opinio de la plimulto de la modernuloj, temas pri la suferoj al kiuj li

submetis la Kievan Regnon per sia alianco kun la kipĉakoj.

Cetere, la unuan radikon en tiu alnomo oni povus devenigi ne nur el rópe (malfeliĉo, doloro), sed ankaŭ el ropé (supre) aŭ гори (brulu), kiun lastan iuj rilatigas al la kulto de sundio.

20. la vivo: La ĉefsignifo de жизнь estas *vivo*, sed ĝiaj kromsignifoj estas *havo* (14.30) kaj *prisemita kampo* [Rib71, pĝ 54].

— **la Daĵboga nepo**: probable, mitologia alegorio de la Rusa lando. Daĵbog (Дажь-бог, Дажьбог) estis orientslava sundio, kies nomo analizeblas kiel donu + dio aŭ (malpli evidente) en daĵ oni vidas paralelaĵon al la gota dags (kaj esperanta tago), litova daga (varmego), prusa dagis (somero). Kp 9.3. — Tiu peco havas paralelaĵon en la posta malnovrusa literaturo.

Ekz-e en la jaro 1307^a, kiam Dante ĵus komencis la Dian Komedion, en la malproksima Pskovo klerulo Diomedo (Домидъ) finis kopii grandan libron (Apostollibron, t.e. la Agoj kaj la Epistoloj de la Apostoloj plus Apokalipso). Sur la lasta paĝo li, paradante per siaj scioj astronomiaj, diversmaniere estis datanta la laborfinon. Li ankoraŭ ne finskribis la kolofonon kiam venis informo pri batalo inter du rusaj princoj apud Moskvo (25 aŭg. 1307, Miĥaelo de Tvero kontraŭ Georgo de Moskvo). Sciigite pri tiu batalo de rusoj kontraŭ rusoj en la lando, jam sesdek jarojn suferanta sub la mongola jugo, Diomedo enskribis (ni konservas la liniaranĝon de la originalo por doni la ideon pri la aspekto de malnovrusa teksto; la originalo havas du kolumnojn):

Сего же лѣта бысть
бой на Руськой земли • Ми

хаиль съ Юрьемъ ѿ кня
женье Новгородское • При
сихъ князехъ съ-шетса
и расташе уособицами
гыняше жизнь наши
въ князѣхъ которы и въ
ци скоротишася челоукомъ•

Samjare estis batalo en la Rusa lando: Miĥaelo kontraŭ Georgo pri la Novgoroda princoj. Sub tiuj princoj prisemite kaj kreskante per militoj pereis vivo(j?) niaj en princaj kvereloj kaj la vivdaŭro mallongiĝis de la homoj.

Atentindas, ke la gramatikaj formoj en la skribaĵo de Diomedo estas pli arĥaikaj ol tiuj de PMI (en la kopio kiun ni konas); aliflanke malaperis la pagana Daĵbogo kaj la frazo havas iom alian strukturon.

Tradicie oni vidas en tiu skribaĵo ateston pri la aŭtento de PMI kaj pri la intereso kiun ĝi vekis en la mezepokaj legantoj. Tre probable, ke en Pskovo estis manuskripto de PMI, ĉar la Jaroslavla kopio per kiu ni konas la verkon laŭ la opinio de la lingvistoj estas farita en Pskovo. Cetere, ne maleblas ke en

ambaŭ okazoj temas pri citaĵo el komuna tria fonto.

23. pelkrio: En la originala кикахуть probable perdiĝis superlinia л — tiam tiu stranga vorto estus la bone konata кликахуть. Tiun konjekton subtenas la responda loko en *Transdoneado* [TS]:

В тоя же время по Резанской земли ни ратой ни постух не покличеть нъ толко часто вороны грают, труппу человеческого чают.

29. tiela: Kurioze, la formo *cuțeŭ* morfologie ĝuste respondas al *tiela*, kaj estis same (aŭ eĉ pli) malofte uzata.

8. La sanga vino

3. sagoj harditaj: Ĉu eble «la sagoj kungluitaj»?

13. en la foro: Tradicie oni korektas давеча al далече (ankaŭ ni akceptis tiun korekton); tamen laŭ kelkaj ukrainaj dialektoj давеча povus esti en la mateno.

23. boparencoj: La metaforan sencon (batalo = edziĝfesto) ĉi tie plifortigas la senco laŭlitera: la kipĉakaj ĥanoj efektive estis boparencoj de la rusaj princoj.

9. Lamento pri la Rusa lando

3. ofendo: Feŭda maljustaĵo (la vorto pli konvenus al la militiro de Olgo ol al tiu de Igoro; [kp. 7.13](#)).

5. flugilaro: La naiva (kaj tradicia) traduko *eksvingis la cignajn flugilojn*, kvankam formale pli proksima al la originalo, certe estus konfuziva: oni tuj imagas duflugilan junulinon, kian oni povas vidi sur diversaj ilustraĵoj. Nu, la originala крылы estas multenombra, la dunombro estus крылома. Eble do temas pri tjurka tribo, kies totemo estis cigno (la kipĉakoj povus esti tia tribo, kiel indikas ilia etnonomo mem).

7. forpelis la grasajn tempojn: La traduko

laŭas la konjekton de la plimulto de la fakuloj, kiuj korektas убуди (vekis, incitis) al упуди (forpelis); la ĝenerala senco: «forpelis la tempojn de bonstato». Tamen жиръ (graso) povas havi ankaŭ la kromsignifojn *malpuraĵo*, *pezaĵo*, tial ne maleblas pli konservema ideo, ke la ofendo kirlis malbonaĵojn. [Kp 9.30](#).

8. La princaj militoj kontraŭ la paganoj pereis: tia interpreto estas formale allasbla, kvankam la sintakso de tiu frazo estas tiom bizara, ke oni rajtas suspekti difekton en la teksto.

9. diris unu frato al la alia: peкоста (diris) estas dunombra verboformo, t.e. temas pri 2 fratoj; [kp 9.11](#), kie la nombro de *komencis princoj* kreskas ĝis la multenombro.

10. «Ĉi tio estas mia, kaj tio estas mia»: kp la juran formulon, fiksantan la rajtojn de

princoj je iuj teroj: Ĉi tio estas mia, kaj tio estas via.

16. al la maro! — En ĉi tiu vica reapero de la maro oni povas vidi malkonvenan hiperbolon, aŭ (plej probable) simptomon de kompilado, aŭ spuron de la Mezepoka asociaĵo de transmara kaj transmonda vojaĝoj. En tiu lasta okazo la senco estus: «al la rando de la pereco».

17. ne revivigi! Rekantaĵo reaperonta (v. 13.60).

18. Karna kaj Ĵela: oni konjektas, ke temas pri funebraj diinoj, slavaj valkirioj rilataj al sepulta rito. Ĵela estas abunde atestita en la senco de funebro; en manuskripto de 17 jc pri paganaj ritoj oni trovis mencion pri «Ĵela kaj Karna» (tiuj samaj nomoj en la inversa ordo).

20. flama korno: Iuj vidas en tiu linio alud-

on pri la greka fajro, kies uzon fare de kip-ĉakoj la kronikoj registras sub 1184 (do, la aflikto disvastiĝis tra la lando kiel la greka fajro); aliaj vidas tie aludon pri antaŭkristana sepulta rito (kremacio).

23–25. per la penso elpensos...: Tiaj taŭtologiaĵoj oftas en la rusa folkloro; temas pri havigo, (re)kreo al si de la deziregata objekto per intensa pensado, rigardado, atendo ktp.

30. malgajo grasa: peza (t.e. grava, prema) malgajo; kp 9.7.

10. La kanto pri Svętoslavo de Kievo

1. Dunombre devus esti: *Тая бо два*.

4. ilia patro Svętoslavo: Svętoslavo (1125–94) estis kuzo de Igoro kaj Vsevolodo, tamen estkiel ĉefprinco (ekde 1180) li estis

la patro (senioro, klanestro) de ĉiuj Rurikidoj. Se oni konsideras la paralelan historion de la avoj de la protagonistoj, Svętoslavo Jaroslavido efektive estis striktasenca patro de Olgo, Romano, Glebo. Kp 12.5.

13. Kobako de la margolfo: Laŭ la kronikoj, Kobako estis kaptita «ĉe la urbeto nomata Erel, kiun la rusoj nomas Ugol (t.e. Angulo)»; eĉ se oni akceptos, ke лука (t.e. arko, golfo) similas al angulo, la uzo de maro plu restas stranga. — Probabla kipĉakapraformo estas Kōbāk, «hundo» (unu el oftaj tjurkaj totemoj) [Menges].

17. festena salonego, juniorejo (грядница): Salonego en princa palaco, kie festenis «la junioroj» (грядь); krom la funkcio festena ĝi laŭbezone (se estis tro multe da malliberuloj) servis kiel malliberejo. Supozeble, Kobako estis venigita tien, eble dum festeno, aŭ eble li restadis tie dum sia kapt-

iteco.

22. kiu mergis la grason en la fundo de Kajalo: Frazo malklarega, dubinda kaj gramatike, kaj enhave. La tradicia interpreto estas: «kiu dronigis la riĉon (resp. bonstaton ktp) sur la fundo de Kajalo». Tio signifas, ke la originalaj prepozicioj kaj la kazo estas neĝustaj. Malpli ĝena (kvankam nesenriproĉa) estus la analizo de «во днѣ Каялы» kiel «en la tago de Kajalo» (lokkaze tago kaj fundo koincidas; sed por la tago-indiko oni devus uzi akuzativon); plue, Nikitin konjektas, ke жиръ (graso) erare antaŭis ĉi tie la vorton миръ (paco).

24. Rusa oro estis verŝata: Gramatike eblas du interpretoj: ili verŝ(ad)is, aŭ oni verŝ(ad)is (plurala imperfekto triapersona). Vd III.1.20.

27. urbmuraj rundvojoj: Galerioj sur la

interna rando de la urba murego, S zabralo, MR zaĉeboro (kp 16.19).

11. La sonĝo de Svętoslavo

2. en Kievo: Ĉar laŭ la kronikoj en la koncerna tempo Svętoslavo ne estis en Kievo, la unuaj editoroj encitiligis la vortojn de tiu linio kiel parton de lia rakonto pri sia sonĝo. — **sur la montetoj**: Parolkliŝo indikanta la supran parton de Kievo, kie situis la princa palaco, la Dekona kirko, la S-ta Sofio.

5. lito taksusligna: En la folkloro oni trovas kliŝon кровать тѣсовая (tabula lito [Poe-mo]; тѣс: hakaĵo, ĉarpentaĵo); malfacilas diri, ĉu ĉi lasta estas popola misaĵo, ĉu la unua formo estas eraro de kopiisto. Rimarkindas, ke la grekdevena кровать (lito) en la koncerna epoko estis pruntaĵo freŝa, kiu devis impresi ne malpli solene ol la slavonaj ложе, одръ en la nuna lingvo. Cetere, nur

nun en la modernaj lingvoj slavaj тис = tak-suso; por la slavona kaj la malnovrusa estas registritaj nur la signifoj cedro, pino; tamen tio sonas tro banale, precipe apud la solena кровать. Eble ian rolon tie havis aliteracio (кроватьи тисовой).

6. blua vino: En la rusa folkloro, vodko (kontraste al la verda, t.e. vinbera vino). Eble temas pri rita funebra drinkado, eble pri balzamada procedo.

8. helpantoj: Interpreto de толковины laŭ [Menges, pĝ 146]. Cetere, aliteracio вино – толковинъ.

11. firsto: La nekonata vorto кнѣзь estas same proksima de князь (princo), kiel en la germana First similas al Fürst; do, per analogio oni kutimas interpreti la linion kiel estas en nia traduko, aldonante ne tre konvinkan klarigon, ke por faciligi la suferojn

de mortanto oni kutimis leveti la tegmenton; ĉio ĉi ne estas sufiĉe fidinda, tiom malpli, ke la firston oni kutimas havi ne en, sed sur la palaco. Nikitin proponas legi князь (princo), kaj korekti дъскы (plankoj) al дѣтскы (la junioroj, la junkroj), kio rezultigus:

Miaj junkroj estas jam sen princo
en palaco mia ortegmenta

(male ol la bojaroj, la junioroj servis ne landon sed princon). Tre probablas ke tiel estis en la praverko Bojana; sed en PMI senfirsta tegmento povus simboli la regnon en malordo.

14. boatkorvoj: Estas diversaj interpretoj de tiu loko. Ni akceptas la tradician korekton de босувы al бусовы, kaj traktas tiun esprimon kiel skaldan kliŝon por vikingo (byca estas speco de boato, preskaŭ ŝipo; korvo ĉe la skaldoj estas tradicia simbolo de militisto). Verdire, la sufikso -ов en la

koncerna signifo estas iom anakronisma (tro moderna). Кр 11.44 (kaj 17.23).

15. maldensejo: La originala болонь signifas liberan spacon, ekz-e herbejon ĉe riverbordo aŭ ĉirkaŭon de urbomurego, kiun oni lasis glata por faciligi observon kaj celpafadon dum defendo de la urbo. — **serpentoj densejaj:** en la 1^a eldono estas nekomprenebla дебрь Кисаню; en la carina kopio estas дебрьски сани, kioj almenaŭ estas konataj vortoj (densejaj serpentoj). La traduko «ĉe Plesensko en la fosaĵo estis densa arbaro; la Кіев»anoj jam alpaŝis al la blaŭa maro» [Поемо] baziĝas sur la korekto на болони бѣшя дебрь, кыяне же съшли... — Neniu el la legoj proponitaj por tiu linio estas tute klara.

16. impetis: Ni akceptas la tradician korekton de la sensenca «не сошлю» (несошлю, t.e. «mi ne ekzilos») al несошася. — **blua**

maro: ne maleblas, ke *Blua* estas nomepito (laŭ la irana nomo de la Nigra Maro).

21. konkeri la urbon Tamatarkano: ĉi tiu mencio de Tamatarkano estas la lasta en la tuta malnovrusa literaturo; la kronikoj jam delonge estis pri ĝi forgesintaj. Oni neniel povus imagi, ke Igoro kaj liaj kamaradoj, eĉ malgraŭ ilia tuta politika kaj militista malprudento, planis tian nerealigeblan entreprenon: kun siaj 6–8 mil homoj traŭri la tutan Kipĉakion kaj rekonkeri Tamatorkanon disde la Bizancia imperiestro Androniko I Komneno.

23. senflugigis: Originale припѣшали (faris la flugilojn piediraj, t.e. pritondis).

25. la falkojn: La sensencan самую oni legas самою (ilin mem, sufiĉe regula genitivo dunombra uzata anstataŭ akuzativo kiam temas pri vivuloj); en la carina kopio estas

camoro (lin mem), kio konformus al la mal-liberigo de Olgo fare de kozaroj en la Bojana praverko.

27. en la tria tago: Eble, influo de la Bojana verko (la batalo sur Neĵatina kampo okazis, laŭ la kroniko, en la tria tago de oktobro).

35. geparda aro: Komparoj de kipĉakoj kun la gepardo estas konataj ankaŭ el aliaj verkoj malnovrusaj, ekz-e en Измарагд.

28–30. La verbo погасоста (= estingiĝis) estas en dunombro, kaj la teksto estas misgramatika. Probable en iu el la prakopioj ĉi tiu teksto, kies longo proksimume egalas la longon de manuskripta linio, estis preterlasita kaj poste enŝovita je du manuskriptaj linioj pli malsupre; do, unu el la eblaj ĝustigoj estas movi la liniojn 36–37 inter la liniojn 29/30, ŝanĝante подасть al подаста:

ambaŭ purpuraj kolonoj estingiĝis
kaj en la maron sinkis

kaj grandan furiozon estigis en la ĥinoj.
Jam la mallaŭdo leviĝis sur la gloron,
jam la perforto frapis la liberon,
jam Divo falis sur la teron.

Simila peco troveblas en *Transdoneado*.

— **grandan furiozon estigis en la ĥinoj:** La etnonomo хынове troviĝas en neniu alia fonto (krom *Transdoneado*, kie ĝi estas pruntita el PMI). Iuj vidas tie la hunojn kaj tradukante буйство (nia *furiozo*) per angoro (?) asertas, ke la malvenko de Igoro maltrankviligis la hungarojn. Aliaj legas *ĥanoj*, ktp. Kp v. 13.53.

31. Olgo kaj Sŭetoslavo: Olgo (1174–1208) estis filo de Igoro; Sŭetoslavo Olgido de Rilsko (1166–post 1191) estis lia nevo. Surprizas la manko de Vladimiro Igorido (kp 5.17, 5.24, 6.4, 19.17–18, 20.19). Laŭ Laŭr. Kron. Igoro militiris «kun du filoj», Hip. Kron. mencias nur Vladimiron. Per si mem la fakto, ke Olgo aĝis en 1185 nur 12 jarojn,

ne estas serioza objeto, ja en 1183 Igoro jam estis komisiinta al li (kun lia kuzo Svęto-slavo) rekonduki la Kievajn trupojn [Hip. Kron.]. Ne malprobablas la konjekto, ke la du nomoj estas maltrafa gloso de Mezepoka leganto, tiom pli ke rekta nom'indiko tuj apud metaforo ruinigas ties efekton.

40. Divo falis sur la teron: Malfacilas diri, ĉu Divo favoras la rusojn, ĉu la kipĉakojn, kaj malfacilas rilatigi tion al 4.6. En la upup-teorio oni indikas, ke «ĉe danĝero, la upupo sin ĵetas sur la teron, dissternas la flugilojn kaj levas la kapon tiel, ke ĝia longa beko staras vertikale» [Mal59]. En la standardo-teorio la senco de la epizodo estas evidenta. Io simila estas en «Сказание о Мамаевом побоище»: Вознесется слава руская на поганных, уже бо ввержен скипетр на землю.

41. junulinoj gotaj: Tradicie oni rilatigas

tion al la Krimeaj gotoj, kiuj loĝis en Krimeo ĝis 17 jc; sed ne maleblas, ke temas pri la nordaj gotoj (de la insulo Gotland en la Balta Maro).

45. Ŝarukano: Kipĉaka ĥano, avo de Konĉako, spertinta plurajn malvenkojn, precipe de Svętoslavo, praavo de Igoro, kiu kaptis Ŝarukanon en la batalo ĉe la rivero Snovo (1068-11-01).

12. La ora parolo de Svętoslavo

5. miaj nevoj, Igoro kaj Vsevolodo: Tiel Svętoslavo povis nomi la du princojn nur laŭ la feŭda hierarkio, ja fakte ili estis liaj kuzoj (kp 10.4).

11. karolidaĵo: Armilŝtalo (vd 6.28).

16. Jaroslavo Vsevolodido: Princo de Ĉernigovo (1140–1198), frato de Svętoslavo de Kievo. Almenaŭ trifoje (1183, 1184, 1187) li rifuzis partopreni en militiroj kontraŭ la kip-

ĉakoj.

19–23. *tatranoj, ŝelbiroj, topĉakoj, revugoj, olberoj*: probable, tiuj estas etnonomoj de tjurkaj triboj vasalaj de la Ĉernigova principujo.

24. **botponardo** (засапожникъ): Ponardo kiu estis portata en la botkruringo.

28–29. **la antaŭa gloro**: la gloro de la paseo, de la antaŭa tempo. — **la posta gloro**: La onta gloro; la originala заднюю korektendas al заднею.

13. Voko al la princoj

1. **rimovanoj**: Loĝantoj de Rimovo (Римовъ), urbo ĉe Sulao, prirabita de Konĉako post la venko super Igoro.

2. **Vladimiro**: Princo de Perejaslavlo-la-Rusa (aŭ la Suda), filo de la Kieva princo Glebo Georgido, bofrato de Vsevolodo la Arda

Uro (6.8). Defendante Perejaslavlon kontraŭ Konĉako li ricevis tri vundojn, pro kiuj li poste mortis (1187-04-18), ne atinginte la aĝon de 30 jaroj.

4. Vsevolodo III Georgido la Grandnesta (1154–1212): Princo de Vladimiro-ĉe-Klazmo. Daŭrigante la politikon de sia frato Andreo de Bogolubovo, li pretendis je la titolo ĉefprinco, sen transiri al la Kieva trono. Vladimiro Glebido de Perejaslavlo estis lia nevo.

5. vi devus: duobla infinitivo povas implici devon.

6. la patran oran tronon defendi: Povas temi pri Kievo, kiun cetere la kipĉaka invado rekte ne minacis, aŭ pri la fakte sieĝita Perejaslavlo, apartenanta al la posteuloj de Georgo la Longbraka (vd [kom. 13.4](#)).

10. groŝo: Originale *nogata*, etmonero,

dudekono de grivno.

11. duongroŝo: Originale *rezana*, kvindekono de grivno.

13. ŝereŝiroj: Laŭ la komento de la unuaj editoroj, temas pri «nune jam nekonata armilo». Oni konjektas, ke ĝi estis speco de la «greka fajro». Aliaj tradukoj: mempafiloj [Poemo]; lancoj [Eposo, laŭ Gr σάρισσα, novgreke σαρισσάρι].

14. Glebidoj: Romano, Igoro, Vsevolodo kaj Vladimiro, filoj de Glebo Rastislavido, princ-oj Rezanaj, kiuj partoprenis la militiron de Vsevolodo la Grandnesta kontraŭ la Volga Bulgario (1183). Oni atentigis [Rib72, pĝ 494], ke la Glebidoj estas prezentitaj ĉi tie fidelaj vasaloj de Vsevolodo, kiaj ili estis ekde 1180. Tamen ĝuste en 1185 la bravaj Glebidoj ekribelis kaj malobeis Vsevolodon, pri kio en la malproksima Kievo somere de

1185 oni ankoraŭ ne sciis. Tio estas kroma atesto pri la frua estiĝo de PMI.

15. batalema Ruriko († 1215) kaj Davido (1140–97): Rastislavidoj, pranepoj de Vladimiro Monomaĥo. Ruriko estis kunreganto de Svętoslavo, li posedis la tutan Kievion, krom Kievo mem, kaj la kronikistoj jen lin, jen Svętoslavon nomas la ĉefprinco. En 1183 Ruriko boparenciĝis kun Svętoslavo, edziniginte sian filinon al lia filo Glebo. — Davido, princo de Smolensko, kiun la kipĉakoj neniam minacis, tre malvolonte militis kontraŭ ili. Nur unu fojon (en 1177) la trupoj de la du fratoj kune ekspediciis. Ambaŭ iris kontraŭ la kipĉakoj, sed Davido malfruiĝis kaj la kipĉakoj, prirabinte 6 urbojn, disbatis la kompaniojn de la du princoj, kaptinte multajn bojarojn (la orumitajn kaskojn). [Rib71, pĝ 93]. Kp 15.42–45.

27. Jaroslavo Vladimirido (1130–87): Prin-

co de Galiĉo, bopatro de Igoro. Jaroslavo mortis 1187-08-01, tio donas la plej malfruan limon por dati la Parolon. La epiteto Okpensa en aliaj fontoj ne estas atestita (tamen kurioze, slavona formo por Oktaviano Aŭgusto estas, laŭ la etimo, Осмородень); en la originalo ĝi havas malĝustan kazon (la lokan Осмомыслъ anstataŭ la vokan Осмомысле). La kroniko (la kompilaĵo de 1190) pri li tiel nekrologas:

Tiu princo estis honorata kaj fama en ĉiuj landoj. Mem li ne militiris, sed siajn trupojn sendadis helpe al aliaj, ekz-e al la hungaroj, al la poloj kaj al rusaj princoj, kun militestroj. Kun ĉiuj princoj li vivis en akordo kaj amo; plie li zorgis pri la ordo en sia lando kaj per tio estis timinda por ĉiuj najbaroj. Neniu aŭdacis lin militi, ĉar liaj militestroj, senĉese la grekojn, hungarojn kaj ĉeĥojn helpante, estis spertaj pri la milito kaj kuraĝaj en la batalo. Kaj lia lando abundis je ĉio, prosperis kaj plimultiĝis je homoj, ĉar spertaj majstroj kaj metiistoj el ĉiuj landoj al li venadis kaj en la urboj enloĝiĝis, per kiuj Galiĉio pliriĉiĝis je ĉio. Ĉe Danubo la urbojn li fortikigis, negocistojn tie loĝigis, komercantajn

trans la maron en Grekujo, kaj la aranĝantojn de metioj li ĉiel helpis. Malavara li estis, korfavora kaj justa. Tial multaj alilandanoj al li servis. Sperta li estis pri la lingvo, multajn librojn legis, en la liturgio li multon korektis, kaj la klerikaron ordigante kaj instruante, la superstiĉojn li elradikigadis, la saĝon kaj la ortodokson li instruis kaj instruigis. Kaj la monaĥojn kaj iliajn enspezojn li por la klerigo de la infanoj destinis.

28. Alte vi sidas: Eble temas pri la situo de la Galiĉa kastelo sur alta (75m) monteto.

30. montaro Hungara: Karpato, dislimanta Galiĉion kaj Hungarion.

32. la reĝo: En la rusaj kronikoj de la 12-a jc *la reĝo* (MR король, sen plua precizigo) ĉiam implicas la hungaran reĝon (la regantoj polaj kaj ĉeĥaj nomiĝis *princo*, MR князь).

37. vi malfermas la pordeojn de Kievo: Je 1158-12-22 Jaroslavo kun Mstislavo Izeŝlavido okupis Kievon kaj instalis tie Rastislavon de Smolensko († 1167), la patron de

Ruriko kaj Davido (v. 13.15).

38–39. sultanoj translandaj: Iuj konjektas, ke Galiĉia trupo partoprenis la 3-an krucmiliton kontraŭ Saladino; sed ĝi okazis pli malfrue (1189–92), post la morto de Jaroslavo.

45. batalema Romano Mstislavido (1150–1205): Princo de Volinio (de 1173) kaj Galiĉio (de 1199), fama pro siaj militiroj kontraŭ la kipĉakoj kaj litovoj. Kiu estas Mstislavo, oni ne povas diri certe; eble temas pri kuzo de Romano, Mstislavo Jaroslavido de Peresopnico kaj Lucko, eble pri Mstislavo Vsevolodido de Gorodno. Ambaŭ estis aliancanoj de Romano kaj partoprenis liajn militirojn.

46. vian animon: La originala васъ умъ estas sensenca, oni korektas ĝin al ваю умъ (ваю — dunombra *vian*).

50. brustkirasoj: La originala папорзи est-

as vorto nekonata. Laŭ la kunteksto klaras, ke temas pri defenda armilo; ni akceptas la konjekton, ke temas pri *панепси* t.e. brustumoj.

53. ĥinoj: vd 11.30–32. — jatvingoj: balta tribo, en la mezlatino de la polaj kronikistoj *Jaczwingorum*; probable, ili nomis sin *jatvingas* aŭ *jatuvingas*. — deremeloj: iu nekonata tribo, probable balta.

57. princo estas senduba vokkazo (княже), dum en **Igoro** (Игорю) koincidas vokkazo kaj dativo; sen interpunkcio maleblas decidi, ĉu la signifo estas tiu indikita en la traduko, ĉu «sed nun, ho princo, por Igoro...» Nia traduko (kaj simile [Eposo, Poemo]) sekvas el la tradicia tekstoaranĝo; la malheliĝinta sunlumo respondas al la suneklipso. Laŭ la teorio pri mislokitaj folioj tiu pasaĝo estus parto de la bojara respondo, kaj la alparolo *ho princo* celus

Svētoslavon de Kievo, do pli taŭga estus la dua traduko.

59. la urboj estas dividitaj: Evidente, inter la kipĉakoj, por prirabo.

60. Kp 9.17.

63. La Olgidoj ... ne malfruis al la batalo:

D. Liĥaĉov vidas tie ironiaĵon — unu jaron pli frue Igoro ne iris ĝustatempe kun Svętoslavo kontraŭ la kipĉakoj.

64–65. Laŭ [Rib72, pĝ 489], Ingvaro kaj Vsevolodo estis fratoj de Mstislavo Jaroslavido ĵus menciita (13.45), filoj de Jaroslavo Izęslavido de Lucko, kaj ĉiuj tri Mstislavidoj estas filoj de Mstislavo Rastislavido la Brava.

66. el neaĉa nesto falkoj sesflugilaj: la epiteto sesflugilaj normale aplikiĝis al serafoj, tamen laŭ [Sol64], en la sudslava folkloro ĝi estis aplikebla al falko aŭ al

brava prodo. — Alia ekspliko: 3 princoj = 3 falkoj, ĉiu havas po 2 flugilojn, entute ili havis 6 flugilojn. — Laŭ Liĥačov, temas pri triparta konsisto de falka flugilplumaro.

14. Ekskurso pri Izęslavo de Polocko

1–2. Sulao ... Perejaslavlo: Fakte Sulao neniam fluis apud Perejaslavlo.

— **silkajn**: laŭvorte devus esti *arĝentajn*, sed tio ne donus aliteracion, kian prezentas la originalo.

6. Izęslavo: Polockaj kronikoj pereis, kaj pri tiu princo nenio estas sciata. Eble Svętoslavo mencias Izęslavon, ĉar li mem estis edziĝinta al Polocka princidino Maria Bazilidino, kiu probable estis fratino de Izęslavo kaj aliaj Polockaj princoj, tuj menciitaj.

9. Vseslavo Bręĉislavido († 1101): Princo de Polocko, pranepo de s-ta Vladimiro kaj

lia unua edzino Rogneda. Pri tiu princo «sorĉisto» temas la tuta epizodo 15-a.

13. Eliras lia juna sango kaj li diras: Por ĉi tiu malklara loko oni proponis multe da korektoj kaj interpretoj, neniuj el kiuj estas tute kontentiga, ekz-e:

a) «kaj kaptinte ĝin (la gloron? la herbon?) sur la «morto»lito, li diris ...» (traduko laŭ la disvortigo de la unuaj editoroj, kiun ni lasas en la malnovrusa teksto);

b) «и съ хотию на кровь, а ти рекъ...» → «kun la favorato ĝissange kaj tiu diris...» (ial oni konjektas, ke «хоть» povas signifi *la ŝatata skaldo*);

c) «исходи юна кровь, а ти рекъ» → «eliras la juna sango kaj li diras» — tio estas la korekto kiun ni akceptis; laŭ ĝi, la princo mem sin mem alparolas, kio sonas tre nenature, sed la ceteraj korektoj estas ankoraŭ pli malnaturaj.

Do, en Esperanto ni nun havas ĉiujn tri skolojn:

(a) Poemo:

li forrabis la gloron de sia avo Vseslavo, kaj li mem sub purpuraj ŝildoj sur sanga herbo per litvaj glavoj mortigita estas kaj li kaptis ĝin (tiun gloron) sur sian mortliton kaj diris ...

(b) Eposo:

Vasilkido Izjaslavo
per la glavoj siaj akraj
grincis al litvanaj kaskoj
sed estante sola, gloron
de Vseslavo, sia avo
malaltigis nur per tio,
mem estante sub purpura
ŝild', sur herb' sangokovrita
per litvanaj mortbatita
glavoj kune kun amiko,
kaj mortante tiu diris...

(c) — nia traduko.

17–18. Bręislavo Bazilido unufoje estas menciita en Hip. Kron. (sub 1180); pri **Vsevolodo Bazilido** informoj mankas.

20. la ora kolumo: Loza kolumo de la prin-

ca vesto, kutime garnita je oro kaj juveloj.

23. trumpetas en Gorodno la trumpetoj:

Probable Izeŝlavo Bazilido estis la princo de Gorodno (aŭ de Grodno, precizaj informoj pri la Polockiaj princoj mankas). La minora intonacio de tiu verso pensigas pri kapitulaca trumpetado.

24. praidoj de Jaroslavo kaj de Vseslavo:

D.S. Liĥačov proponis korekti Ярославe al Ярославли (farante el la vokkaza *Jaroslavo* posedan adjektivon *Jaroslava*); tio estas pli konvena al la kunteksto, kie temas pri la konfliktoj de posteuloj de Jaroslavo la Saĝa kun la Polockaj princoj, precipe la posteuloj de Vseslavo.

26. plantu: С вънъзити = πηγνύναι; pli tradicia neŭtrala traduko estus *eningigu*.

— **viajn glavajn agacitajn:** eblas diversaj interpretoj de la participo верезени:

- de la verbo вредить: aŭ *difektitajn* (la plej ofta traduko, tiel [Eposo, Poemo]), aŭ *malhonoritajn*. Etimologie la ĉefa signifo de la verbo estis *inciti*, la nuna вредить signifas *noci, malutili, damaĝi*;
- de la verbo вергать, do (*for*)*ĵetitajn*.

30. la lando Rusa: Ĉi tie malvastsence, t.e. la Kieva domajno.

31. la posedaĵo Vseslava: La posedaĵo de la Vseslavidoj, la Polocka lando (nun Bjelarusio).

15. Ekskurso pri Vseslavo de Polocko

1. la sepa periodo de Trojano: Estas pluraj interpretoj de ĉi tiu enigma loko.

- D.S. Liĥaĉov opinias, ke Trojano simbolas paganismon, «la sepa» egalas al «la lasta», do ke ĉio signifas «en la fina periodo de la paganismo»;

- laŭ B. Ribakov, temas pri 7 jarcentoj post la falo Romio, kiun ŝtaton la slavoj ek-konis sub imperiestro Trajano.

Mirindas, ke la fakuloj ne rimarkas la komik-an misproporcion de la eventoj: la falo de monda imperio aŭ ideologio — kaj amafero de juna princo; eĉ se oni akceptas, ke la jun-ulino estas Kievo aŭ Novgorodo, la mis-proporcio restas tro granda. Tial ne pli malbona estas la konjekto [Kar89], ke eble Trojano estis militista dio, kaj ke «la sepa periodo Trojana» estas la sepa jaro de lia vira aŭ militista aĝo. Pli mallongigante la periodojn, iuj konjektas, ke temas pri la sepa monato de la regado de Vseslavo en Kievo.

4. li sin apogis je ĉevaloj: Vd I.3. Ĉi tiu loko estas la sola en la verko, kie la ĉevaloj estas nomitaj кони (aliloke aperas la vorto комони).

6–7. tuŝis per la lancpinto la oran tronon Kievan: Vseslavo restis sur la trono nur 7 monatojn. En la malnovrusa «preni urbon per la lanco» signifis «venkopreni urbon».

8. kiel linko: En la originalo estas *ferocbeste*, kaj *la fera besto* estas folkloro kiel por la linko.

11. elŝiris da bonŝanco li tri pecojn: De post [Jak58] oni kutimas korekti la originalon «утръ же возни стрикусы» (la vorto стрикусы estas nekonata) al «утръже вазни съ три кусы». Ni akceptis tiun konjekton, kvankam strangas rigardi la salton al Nemigo «bonŝanca» por Vseslavo. Malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj gramatikaj oni povus traduki laŭ A. D. Liŝačov per «elŝiris li bonŝancon en tri provoj: malfermis la pordegon de Novgorodo».

12. malfermis la pordegon de Novgorodo: dufoje (1063 kaj 1067) Vseslavo okupis Novgorodon la Grandan.

14. Nemigo (Bj *Няміза*): lama rivero ĉe Minsko (sekiĝinta, nun strato en tiu urbo). — **Dudutkoj:** vorto nekonata, probable loknomo.

13. disbatis la gloron de Jaroslavo: Prirabinte Novgorodon, Vseslavo por kelka tempo rompis tie la ŝtatan ordon establitan per la ĉartoj de Jaroslavo la Saĝa, kiu regis en Novgorodo ĝis 1016. Kp 14.24.

22–23. la homojn juĝis, al la princoj urbojn distribuis: T.e. per siaj sorĉoj Vseslavo influis la sorton de la homoj.

24. dumnokte li vagadis lupe: La temo pri lupfantomo estas tre malnova, praarja tradicio.

25. kokkrio: Estas pluraj interpretoj de la

vortoj «до Куръ Тматороканя».

Por iuj Куръ [kurъ] estas spaca limo:

- la urbo *Kursko* (en la Unua Eldono),
- la Kaŭkaza rivero *Kuraŝo*, aŭ
- la muregoj de Tamatarkano (laŭ la tjurka *qora, qura* = «barilo»);

por la aliaj, limo tempa: «ĝis la matena kokokrio» (куръ=virkoko; tiun interpreton de N.M. Karamzin akceptas la pliopo de la fakuloj, Poemo kaj Eposo; ankaŭ ni ĝin adoptis).

Laŭ pli ekzota teorio [NF90], temas tri mita kokego, simbolanta la subteran mondon, pri kiu raportas slavona apokrifo. La plej forta angumento de la aŭtoroj estas, ke en du kopioj de PMI tiu vorto aperas ĉeflitere, kiel nomo propra; laŭ la aŭtoroj, la historio de la apokrifo etendiĝas ĝis la sumeraj mitoj (amiko de Gilgameŝo, Enkidu mortas en batalo kun transmonda Kur). Laŭ tiu teorio, «ĝis Kur» signifas «ĝis la fino de ĉi tiu

mondo».

26. Ĥors': Praslava sundio (vd [kom. 2.21](#)).

— **la vojon transtrotante**: La suno moviĝas de la oriento okcidenten, Vseslavo sin movis al Tamatarkano de la nordo sud-orien.

27. matenlaŭdo: R утренняя Gr ὄρθρος L Laudes Matutinae, la PIVa *matutino*: Nokta diservo, kiu principe kaj mezepoke devus finiĝi ĉe la tagiĝo (inter la diservoj noktomeza kaj tiu de la unua kanonhoro).

30. en alia korpo: Tradicie oni korektas друзѣ тѣлѣ (en alia korpo) al дръзѣ тѣлѣ (en aŭdaca korpo); tamen tiu korekto estas superflua se oni atentis la skaldan kliŝon eigi einhamr (plur-uja, t.e. havanta pli ol unu korpojn).

35. sorĉulo sperta: La traduko implicas korekto de la originala птицю горазду (la birdo inĝenia) al пытьцю горазду

(MR пытыливый povis signifi *sorĉopova*).

40. malnova Vladimiro: Eble Monomaĥo, kiu efektive ofte militis kontraŭ la kipĉakoj; tamen multaj fakuloj vidas tie s-tan Vladimiron.

16. Lamento de Jaroslavidino

1. Danubo: Oni kutimas komenti, ke «*Danubo* estas eposa riveronomo, disvastiĝinta ĉe la slavaj popoloj; kiel multaj aliaj akvejnomoj orient-Eŭropaj, tiu vorto (Дунай) devenas el la irana vorto por rivero».

— **Jaroslavidino:** edzino de princo Igoro, filino de Jaroslavo la Okpensa (vd [kom. 13.28](#)). En la kronikoj ŝia baptonomo ne estas indikita; laŭ ne tre fidinda tradicio oni supozas ĝin esti Eŭfrosinia. — La esploristojn surprizis, ke ŝia lamento ne mencias la filo(j)n de Igoro, oni klarigis tion per la konjekto, ke ŝi estis dua edzino de Igoro, kaj eĉ

indikis daton de ŝia edziniĝo: 1184 [Poemo]. Tio ne estas fidinda.

3. kiel mevo: Surbaze de *Transdoneado* kaj «Моление Даниила Заточника» oni konkludis, ke zegziца estas kukolo [Poemo]; tamen poste en dialektoj ukrainaj kaj rusaj oni trovis la vorton зігзічка kun la signifo *mevo*. Certe, mevo pli konvenas por flugo super rivero. Oni ankaŭ indikis la kliŝ-on чайка небога en la ukraina folkloro, kiu same simboligas sopirantan virinon per mevo.

4. batista maniko: бeбрянъ ne estas бобровый (kastorfela, laŭ multaj tradukoj, i.a. Poemo); en la malnovrusa tiu vorto signifis «fajna ŝtofo, precipe silka».

9. vent' ventulo: вѣтрѣ → вѣтрє.

14. supre sub la nuboj blovi: La traduko laŭ korekto de горъ al горѣ en 16.14; sen

tiu korekto la traduko estus: Ĉu ne sufiĉus al vi montoj subnubaj por blovi ...

19. en Putivlo sur la mur' de l' urbo: alternado de la formoj slavonaj kun la praruse plenvokalaj; stila efekto.

20. Dnepro la Slavido: La malofta epiteto Slavido (Словутич, Славутич) aperas ankaŭ en la «Versfabelo pri Suĥano», kie la protagonisto venas «ко быстру Днепру Слаутичю»; krome, Дніпро Словута estas konata en la ukraina folkloro. La epiteto estas kalembura kombino de la vortoj слава (gloro), слыть (esti fama) kun la nomo de la rivero Славута (Slavuto), alfluanto de Pripetio, kiu mem estas alfluanto de Dnepro. Atentindas la epiteto «glora Dnepro» en la enkonduko de *Transdoneado*.

21. Vi trabatis la rokojn ŝtonajn: Temas

pri la famaj Dnepraj kataraktoj. *Transdoneado* aplikas la saman aserton al Dono, kiu kataraktojn ne havas; do, tio estas unu el la argumentoj pri tio, ke ne PMI estas falsita el *Transdoneado*, sed ke ĉi lasta estis influita de PMI.

34–35. arkojn malstreĉis ... sagujojn

fermis: Oni kutimas interpreti спряже laŭ la senco de similaj verboj en modernaj slavaj lingvoj (la ĉeĥa spřahati «kuntiri» ktp): arkojn tordis, «fleksis» [Eposo]. Tamen tiu pasaĝo klare kontrastas kun 3.19–20 («la pafarkon ili tenas streĉita, la sagujo pretas malfermita»), kaj la prefikso съ povas signifi ne nur kunigon, sed ankaŭ forigon, malfarigon. Tial en la malnovrusa ni havas, unuflanke, сънати сѧ (kuniĝi, kunveni, kongresi, el kiu devenas съньмъ kongreso, asembleo; R сонм, Slovaka snem, P sejm) — sed ankaŭ R снять, U сняти (depreni, for-

meti, forigi). Simile la morfologion de съпрачи oni povus rigardi identa al tiu de F détendre (malstreĉi).

17. La fuĝo

11. Don·et·o: Ĉar en la malnovrusa lingvo Доньць estis iu alia rivero ol la nuna Don-eco, ni tradukis tiun nomon, kies strukturo motivas la kontrastigon *la granda Dono — ja malgranda Doneto*.

12. Ovluro: Nomo de la kipĉako fuĝinta kun Igoro en Rusujon. Estas pluraj etimologioj de tiu nomo; i.a. ĝi povus esti tjurkigita formo de la kristana nomo Laŭro.

14. princo Igoro ne estu! La ĝenerala senco ŝajnas klara, kvankam la teksto probable estas difektita.

15. Vokis: La subjekto de tiu verbo povas esti aŭ Ovluro, aŭ la tero.

18. вежи ся половецкіи подвизашася:

Erago, duobla ся; oni korektas: вежи ся половецкіи подвизаша.

— **la tendoj ... ekmoviĝis:** el la kunteksto kaj laŭ ilustraĵoj de la Radzivila kroniko evidentas, ke temas pri speco de ruldomoj (Ркибитка).

21. klangulo blanka: En la moderna bird-nomaro белый гоголь malestas; oni konas simplan гоголь (klangulo), kies koloro estas malhele griza, tamen printempe en la plumaro de la maskloj aperas multe da blanko.

23. griza lupu: Novruse бусый estas dialekta vorto kun la signifo brunagriza; probable ĝi estas pruntita el tjurkaj lingvoj, kiuj havas ĝin kiel epiteton en priskribaj nomoj de tabuaj bestoj: «boz qarya» (korvo), «boz qurt» (griza lupu).

33. ĉevalojn: La vorto estas en dunombro,

do Igoro kaj Ovluro havis nur po unu ĉevalon.

18. La rivero Doneto

15. vanelo: Oni kutimas traduki per mevo pro la fonetika proksimeco al la novrusa vorto (чаица→чайка); en la lamento de Jaroslavidino estis uzita alia vorto, kion oni eksplikas per konjekto, ke temas pri diversaj subspecoj. Tamen en la nunaj Brjanskaj dialektoj чаица signifas vanelo, kio biologie ŝajnas pli trafa.

17. Stugno, Стýгна: Dekstra alfluanto de Dnepro, enfluanta ĝin sub Kievo, iom pli supre ol Tripolo.

19. fremdaj torentoj kaj rojoj: Kiuj fluas el la Kipĉaka stepo.

20. largas ĉe la elfluejo: Tiun legon donas la disvortigo: ро́стрена к у́сту. Fakte la nuna Stugno estas nelargâ kaj malprofun-

da, tial la disvortigo de la unuaj editoroj, se oni ĝin interpretas kiel «kroĉis per arbusto la junulon...», bone klarigas, kiel princo Rastislavo, sendube bona naĝulo, povis droni en tia rivereto [Ŝkl90, pĝ 382–386].

21. la junulo princo Rastislavo: Princo de Perejaslavlo, pli juna frato de Vladimiro Monomaĥo, droninta en Stugno 1093 fuĝante kun li de la kipĉakoj post malvenko. Li aĝis 22 jarojn.

22. sur la fundo ĉe la bordo: La originala formo estas misgramatika (Dnepra ĉe la malhela bordo, kun nominativa, ne lokkaza Dnepra), sed la korekteto de «Днѣпръ» al «днѣ при» rezultigas la pli konvenan signifon de ni akceptitan. Cetere, Rastislavo dronis tute proksime ĉe la loko, kie Stugno enfluas Dnepron, do tiu asonanco, kiu antaŭsentigas la riveregon, eble ne estas hazarda [Ŝkl90].

— **malhela**: Probable temas plie pri la metafora senco de funebro ol pri la koloro.

24–25. Netradukita aliteracio: по уноши — Уныша.

19. La postkuro

6. la kolubroj rampis: Tiun tradukon rezultigas korekto de по лозію al полозіе. Sen la korekto la senco estus: nur rampis sur la branĉaro. En la originalo estas aliteracio: «полози ползали», kiu fonetike pli proksimas al «половци» ol «kolubroj rampis» al «kipcakoĵ».

17–18. falkidon ni ligos per junulino: Vladimiro Igorido revenis Novgorodon edzigitte al Konĉakidino (1187) kaj «kun infano».

— **ligi** (опутати) estas kaj falkĉasa termino, kaj simbolvorto de la geedziĝa folkloro.

20. Igoro en la Rusa lando

1. Diris: La verbo havas malĝustan nombron (dunombra aoristo estus рѣкоста аŭ рѣста, dunombra perfekto рѣкла еста); iuj opinias ebla, ke la verbo agordu kun unu sola el la du subjektoj (simila pasaĵo el la *Komenca Kroniko*: И рече Свѣнелдъ и Асмолдъ...).

— **Ĥodina:** mankas informoj pri tiu persono. La unuaj editoroj legis «ходы на» t.e. «iris kontraŭ», kio ne donas kontentigan sencon.

2. Sveltoslavo: Nur preterpase PMI mencias tiun Jaroslavidon, la prapatron de la Olgidoj, kiu unua venkis la kipĉakojn. Tamen jam dufoje prezentiĝis okazon lin mencii: la prava gloro de la ĉernigovanoj (12.27) kaj la venko super Ŝarokano (11.45) estis liaj faroj.

4. Olgo-ĥano: La titolo *kahan* (en la traduko ni uzas internacie pli konatan pli malfruan formon *ĥano*) aperas en la ĉinaj kronikoj ekde 312 p.K. Ĝi apartenis al regnestroj tjurkaj kaj egalas la imperiestran (kun tiu signifo pli malfrue, en la epoko de la protagonistoj, ĝin prenis Temuĝino — Ĉingis-ĥano). Post liberiĝo de Rusujo el sub la dependo je Ĥazara kahan-regno, la titolon kahano provis alproprigi princoj Kievaj, rezervante ĝin por eksterordinare solenaj okazoj. Sed en la 12 jc tiu titolo ne plu estis aplikata al la rusaj princoj). — La titolado de Olgo per kahano povis estiĝi pro lia longa regado en Tamatarkano, kiu antaŭe apartenis al Ĥazario; estas konata greklingva sigelo el la fino de 9 jc:

Miĥaelo (tiu estis la baptonomo de Olgo), arĥonto (t.e. princo) de Ziĥia, Matraĥo (en la posta historio Tamatarkano estas konata sub la nomo Matrika) kaj Ĥazario.

Tio kontrastas kun la sigeloj de aliaj rusaj

princoj, ekz-e de Monomaĥo, kiu titolis sin «arĥonto de Rusujo».

12. Boriĉevo: En Kievo Бори́чев взво́з (la nuna Андреевский спуск) estas la plej mal-longa vojo de la Supra Urbo al Podol'.

13. la Sankta Dipatrino Pirogosĉa: kirko en Kievo, en Podol, konstruita en 1132 kaj nomita laŭ ĝia Bizancia ikono de la dipatrino. La neoficiala nomopiteto Pirogosĉa (Пирого́щая) restas neklara; iuj devenigas ĝin el Gr Πυργώτισσα (tura), aliaj vidas en ĝi posedan adjektivon de la nomo Πιργότης (konjekteble, la nomo de negocisto aŭ bojaro alportinta la ikonon el Konstantinopolo).

— Se Igoro rajdas laŭ Boriĉevo al la Pirogosĉa, temas ne pri lia enveno Kievon, kiel oni tradicie opiniis, sed pri lia hejmeniro el la Supra Urbo (kie situis la ĉefprinca rezidejo) al la Ĉernigova lando.

— Kial la aŭtoro, ĝis nun tiom indiferenta pri la kristanaĵoj, subite mencias tiun duarangon kirkon ĉe la Kieva bazaro, kaj ankoraŭ konstruigita ne de parenco Olgido sed de malamiko de la Olgidoj, Mstislavo la Granda? Laŭ kalkuloj surbaze de malrektaj indikoj oni [Rib71, pĝ 277] opinias, ke Igoro estis revenanta meze de aŭgusto, eble la 15-an de aŭgusto, je la tago de la Endormiĝo de la S-ta Dipatrino, kiu estas altarfesto de tiu preĝejo.

17–19. Svętoslavido ... Vsevolodo: La kursivofinaĵaj vortoj en la fontoj havas diversajn kazojn, sed ne la bezonatan ĉi tie dativon; *Igorido* estas dativa en la Unua Eldono, sed nominativa en la carina kopio. Probable ili estas glosoj de iu leganto.

23–24. kaj al la kompanio! Amen: Miskompreninte la konjunkcion a (vd kom 1.7), almenaŭ du tradukistoj mistradukis novru-

sen tiujn vortojn per «Gloron al la princoj, dum al la [pereinta] trupo eternan memoron!».

Glosaro esperanta

avare•oⁿ: Gr ἄβαρ, ἄβαρειος L avarus, avari. Memnome probable estis ἄπαρ, κρ MR ωбърѣ. La formon *avareo* uzis J. Lindstedt (Literatura Foiro, 1996, № 2).

Belgorod•o: U Білгород

bjelarus•o: ... L Russia Alba.

Boris•o: slava virnomo tjurkdevena, laŭ la nomo de la Bulgara ĥano kristaniginta Bulgarojn (864 p.K.). Gr Βόγορις, Βώγωρις, Βορίσης, mongole bogori (=malgranda, kiel la latina Paŭlo). — Кр Glebo.

Bojan•o, MR Боянь:

Bręčislav•oⁿ: R Брячислав, Bj Брачислаў, Ć

Břetislav (ĉiuuj el [brʌĉislavъ]). — 14.6.

ĉef·princ·oⁿ, grandprinco: (R великий князь).

ĉerkes·o: la vorto uzita jam en: Ĉerkesaj Rakontoj / Kolektis Georgo Davidov. — Esperanta Universala Biblioteko. N-ro 6 (Ĉerkesa serio I.) — Budapeŝto, 1908. — Kr kasogo. R черкес, адыг Turke çärkäs??.

Ĉernigov·o: U Чернігів.

Dajbog·oⁿ: vd [kom. 7.20](#).

Daŭgav·o, Bj Дзвіна: rivero 1200 km longa, fluanta de Valdajo en Rusio tra Bjelorusio kaj Latvio ĝis la Riga golfo de Balta maro. Ni preferis la latvan nomon por malkonfuzi tiun «okcidentan» riveron disde la «norda» Dvino (vd en PIV).

Desn·oⁿ: R Десна.

domajn·on R волость, удел; домен. — La

vorto estas ankaŭ termino matematika (la variejo de variablo).

Donec•o: «Rivero en Sovetio, alfluanta en Donon (40°55'E, 38°34'N)» [PIV]. R Донец Северский U Донець (17.11).

Don•et•oⁿ, MR Доньць: Ĝi ne estas la nuna [Donec•o](#), kiun oni nomis la Granda Dono, sed (probable) ties dekstra alfluanto, la rivero Udo (R Уды, pluralforma nomo) [Rib71].

Don•o: en la kronikoj tiel nomiĝis Doneco kaj la malsupra parto de nia Dono, ekde la enfluejo de Doneco [Rib71].

du•nombr•o, dual•o: «Deklinacia aŭ konjugacia nombro, uzata kiam oni parolas pri nur du aferoj» [PIV]. En PMI tiu formo estas sufiĉe kohere uzata (ĝi kadukiĝis dum la mongola invado).

frank•o: «okcident-eŭropano», poste kaj

precipe en Krimeo: «ĝenovano, italo». MR фрѡгъ — tra Gr φράγκος (franko) el L francus.

Galiĉ•o: (P Halicz); Galiĉio estas ĝia regula derivaĵo, preferinda ol la PIVa

Galicio. Eŭropa regiono, norde de Karpatoj, dividita inter Polujo kaj Ukraino.

U Галичинá P Galicja (el mezlat. Galicia el MR Галичъ, malnovrusa adjektivo signifanta *moneda*).

Georg•o: La kronikoj tre varie rusigas tiun nomon; ekz-e oftas la formoj MR Юргъ, Гюрги, Дюрги [Jurg, G'urg, Ĵurgî].

Gleb•oⁿ: Orientslava virnomo, MR Глѣбъ, el la varenga Guðleifr. Kp Boriso.

grivn•oⁿ (гривна): La baza monunujo de la Kieva Regno (duonfunto da arĝento).

St-Hipat•a kronik•o, Hip. Kron.: La kroniko (612 paĝoj en manuskripto de la 14^a jc)

trovita en la monaĥejo de s-ta Hipato, R Ипат(ьев)ская летопись. — **Hipat·o**: greka-rusa vira antaŭnomo, de Ὑπατος (plej alta, supera).

Ĥazar·o·jⁿ: Tjurka popolo, aperinta norde de Kaspio post la huna invado (4^a jc), mezgreke Χάζαροι, perse [Bar ul Ĥazar] (Kaspia maro), hebree [kozar], MR козарє. — **Ĥazar·i·o**: En la 7^a jc la Ĥazara regno etendiĝis de Dnepro kaj Krimeo ĝis Ural-rivero, norde ĝis la meza Volgo kaj la fontoj de Doneco. En la 8^a jc la regantoj de Ĥazario konvertiĝis al judaismo. En la 10^a jc Ĥazario pereis invadite de Peĉenega hordo oriente kaj de la rusoj (Svętoslavo Igorido) okcidente.

Igor·o: rusa antaŭnomo vira, en la kronikoj Игорь аŭ Инъгваръ; ĝi devenas el la skandinava Ingvarr.

Izęslav·oⁿ: slava virnomo, R Изяслав.

Jaroslav·oⁿ: slava virnomo, R Ярослав (ardo + famo).

junior·oⁿ, junkro: vd sub [kompanio](#); kp [senioro](#).

Kafa', Kafao: la nuna Teodozio (U Феодосія); en la 14 jc, kolonio de ĝenovanoj en Krimeo. R Кафа́, Gr Καφάς It Caffa.

Kiev·i·o: la Kieva princo, tradicia domajno de la Rusujaj ĉefprincoj. Ofte oni ĝin nomis «la Rusa lando» (la plej malvasta signifo de la termino).

kipĉak·o·jⁿ: en la (pra)rusa estas tri vortoj por tiu tjurka popolo: куманы (kumanoj, vd), кипчаки ([kipĉaki], ununombre [kipĉak']) kaj половцы ([polovci], ununombre половец [polovec]).

La formon «kumanoj» adoptis la okcidentaj kronikistoj (en la Mezepoka Latino *Cuni*, sed kp ankaŭ *Codex Cumanicus*); tiu formo

oftas en la okcidenta scienco.

La kronikoj orientaj, de la Ĉinaj (201 a.K., 欽察/鎭察, Qīnchá, ĉjin-ĉa) ĝis la Islamaj (persaj, arabaj) konas nur la nomon *kipĉako* [qipĉak]. Kelkaj sciencistoj opinias, ke proksimume en la epoko de PMI estiĝis du hordoj, el kiuj por la okcidenta pli oftas la nomo *kumanoj*, kaj por la orienta, la nomo *kipĉakoj* (ilin dislimis la rivero Dnestro). Tiel oni povas oportune distingi inter la Hungaria Kunság (Kumanio, G Kumanien, Kumanaei) kaj la orienta «Lando Kipĉaka» (Deŝt-i Qipĉak)

La tria (polovcy) praruse signifas flavuloj (kp G Valwen). Tiu nomo iom internaciigis pro la opero «La princo Igoro».

klan•o: ni preferas uzi tiun vorton por la unua el la PIVaj signifoj de gento, ĉar la vorto gento havas ankoraŭ la signifon de tribo, kiun ni ankaŭ bezonas.

kliŝ-o: en la skalda poezio, parolfiguro per kiu oni anstataŭigas komunan nomon je poezia parafrazo (kenning); ekz-e, gajligno anstataŭ liuto, ktp.

kompani-o: tiel ni tradukas la specialan vorton MR дружина (R дружина, L comitatus, Gr συνοδία, συστρατίται, ἑταῖροι). En la Kieva Regno (kaj aliaj Mezerokaj slavaj landoj) tiel estis nomata grupo de homoj (kelkcent, malpli ol milo), dungigintaj por servi princon en milito, administrado de lia princo kaj de lia persona bieno; ĝi sekvis la princon kiam li ŝanĝis domajnnon, do ĝi similis lian personan teamon (en la moderna ĉeĥa tiu vorto havas la signifon sporta teamo). En diversaj epokoj la funkcioj de la kompanio variis, kaj kvankam ĉiam la milita aspekto restis la plej grava, tamen en la 12 jc la administraj funkcioj estis tre rimarkindaj. Princa kompanio konsistis el du partoj, la

supera, aŭ seniora (старшая дружина, «la pli aĝa kompanio, la bojaroj») kaj la mal-supera, juniora (молодая дружина, гридь, дѣцки — «la juna trupo, infanoj, jun-kroj»). — Atentindas, ke ruse (kaj sporade jam praruse) la vorto дружина estas «varma», el ĝi devenas la vorto друг (unue voj-kamarado, poste amiko), tiel ke por la moderna ruso ŝajnus natura traduki ĝin per amikaro, frataro [Eposo], aŭ almenaŭ kamaradaro. Post la 14^a jc oni preferas pli precizajn vortojn (bojaroj, kavaliroj ktp); malaperas la fenomeno, arĥaikiĝas la vorto. — La koncernaj esperantaj signifoj de la vorto kompanio estas:

«4 Kuniĝo de pluraj personoj, akompanantaro ... 5 mil. Grupo el pluraj plotonoj, subdivido de bataliono, normale komandata de kapitano ... vd roto» [PIV].

Do, kompanio kombinas la signifojn akompanantaro + militista unuo (bulgare дружина nun signifas bataliono), kaj la sig-

nifo «1 Kuniĝo de personoj kune direktantaj komercan aŭ industrian aferon», neaktuala en la Mezepoko, iel similas administradon. Ni provis ankaŭ «gvardio»n, sed ankaŭ ĝi aspektas nenature en la teksto, tiom pli ke fojfoje дружина estas uzata en la ĝenerala senco de batalantoj, kaj profesiaj, kaj milicianoj. Alia pripensinda vorto estas trupo, kiu verdire esprimas nur la militistan signifon, sed nemalgrava cirkonstanco estas, ke en la slavlingva skolta movado (slovaka, pola ktp) la vorto *družina* servas por traduki la anglan *troop*, kaj estas esperantigata per trupo; tamen finfine ni rezervis la «trupo»n por плъкъ.

kuman-o-j: okcidenta tjurka popolo, kies orientan branĉon ni nomas kipĉakoj (vd tie). La okcidenta limo de la kumana migrado estis Bulgario, kie ili rapide kristaniĝis kaj asimiliĝis: la fondintoj de la Dua Bulgara

Regno, fratoj Teodoro (de 1186, reĝo Petro), Aseno kaj Kalojano devenis el kumanoj.

Kura•oⁿ: Kaŭkaza rivero fluanta el Turkio tra Kartvelio kaj Azerbajĝanio en Kaspion. R Кypá, A Kura, F Koura.

Laŭrenc•a kronik•o, Laŭr. Kron.: pergamena manuskripto, kopio de kroniko kompilita en 1305. La kopion mendis princo Demetrio de Suzdalo, la laboron prizorgis monaĥo Laŭrenco (1377). Musin-Puŝkin aĉetis ĝin en 1792 kaj poste donacis al imperiestro Aleksandro la Unua. R Лаврентьевская летопись.

lup•fantom•o: «Sorĉisto kiun oni kredis kapabla aliformiĝi en lupon» [PIV].

Monomaĥ•id•o•jⁿ, MR Мономашичи: la klano de la posteuloj de Vladimiro 2^a Monomaĥo, rivaloj de la Olgidoj. La unua

dinastio de la rusaj caroj apartenis al tiu branĉo.

Mstislav·oⁿ: slava antaŭnomo vira (venĝo+famo); MR Мъстиславъ, obodrite Mistzlavus, ceĥe Mstislav, P Mścisław.

Olg·id·o·jⁿ, MR Ольговичи: la klano de la posteuloj de Olgo kaj Davido Svętoslavidoj (de nepoj de Jaroslavo la Saĝa), rivaloj de la Monomaĥidoj. Genealogie la Olgidoj estis branĉo seniora, tamen ĉar Monomaĥo mal-ebligis al Davido kaj Olgo iĝi ĉefprinco, ili devus perdi la rajton je seniorado; malgraŭ tio Vsevolodo II Olgido (la patro de ĉefprinco Svętoslavo el PMI) sukcesis reakiri tiun rajtojn por sia klano.

Olg·o, Olego: MR vira nomo Ольгъ, devenanta el la varenga Helgi, parenca al G heilig, «sankta». Internacie pli konata estas la responda innomo Olg·a [PIV], varenge Hel-

ga (kiu iĝis "Ελγα en la Bizanciaj kronikoj). En la modernaj orientslavaj lingvoj la vira formo estas malregula (pro la nefuĝema e: Олегу, Олегович) kaj nesimetria kun la ina; nu, almenaŭ por verko malnovrusa ni restituis la simetrion.

or·a: poezia kliŝo esprimanta rilaton al la princa aŭ ĥana rango (ora kasko, ora selo, ora piedingo, sago orumita).

paronomazi·o [PIV].

peĉeneg·o·jⁿ: en 8–9 jc, hordo de tjurkaj kaj sarmataj triboj en la Transvolga stepo; en 9–10 jc, disbatinte la Ĥazaran regnon, la peĉenegoj penetris la sud-Rusujan stepon; post 1036 la Kieva Regno sukcesis forpuŝi ilin al Hungario kaj Bulgario, kie en bataloj kontraŭ Bizancio la hordo pereis. — MR печенѣгъ, Gr παζινάκος, L Pacinaci, Bissenî, hungare besenyö, arabe paĉanak, F Pet-

chenègue, G Petschenegen.

princ•o: MR кѣнась, R U князь. Gr ἄρχων, ἡγεμών, βασιλεύς, κόμης. Ekz-e en Juĝistoj 8:3; 7:25; 8:14.

Radzivil•a kronik•o, Königsberga kroniko: malnovrusa kroniko ilustrita, en la 16^a jc trafinta en Pollandon; en la 17^a jc ĝin posedis J. Radziwiłł, poste ĝi pasis al Königsbergo. Venko super Frideriko II revenigis ĝin en Rusion, kie ĝi iĝis publikigita (1767; faksimila eldono en Peterburgo, 1902). La kroniko entenas i.a. 8 miniaturojn pri la militiro de Igoro. Kvankam la papero estas de la 15 jc, laŭ multaj indikoj (la vestoj, la armiloj ktp) la historiistoj opinias tiujn ilustraĵojn kopioj de bildetoj el la fino de la 12 jc.

Rastislav•oⁿ: slava virnomo, i.a. de la Moravia princo, per kies iniciato komenciĝis

la agado de s-ta Cirilo; en PMI — vv. 18.21–24 (R U Ростислав, S Растиславъ, slovake?? Rastislav, Bj Расціслав) [SA80, pĝ 23].

Rezan•o:

Rosj•oⁿ, MR Ръсь: dekstra alfluanto de Dnepro.

rot•o: «1 Taĉmento da soldatoj, pli malpli regule organizitaj ... 2 Aro da kune irantaj homoj aŭ bestoj ... roto da perdrikoj, da sovaĝaj cignoj» [PIV].

Rurik•oⁿ: rusa virnomo (R Рюрик, Bj Рурык, Gr Ρούρικας), i.a. de la prapatro de la unua dinastio de la Rusujaj princoj. De la varenga Hrǫrekr (t.e. «famo + reĝo»; kp Islandajn hródr, ríkr), responda al G Roderich, PIVe Rodrigo.

Rusa lando:

1. la Kieva Regno, la tuta regno de la Rurikidoj

2. Suda Rusujo, la kerno de la regno, komuna apartenaĵo de la Rurikida gento, redistribuata konforme al la seniorado; do, Kievio (la Kieva prinĉujo), ĉu sola, ĉu kun la landoj Ĉernigova-Sjevera, Perejaslavla prinĉujo kaj la baseno de la rivero Rosjo — kontraste al la apartiĝintaj landoj, kiuj iĝis heredaĵo de la subklanoj: Polockio, Galiĉio, Suzdala lando, Rezanio.

- Novgorodo la Granda, kvankam parto de la komuna apartenaĵo, ne estis tiel nomata.
- Ne ĉiam oni povas senhezite distingi tiujn du signifojn.

Rus·uj·o: tiu vorto ŝajnas oportuna traduko de la tradicia termino Киевская Русь (laŭvorte, Kieva Rusujo); la iom arĥaikiĝinta sufikso -uj ebligas distingi inter la moderna Rusio kaj la malnovrusa Rurikida regno. Vd ruso, Rusa lando, Kievio.

rus·o: Historie tiu vorto plurfoje ŝanĝis sian

signifon.

1. Komence «rusoj» (русь) estis etnonomo de la gento, el kiu devenis la Rurikidoj.
2. Poste la vorto ricevis socikondiĉan signifon: «rusoj» iĝis la supera klaso de la socio, precipe la anoj de la princa kompanio.
3. Poste la vorto «Русь» ricevis la signifon geografian: «la Rusa lando» nomiĝis la Kieva princujo, en kiu precipe akumuliĝis la varengaj enmigrintoj.
4. Poste, en la 11–12 jc «Русь», sen perdi tiun geografian signifon, ricevas ankoraŭ la sencon politikan: tiel nomiĝis la tuta teritorio regata de la «rusaj princoj» (la Kieva Regno).

Sejm·oⁿ: rivero en Ukrainio, alfluanto ...

senior·ad·oⁿ, sekundogenituroⁿ: Principo laŭ kiu ĉiuj fratoj de unu generacio estas rigardataj senioroj rilate al la sekva

generacio (al siaj nevoj). Teorie en la Kieva Regno tiu principo devis determini la rajton je la ĉefprinca rango. La ĉefprinco estis rigardata «patro» de la tuta Rurikida gento; sekve, liaj filoj estis rigardataj kiel malpli aĝaj fratoj de siaj onkloj. Se iu el la fratoj de ĉefprinco mortis sen iĝi ĉefprinco, liaj filoj ne plu havis ŝancon atingi la rangon de iliaj onkloj kaj kuzoj. Ekz-e Izęslavo filo de s-ta Vladimiro mortis antaŭ sia patro, neniam estinte ĉefprinco, tial lia posteularo (i. a. Vseslavo la Mago) perdis la rajton je la Kieva trono. Tamen praktike tiu principo ne ĉiam estis obeata: ja Vseslavo (n-ro 11), Vsevolodo II, Izęslavo III tamen sukcesis okupi la tronon. — Iom pli malfrue senioradon enkondukis la ĉeĥoj (Breĉislavo I, en la nuna ĉeĥa skribo Břetislav I, 1055) kaj la poloj (Boleslavo III la Torda Buŝo, 1138). En la rusa historio la seniorado cedis al la rajto de la unuenaskito (primogenituro) en la

Moskva periodo.

senior•oⁿ: Superulo (en feŭda hierarkio). — PIV preferas la formon senjoro; ni opinias ĝin nesufiĉe kontrasta kun la banala sinjoro, kaj krome, senioron nature kompletigas junioro (vd juniora kompanio). La paralela signifo sporta (plenaĝa sportisto) neniel estus konfuziva.

sjever•o•jⁿ: Orientslava tribo (сѣверяне) kies teritorio (Сѣверъ) unue estis parto de Ĉernigovio, poste Sjevera prinĉujo. Malgraŭ sia nomo (kiu signifas nordanoj), ili ne estis speciale «nordaj», sed loĝis ĉe la mez'orienta limo de la Kieva Regno. Tiu etnonomo estas konata ankaŭ aliloke en Slavujo (Gr Σέβερεις, en Balkanio). — Nia transskribo uzas la antikvan valoron de ѣ=[ie] (Vieno=Вѣна) por diferencigi sjevera disde severa. La vorto ĝis nun vivas en pluraj loknomoj: Novgorodo la Sjevera, Sjevera

Doneco.

slavon-ig-o: Influo de la slavono sur la malnovrusan, kaj poste, sur la rusan lingvon. Ekde la kristaniĝo la slavono iĝis en la Kieva Regno la lingvo de la Eklezio kaj scienco. En 14–15 jc, kaj precipe post la falo de Konstantinopolo (1453), la Moskva Regno konscias sin heredanto de la antikva tradicio, kaj en la lingvo aperas ankoraŭ pli forta arĥaika tendenco (la Reslavonigo, R Второе южнославянское влияние). Tio ne malsimilas la Renesancan arĥaikigon de la ortografio en Francio kaj Anglio.

Slavon-o «Λ Religia lingvo, devenanta el la malnova bulgara, k uzata de la rus-ortodoksaj eklezioj» [PIV]. Fakte tiu lingvo estis ne nur kulta, sed ankaŭ scienca, diplomatia kaj ĝenerale la skriba formo de la lingvo ĉe la orientslavaj kaj sudslavaj popoloj (en la unua periodo, ankaŭ ĉe la

moravoj). En la notoj ni referencas ĝin per S.

Sula•o: la rivero Сула́, maldekstra alfluanto de Dnepro.

Suzdala lando: (Rostova, Vladimira, Moskvio; Transarbara lando, la Blanka Rusujo, la Transarbara Hordo).

Svētoslav•oⁿ: rusa antaŭnomo vira, i.a. de multaj rusaj princoj (R Святослав, en la Bizanciaj kronikoj Σφενδοσθλάβος, serbakroate Svetislav).

Svētopolk•oⁿ: slava antaŭnomo vira, MR СВАТОПЪЛКЪ, Gr Σφεντόπλικος, Ĉ Svatopluk, P Świętopełk (havanta pian trupon).

tjurk•o: Post ke la osmanoj uzurpis la gent-familian nomon, oni bezonas ian vorton por distingi la du nociojn (simile al tio kiel oni distingas ĝermano kaj germano). En PIV

troveblas la paro tjurko — turko, kio estas konforma al la paro R турок — тюрк (kaj U тюркські, Вj цюрскія). La uzo de ju por esprimi etimologian ь, kutima en la slavaj lingvoj, havas similaĵon en ekz-e *kiosko*, devenanta el la tjurka *köşk*.

Tamatarkan•o: Loko sur la orienta bordo de Kerĉa Markolo, kie nun estas urbeto Taman'. Aliaj formoj de tiu nomo: tò Ταμάταρχα; tà Μάταρχα; sur italaj mapoj ankaŭ *Matrica* kaj *Matercha* [Menges]. MR Тъматороканъ, Тъматороканъ; (probable el Тъмжтороканъ el tjurka Taman-tarkan); kp ankaŭ la formon *Matraĥo* sur la greklingva sigelo de Olgo (vd [kom. 20.4](#)). Ĉerkese *Tamatarkanu*.

Trans•arb•ar•a Land•oⁿ: R Залеская земля

Trans•don•e•ad•oⁿ MR Задонщина: verko de la fino de la 14^a jc pri la granda batalo

trans Don-rivero (do, «trans-Done»), en kiu la rusoj unue venkis la mongolojn. Tiu verko entenas tutajn blokojn, pruntitajn el «La parolo pri la militiro Igora».

trib•o «I Hist Grupo da fratrioj aŭ kurioj kunligita per religia kulto, havanta propran protektantan dion kaj propran komunan sanktejon...» [PIV]. Al tio ni aldonus komunan teritorion kaj kulturon: ekz-e, la 12 triboj de Izraelo (la signifo PIVa), la orientslavaj sjeveroj, slovenoj, ĥorvatoj, duleboj, kriviĉoj ktp.

trup•o: Per ĉi tiu vorto estas esperantigata unu el la signifoj de плъкъ (φάλαγξ, παράταξις); la aliaj estas *milit(ir)o*, *popol(amas)o*, *batalo*. Kp [roto](#), [kompanio](#).

ukrajn•o: same kiel E. Privat (en lia Vivo de Zamenhof), ni atribuas al tiu vorto la sencon de etnana nomo (ukrajno, ukrainino),

malsimile al PIV, kiu difinas ĝin kiel landonomon. Nun, kiam Ukrainio iĝis sendependa Eŭropa ŝtato, la sola aktuala demando estas, ĉu oni derivu la etnonomon el ukrain- (kiel faras la tieaj E-istoj), aŭ el ukrain-, kion mi opinias pli taŭga por Esperanto, ĉar ĝi evitigas la ĝene misgvidan -in. El la vidpunkto de la ukraina lingvo ambaŭ formoj estas egale (mal)proksimaj de ties vorto Україна [ukrajina]; la formo Ukraina estas iom pli pola (kio havas sian prav-igon, ja tiu vorto aperis en la 16 jc kun la signifo «limlando de la Pola regno», proksimume kiel la Usona frontier), dum la formo Ukraina estas pli rusa. Tamen en poezio oni trovas Ukrainan kaj ruslingve: «Україна глухо волновалась» [Puŝkin], kaj ukraine: «Холоне серце, як згадаю, Що не в Україні поховують, Що не в Україні буду жить» [Ŝeŭĉenko]. — En la E-lingva literaturo fojfoje renkontiĝas la aserto, ke ukraino ne

povas esti etnannomo pro etimologiaj konsideroj. Nu, tiam ankaŭ ruso devus esti landnomo, ja ĝia plej proksima rusa sonformo estas Русь, t.e. Rusio.

vareng•o: «ano de skandinava gento, kiu prirabis la Baltajn bordojn en la 9^a jc, kaj poste liveris gvardianojn al la Bizancaj imperiestroj» [PIV].

Veĉeslav•oⁿ: malnovrusa vira nomo havanta paralelaĵojn en aliaj slavaj lingvoj, L Venceslaus el la praslava [vętjeslavъ], Ĉ Václav (sed innome: Věnceslava). R, U Вячеслав, sed sporade jam en la malnovrusaj fontoj ankaŭ aperas Вєчеславъ. (Pli + famo; sam-senca pola nomo estas Bolesław.)

Veles•o: [kom. 2.22](#); [kom. 2.27](#).

Vladimir•o: «slava virnomo» [PIV]; MR Володимѣрь, S Владимѣрь («granda per sia posedo»; мѣрь parenkas al la gota *mērs*,

«granda», poste ĝin per la popola etimologio anstataŭis мир — «mondo; paco»). La esperantigo respondas al la formo slavona, kiu venkis en la novrusa, dum la ukraina konservas preskaŭ malnovrusan Володимир; la Sagaoj [Kringla] transdonas ĝin per *Valdamar*.

(MR Володимѣрь, P Włodzimierz L Lodomeria) nomo de pluraj urboj, i.a. en Volinio kaj ĉe la rivero Klazmo (fondita de Vladimiro Monomaĥo).

Volini•oⁿ: MR Волынь P Wołyń, teritorio de la orientslava tribo *duleboj*, ĉe la supra Bugo kaj ĉe la fontoj de Pripetio [R Припять, U Прип'ять, P Prypeć]; prinĉujo, kies ĉefurbo estis Vladimiro-la-Volinia, dum kelka tempo unuiĝinta kun Galiĉio.

vostet•oⁿ: diakritilo indikanta nazan prononcon de vokalo en la lingvoj pola kaj litova: ą ę ktp. P ogonek. Per ę ni trans-

skribas la slavonan А (novruse я).

Vsevolod-o: escepte ni donas al tiu nomo formon ne slavonan sed orientslavan, ĉar ni ne scias pri ĝia uzo aliloke. En la Sagaoj [Kringla] ĝi estas Vissivald.

Glosaro Malnovrusa-Esperanta

буй: tradicie oni difinas la sencon de tiu vorto kiel tiun de furioza (slavone ĝi signifas malsaĝa, praruse, sentima, kuraĝa); tamen ĉie en la teksto plej konvenas la traduko per batalema: tiun epiteton ricevas la princoj, multe batalintaj kontraŭ la kipĉakoj.

вой: batalisto.

вѣщий: majstra; profeta, sorĉa.

Демид: Diomedo [PIV].

Дивъ: Divo.

Дмитрий: Demetrio [Agoj, 19:24].

Домид: Diomedo [PIV].

дружина: trupo, [kompanio](#).

живот: slavone vivo, praruse havaĵaro.

Кафа: Kafa', Kafao, Teodozia.

князь: [princo](#).

крѣпость: forto, ἰσχυρίς (1.27), ekz-e Eliro 15:6.

ногата: groŝo (dudekono de grivno).

носад: riverŝipo.

плѣлкѣ: roto, trupo, popol(amas)o;
milit(ir)o; batalo.

половец: [kipĉako](#); [kumano](#).

посадникѣ: leŭtenanto. (Komence: urbes-
tro en Novgorodo, anstataŭanta la princon;
kp finan liston en Transdoneado, kie estas

menciitaj 30 Novgorodaj leŭtenantoj.)

пѣсь: probable tiel la unuaj editoroj transdonis la mallongigon пѣс, atestitan en la manuskriptoj (ekz-e Hip. Kron., pĝ 130), do temas pri MR пѣснь.

Ростиславъ: Rastislavo.

резана: duongroŝo (kvindekono de grivno)

сила: militistaro (9.2). Regula traduko por δύναμις (1Mak. 11:39; 13:11,12) kaj στρατεία, 1Kron. 12:14 (ambaŭ el Heb. zava). Multas ekzemploj en Hip. Kron.

стружіе: konjekteble temas pri lanco (U струже signifas stango); tamen laŭ la kunteksto al ni ŝajnas pli probabla la signifo lancopintingo, stangopintingo (la posta острожие — vd 5.14 kaj 15.6). Evidentas la etimologia rilato al R строгать (raboti).

Тмutorокань: Tamatarkano.

фрягъ (фрязинъ, фряжский): franko;
ĝenovano.

Хръсъ, Хорс: Ĥorso ([kom. 2.21](#), [14.26](#)).

чръ(в)лень: slavone ĝi respondas al
ἐρυθρός (malhele ruĝa); laŭ Liĥaĉov, ĝi est-
as skarлата. Ĉiel ajn, temas pri speco de la
ruĝa koloro.

удельный князь: sendependa princo,
domajna princo.

утреня: [matenlaŭdo](#)

шерешеры: ŝereŝiroj (13.13).

La mallongigoj uzitaj en la Komentaro

A
angle, en la angla lingvo lingvo
Bj
bjelaruse
Ĉ

ĉeĥe R (nov)ruse, en la moderna rusa

Hip. Kron.

la Sankt-Hipata Kroniko

F

france, en la franca lingvo

G

germane

Gr

(mez)greke

L

latine, en la latina lingvo

Laŭr. Kron.

la Laŭrenca Kroniko

...ⁿ

neologismo

MR

malnovruse, en la malnova rusa

P

pole, en la pola

PMI

Parolo pri la Militiro Igora, kp [СПИ](#)

S

slavone

TĴ

TS Transdoneado laŭ la teksto de Ĵdanov
TU Transdoneado el la Sinoda kolekto
U Transdoneado el kolekto de Undolskij
СПИ ukrajne
Слово о полку Игореве, кр [PMI](#)

Bibliografio

BP85: СПИ: Сборник. — Л.: Сов. писатель, 1985. — XXXVIII (Б-ка поэта. Большая сер.).

Cantare: Cantare della gesta di Igor / Introduzione, traduzione e commento di Renato Poggioli. — Torino: Einaudi, 1954.

Eposo: Eposo pri la militiro de Igorj. Tr. el la rusa B. Tornado // Fajrero. № 6, pĝ 1–15.

Geste: Grégoire H., Jakobson R., Szeftel M.

Le Geste du prince Igor' // Annuaire de l'Institut de philologie et de l'histoire orientales et slaves, VIII. Nov-Jorko, 1948.

Get76: Гетманец М.Ф. По следам князя Игоря//ТОДРЛ Л., 1976. Т. 31. С. 305–326.

Jak58: Якобсон Р.О. Изучение СПИ в США//ТОДРЛ М., Л., 1958.

Kar89: Карпунин Г.Ф. По мысленному древу. — Novosibirsk, 1989.

Kringla: Snorri Sturluson. Heimskringla. (La rusa tr.: Снорри Стурлусон. Круг земной. — М.: Наука, 1980.)

Lied: Das Igor-Lied. Eine Heldendichtung. Der altrussische Text mit der Übertragung von Reiner Maria Rilke und der neurussischen Prosafassung von D. S. Lichatschow. — Leipzig, Insel-Verlag, 1985.

Mal59: Мальсагов Д. Д. О некоторых

непонятных местах СПИ // Изв. Чечено-ингушского НИИ истории, языка и литературы, т. 1, вып. 2. Грозный, 1959.

MB84: Мещерский Н.А., Бурыкин А.А. Заметки к восточной лексике СПИ // Вестник ЛГУ. 1984, № 14.

Menges: Menges K.H. The oriental elements in the vocabulary of the oldest Russian epos, the Igor' Tale «СПИ» // Supplement to «Word». – N. Y. 1951; la rusa traduko: Менгес К.Г. Восточные элементы в СПИ. – Л. 1979.

Moĵ89: Можейко И.В. 1185 год. Восток — Запад. Moskvo, 1989.

NF90: Никитин А.Л., Филиповский Г.Ю. Хтонические мотивы в легенде о Всеславе Полоцком // СПИ: Памятники литературы и искусства XI–XVII веков. — Moskvo, 1978.

Nik78: Никитин А. Л. Наследие Бояна в СПИ. Сон Святослава // СПИ: Памятники литературы и искусства XI–XVII веков. — Moskvo, 1978.

Nik84: Никитин А. Л. Испытание Словом // Новый мир, № 5–7, 1984.

Ple90: Плетнёва С. А. Половцы. — М.: Наука, 1990.

Poemo: Poemo pri la militiro de Igorj filo Svjatoslava, nepo Olega. Tradukinto ne indikita // Supl. al Espero, 1908. (№ 4296 en BIL de Stojan.)

Povesti: Повести Древней Руси. XI–XII вв. — Л., 1983.

Puŝkin: Пушкин А. С. Песнь о полку Игореве // [BP85], p. 426–432.

Rib71: Рыбаков Б.А. СПИ и его современники. — Moskvo, 1971.

Rib72: Рыбаков Б.А. Русские летописцы и автор СПИ. — Moskvo, 1972.

Rob78: Робинсон А. Н. Солнечная символика в СПИ // СПИ: Памятники литературы и искусства XI–XVII веков. — Moskvo, 1978.

SA80: Slovaka Antologio. — Bratislavo, 1980.

Sol64: Соловьёв А. В. Восемь заметок к СПИ // ТОДРЛ, т. 20, 1964.

Sum83: Сумаруков Г.В. Кто есть кто в СПИ. — Moskvo, 1983.

Song: The Song of Igor's Campaign / Tr. and Foreword by V. Nabokov. — Ann Arbor: Ardis, 1988.

Šer90: Шервинский С. В. «Дивъ» в СПИ // СПИ: Памятники литературы и искусства XI–XVII веков.—Moskvo, 1978.

Škl90: Шкляревский И.И. Избранное. — М.: Худож. лит., 1990.

Vasmer: Vasmer M. Russisches etymologisches Wörterbuch. — Heidelberg, 1950–58 (rusa eldono: Фасмер М. Этимологический словарь рус. яз. Т. I–IV. — М.: Прогресс, 1986).